



EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

5

1971

Vortoj de Prezidanto Maŭ

La danĝero de nova
mondmilito ankoraŭ ek-
zistas, kaj la popoloj de
ĉiuj landoj nepre devas sin
prepari. Sed, nun la ĉefa
tendenco de la mondo es-
tas revolucio.

Vizito de la Ĉina Registara Delegacio

Laŭ la invito de la Labora Partio de Vjetnamio kaj la Registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko, la Ĉina Partia kaj Registara Delegacio kun kamarado Gou Enlaj, membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, kiel estro kaj kun kamarado Je Gijing, membro de la Politika Buroo de CK de KPĈ kaj vicprezidanto de la Komisiono pri Militaj Aferoj de CK de KPĈ kaj kamarado Kiu Hujzuo, membro de la Politika Buroo de CK de P



Kiam la Ĉina Partia kaj Registara Delegacio atingis Hanojon je la 5-a de marto, sur la placo de la parko Ĉi Linh okazis solena bonveniga ceremonio.

Partia kaj Registara al Vjetnamio

10-
oro
ar-
an-
itaj
CC

kaj vicestro de la Ĝenerala Stabo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, kiel vicestroj, faris amikan viziton al la frata najbaro la Vjetnama Demokratia Respubliko de la 5-a ĝis la 8-a de marto de 1971, kun alta respekto kaj intima saluto de la ĉina popolo al la heroa vjetnama popolo. Tie ĝi ricevis ekstreme solenan kaj varman bonvenigon de la partiaj kaj registaraj gvidantaj kamaradoj de Vjetnamio kaj miloj da popolanoj.






En la vespero de la 6-a de marto, reprezentantoj de la popolo de diversaj rondoĵoj de Hanoĵo okazigis en la kunveno Ba Dinh ekstreme solenan kaj grandan mitingon por bonvenigi la Ĉinan Partian kaj Registraran Delegation. La foto montras ke ĉiuj ĉeestantoj starigis kaj varme aplaudas, kiam Ĉefministro Ĝou Enlaj komencas paroladon en la mitingo.



En la nomo de la hanoĵo al la Ĉina Partia kaj Registrara Delegation kaj Ĉefministro Ĝou Enlaj komencas paroladon en la mitingo.





a popolo, kamarado Tran Duy Hung, prezidanto de la administra komitato de Hanojo, donacis Registara Delegacio lakpentraĵon sur kiu estas gravuritaj la brilaj figuroj de Prezidanto aŭ, la fondintoj de la granda amikeco inter Vjetnamio kaj Ĉinio, intime manpremantaj.






La Ĉina Partia kaj Registara Delegacio estis tre solene kaj varme bonvenigata de miloj kaj miloj da vjetnamaj popolanoj.

Posttagmeze de la 5-a de marto, la Ĉina Partia kaj Registara Delegacio vizitis la Prezidenton de la Vjetnama Demokratia Respubliko, la Centran Komitaton de la Labora Partio Vjetnamio, la Nacian Asembleon kaj Registaron de la Vjetnama Demokratia Respubliko.





La Ĉina Partia kaj Registara Delegacio kaj la Vjetnama Partia kaj Registara Delegacio interparolas en la Prezidanta Domo pri la nuna situacio en Hindaĉinio kaj pri la problemoj kun komuna intereso por ambaŭ landoj.

an-
de
ko.






Akompanate de kamaradoj Pham Van Dong kaj Le Thanh Nghi, kamaradoj Ĝou Enlaj kaj Je Gianjing, estro kaj vicestro de la Ĉina Partia kaj Registara Delegacio, vizitas la ŝpinejon "La Oka de Marto" en Hanojo.



La Ĉina Partia kaj Registara Delegacio donas grandan bankedon por esprimi sinceran dankon pro la ekstreme solenaj kaj varmaj bonvenigo kaj akcepto de la Delegacio de la Centra Komitato de la Labora Partio de Vjetnamio kaj la Registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko.





Akompanate de kamaradoj Vo Nguyen Giap kaj Phung The Tai, kamarado Kiu Hujzuo, vicestro de la Ĉina Partia kaj Registara Delegacio, vizitas aerdefendan trupon de la Aera Forto de la Vjetnama Popola Armeo.



La Ĉina Partia kaj Registara Delegacio revenis al Pekino. La delegacion bonvenigas sur la aerodromo Samdek Norodom Sihanuk kaj lia edzino, Ĉefministro Penn Nouth kaj lia edzino, kamarado Le Tuan, provizora aferŝargito de la ambasadorejo de la Vjetnama Demokratia Respubliko al Ĉinio, kaj kamarado Tran Binh, konsilanto de la ambasadorejo de la Sudvjetnama Respubliko al Ĉinio.

Gin bonvenigas sur la aerodromo ankaŭ ĉinaj partiaj kaj registaraj gvidantaj kamaradoj Huang Jongseng, Jaŭ Venjuan, Li Hian-nian, Vu Fahian, Li Zuopeng, Gi Dengkuj, Li Deŝeng, Vang Donghing, Guo Mojuo kaj aliaj.


La Ĉina Partia kaj Registara Delegacio Estrata de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj Vizitis Vjetnamion

DE la 5-a ĝis la 8-a de marto, 1971, la Ĉina Partia kaj Registara Delegacio estrata de kamarado Ĝoŭ Enlaj, membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko, faris amikan viziton al la Vjetnama Demokratia Respubliko, laŭ la invito de la Centra Komitato de la Labora Partio de Vjetnamio kaj la Registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko, kaj ricevis varman bonvenigon de la vjetnama popolo.

La Ĉina Partia kaj Registara Delegacio kaj la Vjetnama Partia kaj Registara Delegacio faris interparoladojn pri la nuna situacio en Hindoĉinio kaj pri aliaj demandoj

de komuna intereso por ambaŭ flankoj, kaj subskribis Komunan Komunikon de la centraj komitatoj de la du partioj kaj la registaroj de la du landoj.

La Ĉina Partia kaj Registara Delegacio vizitis la Vjetnaman Demokratian Respublikon je la momento, kiam la naciŝtata milito de la hindoĉiniaj popoloj kontraŭ la usona agreso akiras venkojn unu post alia kaj la usona imperiismo intense plivastigas sian agresan militon. Tiu vizito pliapaŝe fortigis la grandan amikecon kaj batalan unuiĝon inter la partioj kaj popoloj de la du landoj kaj esprimis la firman decidon de la septcent milionoj da ĉinaj popolanoj en tutforta subteno kaj helpo al la vjetnama popolo kaj la aliaj popoloj de Hindoĉinio en ilia batalo



Kamarado Ĝoŭ Enlaj kaj kamarado Pham Van Dong subskribas la Komunan Komunikon en la nomo de la du partioj kaj du registaroj respektive.

ĝis la plena venko super la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. La interparoloj inter gvidantoj de la ĉinaj kaj vjetnamaj partioj kaj registaroj kaj la publikigo de la Komuna Komunikado estas forta averto al la usona imperiismo freneze plivastiganta la agresan militon kaj giganta kuraĝigo al la heroe batalantaj popoloj de la tri landoj de Hindoĉinio kaj certe donos gravan influon al la situacio en Hindoĉinio kaj al tiu en la tuta mondo.

Nun bonega estas la situacio en Hindoĉinio. La heroaj patriotaj armeanoj kaj popoloj de Vjetnamio, Laoso kaj Kamboĝo formis kune firman unuecan fronton kontraŭ la usona imperiismo, sub la direktado de la batala standardo de la Plej Alta

Konferenco de la Hindoĉiniaj Popoloj. Kompakte unuiĝante, helpante unu alian, strikte kunagante kaj batalante ŝultron ĉe ŝultro, ili akiris brilajn atingojn sur ĉiuj batalejoj. Je la responda bankedo okazigita vespere de la 7-a en Hanojo, Ĝoŭ Enlaj, la estro de la Ĉina Partia kaj Registara Delegacio, alte taksis la heroan obstinan batalspiriton de la vjetnama popolo. Li diris interalie: "Dum la vizitado, ni propr-okule vidis vian revolucionan spiriton de obstina kaj penema luktado kaj vidis vian ŝtalan volon de **'firma decido batali kaj venki'** komplete la usonajn agresantojn. Via tuta lando, de la gvidantoj ĝis la popoloj, batalas unuanime, senĉese venkas malfacilojn sur la vojo de antaŭenmarŝo kaj akiris grandajn

sukcesojn en ĉiuj frontoj. Por kontraŭstari novajn provokojn de la malamiko, vi estas farantaj necesajn preparojn kun duobligita singardemo. Brave vi staras, kaj kun plena memfido vin preparas por renkonti novajn batalojn kaj akiri novajn venkojn. Ĉio ĉi tio donis al ni fortan impreson kaj estas tre lernindaj por ni.” La nacistava milito de la vjetnama popolo kontraŭ la usonaj agresantoj starigis brilan ekzemplon por la subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj de la tuta mondo batalantaj por sia liberiĝo. Kun “firma decido batali kaj venki”, sen domaĝo pri vivoferoj, ili kondukas longdaŭran rezistmiliton, alkroĉas kaj malgrandigas la agresajn fortojn de la usona imperiismo kaj malordigis ĝian kontraŭrevolucionan tergloban strategion. Tio estas grandega kontribuo al la kontraŭusona batalo de la diverslandaj popoloj de la tuta mondo, kaj ankaŭ forta subteno al la ĉina popolo, kiu nun kondukas la socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon. La ĉina popolo dankas la vjetnaman popolon, kaj la popoloj de la tuta mondo dankas la vjetnaman popolon.

Resti fidelaj al la proletara internaciismo estas nia plej alta devo. Subteni la revolucionajn batalojn de la popoloj de ĉiuj landoj estas nia plenumenda devo. La granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruas al ni: Se iu inter ni parolos pri neebleco de helpo al la vjetnama popolo en ĝia nacistava batalo kontraŭ la usona agreso, tio estas perfido, perfido al la revolucio. La ĉina popolo ĉiam tenos en sia memoro tiun instrukcion de Prezidanto Maŭ kaj rigardos la nacistavan batalon de la vjetnama popolo kontraŭ la usona agreso, la nacistavan batalon de la popoloj de la tri landoj de Hindoĉinio kontraŭ la usona agreso kaj la revolucionajn batalojn de la tutmonda popolo kiel sian propran batalon.

La nuna situacio en Hindoĉinio fariĝas ĉiam pli favora al la popoloj de Vjetnamio,

Laoso kaj Kamboĝo, sed malfavora al la usonaj agresantoj kaj iliaj lakeoj. Tamen la usona imperiismo certe ne volonte ĉesos je sia fiasko. Lastatempe, ĝi plintensigis la vastigon de sia agreso kontraŭ Laoso per pli multe da trupoj kaj Nixon eĉ publike kriis minace, ke li plifortigos la “aeran agadon” kontraŭ la norda parto de Vjetnamio. Kaj subtenate de la usonaj agresantoj, ankaŭ la saĝona pupa armeo sin movas kun la fiintenco invadi nordan Vjetnamion je oportuna tempo. La Komuna Komuniko de Ĉinio kaj Vjetnamio montras: “La du flankoj faris plenan takson pri la aventuremo kaj frenezeco de Nixon-registaro, diskutis demandojn koncerne al traktado al milita aventuro eble farota de la usona imperiismo kaj atingis plenan samopiniecon.” La vjetnama flanko solene deklaras: “Plenumante la testamenton de sia amata kaj estimata Prezidanto Ho Chi Minh, la vjetnama popolo firme decidis venki la agresan politikon kaj ĉian ajn eskaladon de la milito de la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj kaj konduki la aferon de la nacistava batalo kontraŭ la usona agreso ĝis la fina venko. La vjetnama popolo firme decidis forpeli, kune kun la frataj popoloj de Laoso kaj Kamboĝo, la usonan imperiismon el la Hindoĉinia Duoninsulo.” La ĉina flanko solene deklaras: “La ĉina popolo nepre ne lasos la usonan imperiismon agi senbride kaj laŭplaĉe en Hindoĉinio. Se la usona imperiismo iros plue laŭ la vojo de vastigo de la agresa milito kontraŭ Hindoĉinio, la ĉina popolo decideme faros ĉion necesan, eĉ ne domaĝante la plej grandan oferon de la nacio, por tutforte subteni la vjetnaman popolon kaj la aliajn popolojn de Hindoĉinio por komplete venki la usonajn agresantojn.” La ĉina popolo faros, kiel ĝi diras. Antaŭ la granda amikeco kaj la batala unuiĝo inter la popoloj de Ĉinio kaj Vjetnamio, ĉia ajn milita aventuro de la usona imperiismo certe finiĝos per hontinda malvenko.

NUTAŬ:

Nun la Ĉefa Tendenco de la Mondo Estas Revolucio

EN sia solena deklaro *Popoloj de la Tuta Mondo, Unuiĝu kaj Venku la Usonajn Agresantojn kaj Ĉiujn Iliajn Lakeojn!* publikigita je la 20-a de majo, 1970, la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ montris: “La danĝero de nova

mondmilito ankoraŭ ekzistas, kaj la popoloj de ĉiuj landoj nepre devas sin prepari. Sed, nun la ĉefa tendenco de la mondo estas revolucio.” La disvolviĝo de la internacia situacio en la pasinta unu jaro pruvis la sciencan tezon de Prezidanto Maŭ.

Batalantoj de la Popolaj Liberigaj Armitaj Fortoj de Suda Vjetnamio bombardas usonajn kaj pupajn trupojn.



UNUIĜIS LA BATALEJOJ DE REZISTO KONTRAŬ LA USONA AGRESO EN HINDOĈINIO

La nacisava milito de la popoloj de la tri hindoĉiniaj landoj kontraŭ la usona agreso estas la fokuso de la batalo de la tutmonda popolo kontraŭ la usona imperiismo.

Sur la vasta batalejo, la popoloj de la tri hindoĉiniaj landoj solide draŝas la usonajn agresantojn, akiris grandegajn venkojn kaj starigis brilan ekzemplon pri la tezo **“Malforta lando povas venki fortan landon; malgranda lando povas venki grandan landon.”**

Batalante per pafiloj, la kamboĝa popolo kreis bonegan situacion kaj en malpli ol unu jaro post la ŝtatrenverso farita de la kliko de Lon Nol kaj Sirik Matak sub la instigo de la usona imperiismo en marto de 1970 jam ekstermis kaj demoralizis ĉ. 120,000 malamikajn soldatojn, inkluzive de 38,000 usonajn kaj sajgonajn pupajn soldatojn; ĝi liberigis du trionojn de la lando kaj ĉ. duonon de la loĝantaro kaj formis favoran situacion de sieĝo de la urboj per la kamparo. Nun la kamboĝaj popolaj armitaj fortoj jam komencis ataki la fortigitajn punktojn en la ĉirkaŭaĵo de Pncmpeno.

Persistante en la granda popola milito en la pasinta tuta jardeko, la heroa popolo de suda Vjetnamio konsternis la superpotencon usonan imperiismon per fortaj bataloj, tiel ke ĝi falis en senelirejon. La usona imperiismo sendis kelkcent milojn da soldatoj al la batalejo de Vjetnamio, kaj uzis ĉiajn modernajn batalilojn escepte de atombomboj, alprenis la plej barbarajn kaj plej kruelajn agresajn rimedojn kaj vastigis la militon de la suda al la norda parto de Vjetnamio kaj poste de Vjetnamio al Laoso kaj Kamboĝo, sed ĝi rikoltis nur teruran malvenkon kaj ĉiam pli profundigis en la marĉo. En la pasintaj dek jaroj, la armeo kaj popolo de suda Vjetnamio ekstermis pli ol du milionojn da soldatoj de la usonaj, pupaj kaj vasalaj trupoj, faligis kaj detruis pli ol 20,000 aviadilojn de la malamiko kaj starigis popolan reĝimon en vastaj regionoj. Nun la liberigaj armitaj fortoj de la sudvjetnama popolo vaste faras atakojn kaj ekstermas grandnombre militistojn de la usona agresara armeo kaj la sajgona pupa armeo.

Ankaŭ la patriotaj armeo kaj popolo de Laoso akiris brilajn atingojn en bataloj. Ili ne nur reprenis la ebenejon Jars kaj Xieng-Khoung, sed ankaŭ liberigis la gravajn strategiajn lokojn Attopeu kaj Saravane en malsupra Laoso, tiel ke interligiĝis



Brave levigis la heroaj palestinaj gerilanoj en la batalo kontraŭ usona kaj izraela agreso por nacia liberigo.

la liberigita regiono de Laoso, la liberigita regiono de Tay Nguyen en suda Vjetnamio kaj la liberigita regiono en la norda parto de Kamboĝo. Por savi sin el la malvenko en Hindoĉinio, Nixon unue faris senprecedencan bombadon en Laoso, kaj poste de la unua tagdeko de februaro sendis kelkdek milojn da sajgonaj puparmeoj, usonaj infanterianoj kaj kirastrupanoj kaj grandan nombron da tajlandaj dungitaj soldatoj al Laoso por efektiviĝi planon de grandskala agreso en suda Laoso, kunagante kun la dekstrulaj trupoj de Vientiane. Sed la novaj militaj aventuroj de la usona imperiismo povas trafi nur pli teruran malvenkon.

La barbara agreso de la usona imperiismo kunligis la batalejojn en Hindoĉinio. La popoloj de Vjetnamio, Laoso kaj Kamboĝo unuiĝantaj kaj batalantaj ŝultron ĉe ŝultro certe povos gajni la finan venkon spite al ĉiaj malfaciloj.

ĈIE FLAMAS REVOLUCIAJ ARMITAJ BATALOJ EN AZIO, AFRIKO KAJ LATINAMERIKO

Stimulate de la granda vero “el la pafilo venas ŝtatpotenco”, la armita batalo de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko ricevis novan disvolviĝon. Ĉiam pli boniĝas la situacio precipe de la armitaj bataloj de la popoloj de sudorienta Azio pro tio, ke ili havas gvidon de marksism-leninismaj revoluciaj partioj kaj organizoj, iras la vojon de sieĝo de la urboj per la kamparo kaj direktas sian lancpinton kontraŭ la usonan imperiismon kaj ĝiajn lakeojn.

La popola armita batalo sub la gvido de la Komunista Partio de Tajlando jam disvastiĝis en la vastaj kamparoj de 36 el la 71 provincoj de tiu lando, kio forte teruris la uson-tajlandajn reakciulojn. Hodiaŭ la popolaj armitaj fortoj sub la gvido de la Komunista Partio de Birmo vaste entreprenas atakojn en diversaj lokoj de Birmo, frakasis grandskajajn “ĉirkaŭekstermojn” de la malamiko kaj plivastigis la batalan areon en supra Birmo kaj Ŝan-ŝtato. La kamparana armita batalo sub la gvido de la Hinda Komunista Partio (marksism-leninisma) kun agrara revolucio kiel centra tasko rapide disvolviĝis en vastaj montregionoj kaj ebenejoj en 12 el la 16 ŝtatoj de Hindio. La Filipina Komunista Partio restarigita en 1968 aktive gvidas la popolon disvolvi armitan batalon kaj starigis multajn gerilajn distriktojn en la vastaj kamparoj de 7 provincoj. Ankaŭ la popolaj armitaj fortoj de Malajo, Indonezio kaj Norda Kalimantano ĉiam pli grandiĝas en batalo.

En Mezoriento, post batalado en pli ol 5 jaroj la palestina popolo jam fariĝis grava forto en tiu regiono por bati kaj rezisti la usonan imperiismon kaj ĝiajn lakeojn. Samtempe kun sia bato al la izraelaj agresantoj, la heroa popolo de Palestino firme oponas kontraŭ la intrigo de mezorienta “Munkeno” kovata de la du superpotencoj kaj frakasis la armitan atakon de la jordanaj reakciaj fortoj direktataj de la usona imperiismo kun la intenco ekstermi la palestinajn gerilajn taĉmentojn. Post pli-ol-kvin-jara armita batalo kontraŭ la brita koloniisma regado, la popolo batalanta en Dhofar de la suda ekstremo de la Araba Duoninsulo jam liberigis pli ol 90 procentojn de la kamparo kaj iujn urbojn kaj urbetojn. En Afriko, ĉiuj patriotaj armitaj trupoj en Angolo, Mozambiko kaj Gvineo (Bissau) pliintensigis siajn aktivadojn por bati la portugalajn koloniismajn trupojn. Kaj en Latinameriko, nun disvolviĝas la revoluciaj armitaj ba-

taloj de la popoloj de Kolombio kaj Venezuelo.

Prezidanto Maŭ instruis al ni: “En klasa socio revolucioj kaj revoluciaj militoj estas neeviteblaj kaj sen ili la salto en socia disvolviĝo ne povas plenumiĝi, la reakcia reganta klaso ne povas esti renversita kaj tiel la popolo ne povas akiri ŝtatpotencon.” Ĉiam pli ardiĝas la flamoj de la armita batalo de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko. Tio estas la neevitebla leĝo de la historia disvolviĝo. Jam ne malproksimas la tago, kiam la usona imperiismo kaj ĉiuj ĝiaj lakeoj estos cindrigitaj de la ardaĵ flamoj de popola milito.

IMPETE DISVOLVIĜAS LA REVOLUCIAJ AMASAJ MOVADOJ

La revoluciaj amasaj movadoj de la popoloj de la tuta mondo nun disvolviĝas en pli grandaj skaloj kaj la lancpinto de iliaj bataloj direktiĝas al la usona imperiismo kaj la putra kapitalisma sistemo. Tio estas grava signo de la bonega situacio de la mondo.

En printempo de 1970, dum la dekelkaj tagoj post la invado de la usonaj imperiistoj en Kamboĝon, la popoloj de 50 landoj kaj regionoj tra la tuta mondo faris diversformajn drastajn atakojn al la usona imperiismo, en granda skalo, longa daŭro kaj multa nombro de partoprenantoj, neniam viditaj post la Dua Mondmilito.

Kiam la usona imperiismo senskrupule ekspedis trupojn al Kamboĝo, la tuta Usono eksplodis kvazaŭ vulkano. Mallonge en kelkaj tagoj pli ol 700 altaj lernejoj kaj pli ol 300 mezlernejoj strikis por protesto, milionoj da lernantoj, laboristoj kaj divers-tavolaj popolanoj iris sur stratojn por manifestaciado kaj ĉie aŭdiĝis la slogano “For Nixon!” La insista antaŭenpuŝado de la politikoj de agreso kaj milito fare de la usona imperiismo pliakrigis la klasajn kontraŭdirojn en Usono. La vasta popolo de Usono pli kaj pli multe uzas revoluciajn perfertojn por rebati la kontraŭrevoluciajn perfertojn de la reganta kliko. La armita batalo de la nigruloj kontraŭ perferto pli kaj pli vastiĝas, intensiĝas kaj oftiĝas. En julio de 1970, nigruloj de kelkdek urboj prenis armilojn kaj heroe batalis kontraŭ la faŝisma subpremado fare de reakciaj policianoj. Vekiĝis ankaŭ la popolanoj de la nacimalplimultoj kiaj meksika, portorika kaj indiana nacioj ĉiam kruele subpremataj de la usona reganta kliko. Kune kun nigruloj ili partoprenis armitajn batalojn kontraŭ perferto kaj aperis nova situacio de reci-

proka subteno inter la movadoj de la nigruloj, studentoj, laboristoj kaj nacimalplimulto en komuna batalo. La strikoj de 400,000 aŭtofabrikaj laboristoj kaj 500,000 fervojistoj de Usono en decembro de 1970 montris, ke la usona laborista klaso estas faranta ankoraŭ pli potencajn ofensivon al la monopola burĝaro. Sub la influo de la revoluciaj amasaj movadoj de Usono, disvolviĝas kun ĉiu tago ankaŭ la batalo de la usonaj soldatoj kontraŭ agresa milito. La vigla leviĝo de la revoluciaj amasaj movadoj en Usono pelis la usonan imperiismon en malfacilojn en- kaj ekster-landajn kaj forte helpis la revolucionan batalon de la tutmonda popolo.

Ankaŭ en aliaj landoj de la kapitalisma mondo, ĉiam pli alte tajdas revoluciaj amasaj movadoj. La usona imperiismo nutras la japanajn reakciulojn kaj revivigas la japanan militarismon, kio forte indignigis la japanan popolon. La japana popolo estas disvolvanta batalon kontraŭ la revivigo de la japana militarismo fare de la usonaj kaj japanaj reakciuloj. En la batalo kontraŭ la "Sekureca Traktato" inter Usono kaj Japanio, milionoj da popolanoj faris potencajn manifestaciojn en mil kelkcent lokoj tra la tuta Japanio. Senprecedence grandskalaj kaj akraj estis la batalo de la filipina popolo per patriota manifestacio kontraŭ la usona imperiismo, la batalo de la hispana popolo kontraŭ la faŝisma diktatora regado de Franko, la ĝenerala striko de aŭstraliaj laboristoj por oponi la usonan imperiismon kaj ĝiajn lakeojn kaj la strikoj de italaj, britaj, argentinaj kaj alilandaj laboristoj. Ankaŭ en arabaj landoj kaj sendependaj afrikaj landoj senĉese leviĝas novaj altaj tajdoj de batalo kontraŭ la agreso de Usono kaj Izraelo kaj interveno, super-rego, ŝtatrenverso kaj agreso fare de novaj kaj malnovaj koloniistoj.

Estas ne hazarda, ke revolucio fariĝis la ĉefa tendenco nun en la mondo. Tio rezultigis el senprecedenca vekigo de la popoloj de la mondo dank' al la vasta disportiĝo kaj enkoriĝo de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso. Tio rezultigis el la plua disvolviĝo de la kvar kontraŭdiroj de la hodiaŭa mondo kaj longa luktado inter la revoluciaj kaj kontraŭrevoluciaj fortoj.

Prezidanto Maŭ montris: "La usona imperiismo kaj ĉiuj aliaj malutilaj insektoj jam preparis al si tombo-fosistojn kaj la tago de ilia enteriĝo ne estos malproksima." La pliapaŝa kunfandiĝo de la revoluciaj amasaj movadoj kaj revoluciaj armitaj bataloj de diversaj landoj certe komplete enterigos la reakcian regadon de la usona imperiismo kaj ĝiajn lakeojn.



Tenante sloganon tabulon kun vortoj de Prezidanto Maŭ "Popoloj de la tuta mondo, unuigu kaj venku la usonajn agresantojn kaj ĉiujn iliajn lakeojn", londonaj manifestaciantoj marŝas al la usona ambasadorejo por protesti kontraŭ la politikoj de agreso kaj milito de la usona imperiismo.



La usonaj soldatoj konsciiĝas tago post tago. Jen usonaj nigrulaj soldatoj garnizonantaj en okcidenta Germanio manifestacias tenante bruligitan krucon de Ku-Klux-Klano por oponi kontraŭ la milita politiko kaj faŝista regado de Nixon-registaro.

Malgranda Lando Povas Venki Grandan Landon

EN ĉina antikva milita historio estas multaj “famaj ekzemploj de venko de malforta armeo super forta armeo”. Tion pruvis la Batalo inter la regnoj Lu kaj Ki en la Epoko de Printempo kaj Aŭtuno, la Batalo de Ĉenggaŭ inter la ŝtatoj Ĉu kaj Han, la Batalo de Kunjang inter la ŝtatoj Hin kaj Han, la Batalo de Guandu inter Juan Saŭ kaj Caŭ Caŭ, la Batalo de Ĉibi inter la regnoj

Vu kaj Vej, la Batalo de Jiling inter la regnoj Vu kaj Ŝu kaj la Batalo de Fejŝuj inter la ŝtatoj Kin kaj Gin, kiujn Prezidanto Maŭ citis en sia brila verko *Strategiaj Problemoj en la Ĉina Revolucia Milito*. En la Batalo de Ĉibi, la du malgrandaj kaj malfortaj regnoj Vu kaj Ŝu alianciĝis kaj frakasis nur per 30,000 soldatoj la Vej-regnan armeon el laŭdire 800,000 soldatoj. En la Batalo de Fejŝuj,

Heroaj veteranaj gerilanoj de Albanio, kiuj venkis la italan kaj germanan faŝismojn fanfaronatajn kiel tre potencajn.





Venke revenas sudvjietnamaj gerilanoj kun militkaptitaj armiloj.

la armeo de la malforta ŝtato Gin konsistis nur el 80,000 soldatoj, dum tiu de Fu Gian, la reganto de la ŝtato Kin, konsistis el preskaŭ 1,000,000 homoj, sed, Gin fine venkis Fu Gian.

La granda Kontraŭjapana Rezistmilito estas brila ekzemplo de venko de malforta lando super forta lando. En la komenca periodo de la milito, la malamiko estis forta dum nia lando malforta. Tiam Japanio estis la plej potenca imperiisma lando en Azio kun modernaj armiloj kaj ekipaĵoj kaj jara produktokvanto de 7,000,000 tunoj da ŝtalo, dum nia lando estis duonkolonia kaj duonfeŭdisma malforta lando, kaj krome la kuomintanganga reakciularo alprenis la reakcian politikon rezisti pasive kontraŭ Japanio kaj oponi aktive kontraŭ la Komunista Partio. Tial la peza ŝarĝo de la rezistmilito historie falis sur la ŝultrojn de la Okavoja Armeo, la Nova Kvara Armeo kaj la popolo en la liberigitaj regionoj sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio. Tiam nia armeo havis nur kelkdek mil homojn, kiuj longtempe alfrontis atakojn de japanaj agresantoj, pupa armeo de naciperfidulo Vang Gingvej kaj la kuomintanganga reakciularo de Ĉiang Kajŝek. Sub la gvido de la granda komandanto Prezidanto Maŭ kaj sekvante lian brilan tezon en *Pri Longdaŭra Milito*, la brava ĉina popolo batalis unuanime kontraŭ la malamiko, “svingis la glavon al la kapo de japanaj diabloj” kaj forte batis la reakciajn armeojn de la japana imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. Kvankam la malamikaj armiloj estis bonaj, tamen la justeco estis ĉe ni, tial ni per malbonaj armiloj

venkis fortajn malamikojn kun modernaj armiloj kaj ekipaĵoj. Ni disvolvis niajn fortojn en ekstermado de la malamikoj kaj ekstermis la malamikojn disvolvante niajn fortojn. Ju pli longe nia armeo batalis, des pli multe ĝi fortiĝis, kaj en mallonga tempo ĝi disvolviĝis en potenciajn revoluciajn armitajn fortojn kun 910,000 armeanoj kaj 2,200,000 milicanoj kaj fine venkis la ferocan japanan imperiismon. Tio estas mondsdua granda evento kaj miraklo en milita historio.

Ankaŭ en la moderna monda historio, nemaloftaj estis tiaj okazoj, ke **“malgranda lando povas venki grandan landon”**.

Elokventa pruvo estas la historio de la heroo albana popolo en sia rezisto kontraŭ la agreso de la italaj faŝistoj. En la komenca periodo de la Dua Mondmilito Mussolini ekspedis 50,000 armeanojn kun 600 aviadiloj kaj 173 militŝipoj por grandskale invadi Albanion. Sub la gvido de la Albana Partio de Laboro kaj sia estimata kaj amata gvidanto Enver Hoxha, la albana popolo vaste disvolvis gerilan militon per armiloj deprenitaj el la manoj de la malamikoj tiel ke la agresantoj falis en situacion de fiasko. En septembro de 1943, Italio estis devigita kapitulaci kaj la albana popolo malarmis du italajn diviziojn. Tuj poste ankaŭ germanaj faŝistoj arogante invadis Albanion kaj trafis same hontindan malvenkon kiel Italio. En novembro de 1944, la popola armeo de Albanio donis mortan baton al la germanaj agresantoj kaj sukcese liberigis Tiraneon.

Tio estas bona ekzemplo de venko de la brava popolo de malgranda lando super la agreso de granda lando.

La venko de la popoloj de Koreio kaj Ĉinio en la kontraŭusona milito estas alia ekzemplo de venko de malmulto kaj malforto super multo kaj forto kaj venko de kontraŭagresa milito super agresa milito. Kun la vana espero strangoli en lulilo la Demokratian Popolan Respublikon de Koreio kaj la ĵus naskitan Ĉinan Popolan Respublikon, Usono, la imperiismo n-ro 1 en la mondo, senbride lanĉis la agresan militon kontraŭ Koreio je la 25-a de junio, 1950. Ĝi mobilizis trionon de sia tera armeo, kvinonon de sia aera armeo kaj la plejparton de sia mara armeo, kaj krome kolektis trupojn de siaj 15 vasalaj landoj kaj la marioneta reĝimo de suda Koreio kaj entute ĵetis en la batakampon 2,800,000 armeanojn. Ĝi iam kriis arogante: "La Komunista Partio fine perdos sian regadon super norda Koreio." "En la historio la rivero Jalu ne estas netranspasebla baro dividanta la du landojn (Ĉinion kaj Koreion)." Fronte al la agreso de la usonaj rabistoj, la Ĉinaj Popolaj Volontuloj transpasis la riveron Jalu kun nekomparebla heroismo kaj entreprenis la grandan kontraŭusonon batalon ŝultron ĉe ŝultro kun la korea popolo. Fine, la usona imperiismo estis plene venkita de la popoloj de Koreio kaj Ĉinio: pli ol 1,093,000 malamikaj armeanoj (inkluzive de pli ol 397,000 usonaj) estis ekstermitaj, pli ol 12,200 aviadiloj faligitaj aŭ difektitaj kaj pli ol 560 diversaj militŝipoj subakvigitaj aŭ

difektitaj. La perdo de Usono en armitaj fortoj kaj militaj materialoj estis 1.3-oble pli multe ol tiu en la kvarjara Pacifika Milito. La milito finiĝis per kompleta malvenko de Usono. Militista ĉefo de la usona imperiismo veis kontraŭvole: "Ni faris eraran militon en erara loko kaj erara tempo kun erara malamiko." La usona imperiismo ja ne estas tiel potenca kiel iuj blinde kredas, sed nur papertigro facile rompebla per ektaŭso.

En kontraŭimperiisma batalo la heroa vjetnama popolo akiris grandajn venkojn. Sub la gvido de sia estimata kaj amata gvidanto Prezidanto Ho Chi Minh, la vjetnama popolo kuraĝe batalis dum longa tempo kun francaj koloniistoj kaj ekstermis 112,000 malamikojn de vintro de 1953 ĝis printempo de 1954. En la fama batalo de Djen Bjen Fu sola, 16,000 malamikoj estis ekstermitaj aŭ kaptitaj. Kaj tiu milito finiĝis per la venko de la popolo de malgranda lando super granda koloniisma lando. Nelonge poste, la usona imperiismo etendis siajn diablajn ungojn en Vjetnamion kaj komencis sangan masakradon al ĝia popolo. Ĝi bombadis la nordon de Vjetnamio, atakis la sudon kaj starigis ĉie en suda Vjetnamio koncentrejosimilajn "strategiajn vilaĝetojn". En la komenco, kvankam mankis al la vjetnama popolo modernaj armiloj, tamen ili batalis kontraŭ la malamikoj per bambuaj pikiloj. De 1960 ĝis 1970, la popolo de suda Vjetnamio ekstermis pli ol 800,000 malamikojn el la usona agresa armeo kaj ĝiaj vasalaj armeoj, faligis kaj detruis pli ol 26,000 diversajn malamikajn aviadi-

Plene disvolvante la senkomparan potencon de popola milito, la patriotaj armeo kaj popolo de Laoso pli kaj pli fortiĝas en bataloj. Jen ili kalkulas armilojn kaptitajn el la manoj de la malamiko.



lojn kaj detruis pli ol 62,000 militajn veturilojn, pelante la usonajn rabistojn en plenan konsterniĝon.

La agresema usona imperiismo intrige instigis Lonol-Sirikmatak-klikon lanĉi la reakcian ŝtatrenverson kaj senskrupule ekspedis trupojn en Kamboĝon. Sub la saĝa gvido de sia ŝtatestro Samdek Norodom Sihanuk kaj la Reĝlanda Registaro de Nacia Unuiĝo de Kamboĝo, la kamboĝa popolo ekbatalis malcedeme kontraŭ la agresantoj. Nun, la Kamboĝa Naciliberiga Armeo estas persekutanta en venko la malamikojn kaj direktiĝas rekte al Pnompeno, la nesto de la reakcia kliko.

Necesas certaj kondiĉoj por venko de malgranda lando super granda. La plej grava kaj plej decida el ili estas, kiel saĝe montris Prezidanto Maŭ en sia deklaro je la 20-a de majo 1970: **“kuraĝu leviĝi al batalo, kuraĝu preni armilojn kaj mastru la sorton de sia propra lando”**.

“Kuraĝu leviĝi al batalo.” La filozofio de la revolucia popolo estas tiu de batalo. Ni firme kredas, ke sendependeco de ŝtato, liberiĝo de nacio kaj ĉia ajn venko estas realigeblaj nur per penega kaj malfacilega batalo sed ne per petado al la potencaj agresantoj por “bonkoreco” kaj “favoro”. Por batali kontraŭ ili, ni devas fondi nian strategion sur la bazo de “kuraĝo” kaj armi la popolon per la granda strategia penso **“la usona**

imperiismo kaj ĉiuj reakciuloj estas paperaj tigroj”. Ni devas esti kuraĝaj malami, maltimi kaj males-timi la malamikojn, kuraĝi batali kontraŭ ili kaj kuraĝi ilin faligi. Ne timu ke la usona imperiismo estos incitita per nia batalo. Tigro ĉi-okaze manĝas homojn, ĉu oni ĝin incitas aŭ ne. Ĝia naturo estas neniel ŝanĝebla. Kontraŭ tigro ni havas nur unu rimedon: ĝin venki kaj ekstermi per batalo. Se vi montras antaŭ ĝi iometon da malkuraĝo kaj cedemo, ĝi certe pli furioziĝus, eĉ vin vundus kaj formanĝus.

Estas necese rompi komplete la superstiĉon pri la potencaj agresantoj. La granda gvidanto Prezidanto Maŭ saĝe montris: **“Fakte, grandeco ne estas timinda. Ĉu la usona imperiismo ne estas tre granda. Foje ni kontraŭstaris ĝin, kaj el tio rezultis nenio serioza. Tial, iuj grandaj objektoj en la mondo, fakte, ne estas timindaj.”** Tio estas la plej brila resumo de la spertoj de la ĉina popolo en sia kontraŭusona batalo.

“Kuraĝu preni armilojn.” Por venki la agre-santajn grandajn landojn kaj gajni sian liberiĝon, la popoloj de la malfortaj kaj malgrandaj landoj nepre devas ekpreni armilojn. Ili ne povas fari alie. Ni estas pledantoj de la teorio ke revolucia milito estas ĉiopova kaj kredas ke ni povas solvi la problemon per pafiloj. Tio estas vero trovita de la ĉina popolo post sanga batalo kaj longtempaj enketado kaj studado. La ĉina popolo rimarkis

La liberigaj armitaj fortoj de Angolo senĉese disvolviĝas en batalo, donante pezajn batojn al la usona imperiismo kaj la de ĝi subtenataj portugalaj koloniistoj.



ke la reakciuloj tenas glavojn en la dekstra kaj maldekstra manoj. Por kio estas la glavoj? Por homojn mortigi. Kiun ili volas mortigi? La popolon. Enketinte tiujn aferojn ni faris la samon laŭ ilia maniero: **“Ankaŭ la ĉina popolo posedas manojn, kiuj same povas preni glavojn, kaj glavon oni povas fari, se oni ĝin ne havas.”** Vere efika estas tiu rimedo. La usona imperiismo plej timas la ekprenon de armiloj fare de la popoloj de la agresataj landoj, kaj ĝuste tion ni devas fari spiteme. Malfermu historian libron de la moderna mondo kaj vi rimarkos ke ĉiuj landoj, kiuj venkis la agreson de granda lando, senescepte solvis la problemon per milito; kaj la reduktiĝo de landoj al stato de vasalo aŭ kolonio de la usona imperiismo estas senescepte kaŭzita de tio ke ili ne organizis popolajn revoluciajn armitajn fortojn. Kiom ajn multe da malfaciloj kaj zigzagoj la popola milito devas trapasi, ĝi tamen certe suriros la vojon de triumfo, se nur oni **“kuraĝas preni armilojn”** kaj **“persistas en longdaŭra popola milito”**.

Ĉu kuraĝi aŭ ne kuraĝi ekpreni armilojn estas grava problemo signifanta ĉu kuraĝi aŭ ne kuraĝi batali kaj ĉu kuraĝi aŭ ne kuraĝi revolucii. Kvankam la formoj de batalo estas multaj, sed armita batalo estas la plej grava kaj decidiga. Sen potencaj revoluciaj armitaj fortoj, ne povas esti parolrajto, vivrajto kaj libero de la popolo, ne ekzistas ĉio de la popolo. La revolucia popolo nepre ne kredu al la tiel nomata **“parlamentara vojo”**, **“kompromiso”** kaj **“cedo”**, alie ĝi ricevos grandan suferon, eĉ perdis sian landon kaj sian kapon.

Estas favoraj kondiĉoj por popolo de malgranda lando en sia batalo kontraŭ agreso de granda lando. La batakampaj kondiĉoj (inkluzive tiujn de amasa mobilizado, geografio kaj meteorologio, ktp.) nature favoras al la malfortaj kaj malgrandaj landoj. La armeanoj kaj popoloj de tiaj landoj povas sin turni en ferajn muregojn kaj nedeeskapeblajn kaptilojn. Sub la firma blokado kaj forta atako, la entrudiĝintaj agresantoj certe ne povas akiri kompletan konon kaj fari ĝustan juĝon pri la cirkonstancoj kaj fariĝos surduloj, blinduloj kaj frenezuloj, kaj estos brulmortigitaj kiel sovaĝa bovo kurinta en fajron. Kiam potenca kaj granda lando agresas malfortan kaj malgrandan landon, ĝiaj fortoj estas tre malkoncentraj. Laŭaspekte, la usona imperiismo estas granda kaj forta, sed, en konkreta batakampo, ĝi povas uzi nur parton de siaj fortoj. Kvankam ĝi havas 3,000,000 agresajn armeanojn, tamen ili estas dislokitaj al kelkcent militaj bazlokoj en diversaj mondopartoj. Ĝiaj fortoj estas limigitaj sed ĝia ambicio senfina; se iu parto de ĝi estas atakata, ĝia tuto skuiĝas. Se ĝi direktas siajn zorgojn al iu loko, ĝi malgajnos en alia, malgraŭ pena fortostreĉo. Ĝuste kiel diris Vicprezidanto Lin Biao: **“Ĝi plie malfortigis sin per okupado de tiom multe da lokoj en la mondo, tiom malproksima etendo de la manoj, tiom vasta disvolvo de la dek fingroj, tiom disa divido de la fortoj, kaj tenado de tiom malproksima distanco de la postfronto kaj tiom longaj transportaj linioj.”** Kiam granda lando agresas aliajn landojn, ĝi certe estas apartigita de

En la Dua Mondmilito, la germanaj, italaj kaj japanaj faŝistoj freneze kondukis agresan militon kun senkomparaj furiozo kaj aroganteco, sed ili falis unu post alia sub la bato de la potencaj fortoj de la popolo. En la bildo: Hitler (supre dekstre), la ĉefo de la germanaj faŝismaj banditoj, en embaraso antaŭ sia perejo; kadavro de Mussolini (maldekstre), la fondinto de la itala faŝismo, montrata surstrate post ekzekuto fare de italaj patriotaj armeanoj kaj popolanoj; kaj la hontinda fino de la japana milita krimulo Hideki Tojo (malsupre dekstre).



la agresataj landoj kaj ankaŭ de si mem, ĉar ĝi devas malkoncentri siajn fortojn en plurajn malgrandajn partojn kaj tiel malfortigi sin. Ĝuste dank' al tiu taktiko de "apartigado" la popoloj de malfortaj kaj malgrandaj landoj akiras paŝon post paŝo sian venkon. Se en batalo kontraŭ granda lando, iu batas ĝian kapon, alia tiras ĝian voston, tria hakas ĝian talion kaj kvara frapas ĝian dorson, ĉiu kontribuante sian forton en persista lukto, fine ili certe ĝin splitigos kaj formangos per unu mordo post alia. Krome, en sia agresado la fortaj kaj grandaj landoj ofte devas fari transmaraan ekspedicion, dum la armeanoj kaj popolanoj de la agresataj landoj povas rebati kun freŝaj fortoj la laciĝintajn malamikojn. Ĉiuj tiuj favoraj kondiĉoj en milito apartenas nur al la agresataj malfortaj kaj malgrandaj landoj, kaj tio multe helpas al iliaj armitaj bataloj.

"Mastru la sorton de sia propra lando." Metu la batalon sur la bazon de **"sinapogo sur propraj fortoj"** kaj persistu en la principo de sendependeco kaj memstareco, nepre ne dependu de aliaj, ne metu sin sub alies disponon, firme apogu sin sur la unuigo de plejmulto de sia popolo kaj faru longdaŭran malfacilan batalon. Por mastri la sorton de sia lando, la popoloj de malgrandaj kaj malfortaj landoj nepre devas **"persisti en la rezistado, oponi kontraŭ kapitulaco"**; **"persisti en unuigo, oponi kontraŭ splitigo"**; **"persisti en progresado, oponi kontraŭ regreso"**. Unuigu ĉiujn kontraŭimperiismajn patriotajn fortojn kaj oponu kontraŭ ĉiuj naci-perfiduloj. Persisto ĝis la fino signifas venkon.

Justa estas la batalo de la popoloj de malgrandaj landoj por mastri la sorton de sia lando. **"Justa afero ricevas multe da subteno dum maljusta afero trovas malmulte da subteno."** Kiu posedas la jus-

tecon, tiu posedas la veron. En juĝado de afero, la marksistoj antaŭ ĉio konsideras pri tio, ĉu ĝi estas justa aŭ ne, antaŭ ĉio konsideras pri ĝia kvalito sed ne kvanto. Grandeco aŭ malgrandeco kaj forteco aŭ malforteĉo ne havas esencan, nepran ligan kun justeco aŭ maljusteco kaj venko aŭ malvenko respektive. La justeco kaj la vero estas ĉiamvenkaj, dum la maljusteco kaj malvero neniam povas venki. Justa afero absolute ne estas izolata. Malsamaj klasoj havas malsamajn "verojn", sed la vero de sama klaso ne diferencigas en malsamaj regionoj. La vero de la proletaro kaj la revoluciaj popoloj en diversaj landoj tra la tuta mondo estas ĉiam identa. La koroj de la proletaro kaj la revoluciaj popoloj en Azio, Afriko kaj Latinameriko estas kunligitaj en opono kontraŭ la agreso de la fortaj kaj grandaj landoj, kvankam ilin apartigas miloj da montoj kaj riveroj. La batalaj spertoj de dekoj da jaroj pruvis, ke la proletaro kaj la revoluciaj popoloj de la mondo povas akiri grandan venkon nur se ili organizas sin en vasta kontraŭagresiva internacia unuecfrento. Nun tia fronto jam formiĝis kaj estas pliapaŝe firmiĝanta, disvastiĝanta kaj disvolviĝanta. Se iu malgranda kaj malforta lando suferas agreson, multaj landoj helpas ĝin. La usona imperiismo tiranas ĉie kaj disŝutas semon de malamo en la koro de la monda popolo, kaj rezulte de tio ĉiuj leviĝas kontraŭ ĝi; dum la agresataj landoj semas justecon en la monda popolo kaj rikoltos iliajn helpojn kaj fine akiros kompletan venkon en la batalo.

La nuna epoko estas tia en kiu imperiismo iras al kompleta disfalo dum socialismo iras al venko en la tuta mondo. Forpasis por ĉiam la tempo, en kiu unu aŭ du t.n. "superpotencoj" decidis la sorton de la mondo.



Granda nombro da usonaj agresantoj milite kapitulitaj en Koreio estas for eskortata.

Embusko


KORESPONDAĴO EL LAOSO

KAKI-ponto sur la ŝoseo n-ro 9 en suda Laoso estas grava pasejo sur la vojo de Lao Bao de Vjetnamio al Ban Dong de Laoso. Norde de la vojo en la areo de tiu ŝlosila ponto estas altaj montoj kaj densaj arbaroj kaj sude estas milde kliniĝintaj kampoj sur deklivoj, kiuj sin etendas ĝis la rivero Tche Pune.

Post okupo de la areo de Ban Dong, la usonaj kaj saĝonaj pupaj trupoj arogante provis kapti tiun parton de la ŝoseo n-ro 9 por interligi Ban Dong kun sia loĝistika bazo en la orienta parto de tiu ŝoseo.

Ricevinte la gloran taskon bari la malamikajn trupojn, la komandantoj kaj batalantoj de la kvara

Ĉie en la liberigita regiono de Laoso sin trovas kontraŭaeraj grupoj, pretaj por severe puni invadantajn aviadilojn de la malamiko.





Batalantoj de la Patriotaj Armitaj Fortoj de Laoso streĉe gvatas la malamikojn.

trupunuo de la Laosa Popola Liberiga Armeo okupis la altaĵojn 351 kaj 269 de la areo de la ponto. Pacience ili atendis dum kelkaj tagoj la alvenon de la malamikoj al kaptilo. Kruelaj usonaj banditoj freneze bombadis unue la nomitan areon, damaĝante la rizkampojn, la deklivojn kaj la arbarojn, ke ili fariĝis plenaj de bombokavoj. La krimo de la usona imperiismo ekscitis la malamon de la komandantoj kaj batalantoj de tiu trupunuo al la malamikoj kaj ankoraŭ pli firmigis ilian decidemon solide bati ilin por venĝi la popolon.

Frumatene de la 11-a de februaro, estis froste malvarme, sed bolis la sango de la batalantoj de tiu trupunuo. Antaŭ kelkaj tagoj, ili ekstermis sinsekve du paraŝutajn rotojn de la saĝona pupa armeo kaj detruis 5 malamikajn militajn veturilojn. Nun ili decidis akiri ankoraŭ pli grandan venkon. La batalantoj vigle diskutis pri batala plano en siaj pozicioj por efektiviĝi ĝin en atendata batalo.

Tiam usonaj rekognoskaj aviadiloj denove rondflugadis super la areo. Surtere la malamikaj trupoj antaŭenmarŝis en du kolonoj. Unu el ili konsistis el specialaj trupoj de la malamiko kaj marŝis norde kun la tasko protekti la dekstran flankon de la paraŝutaj trupoj de la malamiko kaj penetri en la flankon de la embuskejo de la kvara trupunuo de la Laosa Popola Liberiga Armeo. La alian kolonon formis paraŝuta bataliono de la saĝona pupa armeo, kiu marŝis laŭ la ŝoseo kun du paraŝutaj rotoj en la fronto, kaj ĉi tiujn sekvis 3 taĉmentoj de la 17-a kirasita regimento. Inter la malamikaj soldatoj kaj militaj veturiloj kuris kamionoj plenŝarĝitaj per municio kaj greno. Protektante unu la alian, tiuj du kolonoj antaŭenpuŝiĝis samtempe.

La kvara trupunuo de la Laosa Popola Liberiga Armeo jam longe dispoziciigis por batalo, simile al akra spado, kun la kvara taĉmento sur la altaĵoj 351 kaj 269 kiel tenilo kaj la kvina taĉ-

mento sur la altaĵo 311 kiel la akra pinto. Malantaŭ ili estis la naŭa taĉmento de la sesa trupunuoj, kiu similis al ponardo preta por frakasi je ĉiu ajn momento atakon de la malamika speciala taĉmento en nordo.


Sub la ŝirmo de usonaj jetoj, ĉiuj malamikaj trupoj venis en la embuskejon de la popola liberiga armeo. Je la 10-a m. post la 11-a horo, la fronta komandejo de la Laosa Popola Liberiga Armeo pafis du ruĝajn signalkuglojn en la aeron. Tuj la batalantoj de la kvara taĉmento de la liberiga armeo gardanta sur la altaĵo 351, furioze mitralis al la paraŝutaj soldatoj de la saĵona pupa armeo. Karabenaj kugloj de malamo dense pafis al la malamikoj kaj obusoj de bombĵetiloj eksplodis unuj post aliaj inter la malamikoj. Post nur kelkminuta batalo, la malamikoj jam suferis teruran perdon kaj falis en konfuzon, kaj la batalantoj de la kvara taĉmento tuj komencis sturmon.

Samtempe kun tio, la batalantoj de la kvina taĉmento de la liberiga armeo sturmis de sur la altaĵo 311 kaj pafis al la malamikoj kontraŭtan-

kajn obusojn. La sturmaj grupetoj de la liberiga armeo enpuŝiĝis kiel akraj stiletoj en la malamikajn trupojn. Sub peza bato, la malamikoj baraktis en konfuzo, kiel serpento kun rompita kapo. En tre mallonga tempo, la malamikoj en la fronto estis ekstermitaj kaj tiuj en mezo estis distranĉitaj en partojn kaj poste ekstermitaj. Konstermitaj de la malfavora situacio, la du malamikaj kirastaĉmentoj tuj forfuĝis returne al Lao Bao. Iu speciala taĉmento de la malamiko en nordo, kiu servis kiel defenda trupo, provis savi siajn kolegojn el la sieĝo, sed ricevinte fortan baton de la Laosa Popola Liberiga Armeo ĝi ankaŭ devis haste forfuĝi, postlasante siajn kolegojn. Rezulte, sur la batalejo de la ŝoseo n-ro 9, kuŝis restaĵoj de pli ol 20 usonaj tankoj kaj kirasaŭtoj kaj granda nombro da kadavroj de saĵonaj pupaj soldatoj. Tio estis peza malvenko de la formulo "usona fajro plus pupa armeo".

La batalo venke finiĝis. Batalantoj de la Laosa Popola Liberiga Armeo kun alta batalspirito for eskortis la militkaptitojn teruritajn kaj deprimitajn.

Enciklopedieto



Seka kaj Pluva Sezonoj en Hinduĉinio

HINDOĈINIO ĝenerale aludas pri Vjetnamio, Laoso kaj Kamboĝo situantaj en la Hinduĉinia Duoninsulo en sudorienta parto de la azia kontinento. Ĉar la regiono situas inter Ĉinio kaj Hindio, tial oni nomas ĝin Hinduĉinio.

Hinduĉinio sin trovas en tropika kaj subtropika zonoj. La jara mez-nombra temperaturo superas 20 gradojn C kaj tie ne distingiĝas la kvar sezonoj de la jaro, sed nur estas du klare distingeblaj sezonoj seka kaj pluva. La tempo de majo ĝis oktobro nomiĝas pluva sezono kaj tiu de novembro ĝis aprilo seka sezono.

En pluva sezono tien blovas duonvarma kaj humida sudokcidenta vento de sur la tropika parto de la Hinda Oceano. Tiam leviĝas temperaturo, abundas pluvo, kaj la plantaĵoj vikle prosperas.

En seka sezono, seka kaj malvarma nordorienta vento de la interna parto de la azia kontinento alportas malvarman aeron. Tiam falas temperaturo kaj malmultiĝas pluvo.

Sur la batalkampoj en Hinduĉinio la usonaj agresantoj kaj iliaj lakeoj plej timas pluvan sezonon. En tiu

sezono, tute perdis sian efikecon la "modernaj ekipaĵoj", sur kiuj ili apogis sin, tial pli deprimiĝis iliaj trupoj. Pro tio la agresantoj ĉiam provas fari iajn "ofensivojn" en seka sezono por elturniĝi el situacio de malvenko. Sed por la bravaj, batal-lertaj patriotaj popoloj kaj armeoj de la suda Vjetnamio, Kamboĝo kaj Laoso, ili ĉiam povas sagace ataki la malamikojn kaj akiri venkojn tiel en seka kiel en pluva sezono. Ankaŭ seka sezono de Hinduĉinio ne povas savi la usonajn agresantojn kaj iliajn lakeojn, kiuj jam falis en la vastan maron de popola milito.

La Tri Popoloj de Hinduĉinio Solide Batas la Usonajn kaj Pupajn Soldatojn

En plivastigo de la agresa milito kontraŭ Hinduĉinio, la usona imperiismo jam atingis ekstreman senbridecon. Samtempe kun sia barbara bombado kontraŭ la Vjetnama Demokratia Respubliko, ĝi kondukis grandan nombron da pupaj trupoj de suda Vjetnamio kaj de Lon Nol por fari frenezajn atakojn kontraŭ la patriotaj armeo kaj popolo de Kamboĝo kaj invadi Laoson en grandaj amasoj. Tio komplete malkaŝis la agreseman kaj militeman naturon de Nixon-registaro.

Sed kiel ajn freneza estas la usona imperiismo, ĉiu ĝia nova milita aventuro trafos nur ankoraŭ pli hontindan fiaskon antaŭ la tri heroaj popoloj de Hinduĉinio batalantaj en unuiĝo.

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ diris: "Plifortigante sian unuiĝon, subtenante kaj helpante unu alian kaj persistante en longdaŭra popola milito, la popoloj de la tri landoj de Hinduĉinio certe superos ĉiujn malfacilojn kaj akiros kompletan venkon."


Certe malvenkos la usona imperiismo! Certe venkos la tri popoloj de Hinduĉinio!

Heroa trupo de la Popolaj Liberigaj Armitaj Fortoj de Suda Vjetnamio, kiu faris multajn meritojn en batalo.





Batalantoj de la Laosa Popola Liberiga Armeo, pretaj por puni usonajn aerajn piratojn en ĉiu momento



Batalantoj de la Laosa Popola Liberiga Armeo en embusko

Pochentong-aerodromo en Pnompeno post la bombardo fare de la Kamboĝaj Naciliberigaj Armitaj Fortoj






Alte tenante venkan standardon, trupo de la Popolaj Liberigaj Armitaj Fortoj de Suda Vjetnamio sturmas antaŭen en venko.



Pupaj armeanoj de Lon
Nol solide batitaj



Ricevinte frakasajn batojn de la Kamboĝaj Na-
ciliberigaj Armitaj Fortoj, disfalas la pupaj tru-
poj de suda Vjetnamio.



Trupo de la Laosa Popola Libe-
riga Armeo preta por militiro

Batalantoj de la Popolaj Liberigaj Armitaj
Fortoj de Suda Vjetnamio en ofensivo



Ĉinio Sukcese Lanĉis Artan Tersateliton por Sciencaj Eksperimentoj

LA 3-an de marto 1971, Ĉinio lanĉis unu artan tersateliton por sciencaj eksperimentoj.

Ĝi pezas 221 kg.. La perigeo de ĝia orbito distancas de la terglobo 266 km., kaj la apogeo — 1,826 km.; la angulo formita de la ebena de ĝia orbito kun tiu de la ekvatoro de la terglobo estas 69.9 gradoj; ĝi bezonas 106 minutojn por fari unu revolupon ĉirkaŭ la terglobo. Dum sia rondirado de la 3-a ĝis 15-a de marto, ĝi sukcese resendis al la tero sciencajn donitaĵojn pri diversaj eksperimentoj per la frekvencoj de 20.009 kaj 19.995 megacikloj kaj nun ankoraŭ daŭrigas sian planitan sciencan eksperimentan laboron.

La sukcesa lanĉo de tiu ĉi satelito estas la rezultato, kiun akiris la ĉina popolo, sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kun Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj Vicprezidanto Lin kiel la vicestro, kaj sub la direktado de la linio de unuiĝo kaj venko alprenita de la Naŭa Kongreso de la Partio, persistante pri la principo de **sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj**, plene efektivigante la ĝeneralan linion **streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone**

kaj ekonomie kaj klopodante per praktikaj agoj teni la revolucion, stimuli la produkton, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito.


La Centra Komitato de KPCĈ gratulas la laboristojn, komandantojn kaj batalantojn de ĈPLA, revoluciajn kadrojn, sciencajn, inĝenierajn kaj teknikajn laborantojn kaj milicianojn, kiuj okupiĝis pri la esplorado, fabrikado kaj lanĉo de la satelito, kaj aliajn koncernajn personojn. Ĝi esperas, ke la kamaradoj pli alte tenos la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso, elstariĝos la proletaran politikon, konsciencie studos Marksismon-Lenismon-Maŭzedongpenson, klopodos reformi sian mondkoncepton kaj senĉese levos sian konscion pri klasbatalo kaj la batalo inter la du linioj. Ĝi esperas ke ili sekvos la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, ke **“La homaro ĉiam devas konstante resumi sperton kaj fari novajn eltrovojn, novajn inventojn, novajn kreojn kaj novajn progresojn”**, restos modestaj kaj singardemaj, gardos sin de fiereco kaj malpacienco, faros konsciencie esploradon, energie kunlaborados kaj penados por disvolvi pliapaŝe la sciencon kaj teknikon de nia lando, plifortigi la socialisman konstruadon kaj fari ankoraŭ pli grandajn kontribuojn al la homaro.

Per dazibaŭo fervojistoj kaj ĈPLA-ano sendita por subteni maldekstrulojn varme ak-lamas la sukcesan lanĉon de arta tersatelito por sciencaj eksperimentoj fare de nia lando.



Laboristaj, kamparanaj kaj soldataj lernantoj de la Pekina Universitato aŭskultas la ĝojigan novaĵon pri la arta tersatelito por sciencaj eksperimentoj sukcese lanĉita de nia lando.





Prosperaj Grenkampoj kaj Forstoj Ambaŭborde de Tinggiang

La rivero Tinggiang

AKTIVE respondante la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ “**verdigi la patrolandon**”, pli ol 600 milojn da muoj forstumis la vastaj amasoj de malriĉkampanoj, malsuperaj mezkampanoj kaj komunumanoj de la montregiono de Dapu-gubernio de Guangdong-provinco sur montoj, kies areo okupas 85% de la teritorio de la gubernio, kaj per tio pentris novan bildon de prosperaj kampoj kaj forstoj. Kiam ni venis al la forstejo, ni trovis ke sur la altaj montoj estas ordaj ŝtuparkampoj, ĉielskrapaj piceoj kaj ombraj bambuoj, kaj verdas la vintre semitaj tritikoj sur kampoj kaj inter arboj.

FLAVA SABLEJO ANTAŬE, VERDA ARBARO NUN

Ni veturis norden laŭ la monta ŝoseo per aŭto kaj atingis la avangardan vilaĝon en forstumado, Huangŝa-brigadon de Hihe-komunumo. Respon-

deculo de la brigada revolucia komitato entuziasme rakontis al ni pri arbokulturado kaj liberiĝo de la vilaĝo de malutiloj de sablo.

En mencio de la nomo de la vilaĝo, kiu signifas “flavan sablon”, maljunuloj neniel povis forgesi ĝian devenon. Antaŭ la Liberiĝo, la loko estis serioze detruita de kuomintangaj reakciuloj, bienuloj kaj montotiranoj, tiel ke la montoj tute kalviĝis, kaj post forta pluvo sablo ĉie ruliĝis malsupren de la deklivoj. En 1941, montotorento detruis per kovro de sablo pli ol 800 muojn da kampoj, inter kiuj sur 183 muoj sablamasoj formis digon. Post tio la vilaĝo ricevis sian nunan nomon. Tiam cirkulis jena kanto plena de amaro:

*Sur Huangŝa-anoj pezas la sufero:
Sekeco kaj inundo alternadas kiel plagoj.
Rizkampoj krevas post tri sunaj tagoj;
Necesas post pluvego jam boato sur la tero.*

En 1943, post katastrofo de sekeco, pli ol duono de la pli ol 2,000 loĝantoj de la vilaĝo kun pli ol 600 familioj formigris al Gianghi kaj Fugian, iuj eĉ eksterlanden. Tiam en la vilaĝo regis dezerteco:

*Herbaĉoj blokas multajn pordojn,
Araneaĵoj kovras fornojn.*

Post la Liberiĝo, sub la brilo de Maŭzedongpenso, la heroa popolo de Huangŝa-vilaĝo firmigis la falemajn deklivojn, eliminis sablajn malutilojn, kaj verdigis la kalvajn montojn per arboj, donante al la loko novan fizionomion en la revolucia spirito de Malsaĝa Avo, kiu translokigis montojn. Sub la gvido de komunistino Daj Dijin, modelo de forstumado de la provinco, la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj de la tuta vilaĝo forportis la ŝtonajn kaj sablajn amasojn, kiujn montorentoj antaŭe kunportis al rivero, kampoj kaj montpiedo, por ripari la falemajn deklivojn. Por tio ili plenumis multe da penigaj laboroj. Per sia ruĝa koro kaj feraj ŝultroj, la vilaĝanoj transportis pli ol 10 milionojn da vektportoj da ŝtonoj kaj sablo, por firmigi kaj ripari pli ol 400 eroziitajn kaj falemajn deklivojn, kaj verdigis 95% de la tuta kalva montaro per plantado de piceoj, pinoj kaj fruktarboj sur areo de pli ol 5,000 muoj. Ili fine venkis la sablon kaj akiris la gloran titolon de Modela Vilaĝo en Forstumado.

La venko super sablo kaj verdigo de la montoj ebligis al la vilaĝanoj konservi akvon kaj grundon kaj akiri riĉajn rikoltojn de greno. Nun pli ol 1,000 muoj da kampoj de la brigado estas irigaciataj per memflua akvo kaj pli ol 500 muoj, kies rikolto dependis antaŭe de la vetero, estas liberigitaj de sekeco. Samtempe, la brigado energie konstruis kampojn sur montoj por plivastigi grenkampojn kaj efektiviĝi riĉan rikolton tiel en sekeco kiel en pluvabundo. Dank' al tio, la brigado akiris riĉajn rikoltojn de greno en naŭ sinsekvaj jaroj kaj liveris al la ŝtato grandajn kvantojn da greno kaj ligno, forte helpante la socialisman konstruadon.

VERDAJ VALOJ EN ĈAJANG

Forlasinte Huangŝa, ni vizitis la popolan komunumon Ĉajang, kiu situas apud la rivero Tinggiang. Tie montoj staras kontinue unu apud alia kun multaj valoj kaj kanjonetoj. Tre precize oni priskribis la terformon de Ĉajang jene:

*Leviĝas ambaŭflanke montoj kvazaŭ klifoj;
Vidiĝas kiel strio la ĉielo supre.
Loĝejojn havas homoj sur valfund' malsupre,
Kaj pendas ŝtuparkampoj sur montodeklivoj.*

De post 1965, alte tenante standardon de "Ierno de Daĝaj en agrikulturo", la vastaj amasoj de malriĉkamaranoj, malsuperaj mezkamaranoj kaj komunumanoj de Ĉajang batalis por rearanĝi la montojn kaj akvojn, tiel ke multe ŝanĝiĝis la fizionomio de la montregiono. Senĉese kreskis grenprodukto. Ankaŭ en forstumado kaj verdigo de kalvaj montoj oni akiris ĝojindan sukceson. La antaŭe kalva montaro Ŝouñiuling nun estas kovrita de densa arbaro. Por vivigi ĉiun arbon la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj de Ĉajang multe ŝvitis.

Tio okazis en somero de 1965. Pli ol 3,800 malriĉkamaranoj, malsuperaj mezkamaranoj kaj aliaj komunumanoj de la 19 brigadoj de la komunumo Ĉajang formis grandan armeon por forstumi la montaron Ŝouñiuling. Tie, tri montpintoj rekte pikas la ĉielon, la tertavolo estis maldika kun malmolaj rokoj sen herboj kaj akvo kaj eĉ bovoj neniam alvenis. Sub tiaj malfavoraj kondiĉoj estis multe da malfaciloj por planti forston. Sed la vastaj amasoj de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj diris: "La montoj estas altaj, sed ne tiel kiel nia batalvolvo; la rokoj estas firmaj, sed ne tiel kiel nia decido. Ni nepre vestos la kalvajn montojn per verdaj manteloj." Post malfacila batalo en unu vintro-printempo ili kreis bonkvalitajn forstozonojn kun areo de pli ol 2,500 muoj surplantita per piceoj, pinoj, bambuoj, oleaj kamelioj k. a. sur la montaro, kaj konstruis arbarajn vojojn kun longeco de 18 kilometroj. Samtempe kun tio, ili kultivis grenon inter arboj kaj rikoltis en la sekvinta jaro pli ol 50,000 ĝinojn da greno.

En 1967 kaj 1968, la vastaj amasoj de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj kaj revoluciaj kadroj de Ĉajang-komunumo iris al pli foraj montoj kaj fondis tie du forstejojn nomatajn "Honghing" kaj "Dongfeng".

Kiam la dua printempo de la sepdekaj jaroj venis, la vastaj amasoj de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj de Ĉajang-komunumo ellaboris novan planon de plua disvolvo de grenprodukto kaj arbokulturo. Ili decidis efektiviĝi la sloganon de "riĉaj grenrikoltoj kaj prosperaj arbaroj" sur altaj montoj kaj en profundaj valoj en servo al la popolo.

VERDA MARO DE JINGIANG

Ni ŝipveturis de Ĉajang malsupren laŭ la rivero Hangiang kaj atingis la popolan komunumon Jिंगiang. La loko estas konata kiel produktejo de ligno

kun arbaro nefinhakebla kaj liveras ĉiujare al la ŝtato grandajn kvantojn da ligno kaj lignokarbo.

Ni venis al la brigado Pingŝang, kie pli ol 1,200 komunumanoj ĝuste kulturebligis la teron sur altaj montoj, sub la gvido de Liaŭ Huanguang, komitatano de la partia filio de la brigado, por planti forston.

De 21 jaroj, Pingŝang-brigado same kiel la tuta komunumo ĉiam hakas kaj reforestumas laŭ plano. Ili plantis forston de la piedo ĝis la supro de la monto Tongguĝang alta je pli ol 1,000 metroj super marnivelo. De la Granda Proletara Kultura Revolucio, apogante sin sur la propraj fortoj, la brigado jam fondis kvar forstejojn Geli, Bajŝi, Datang kaj Pingŝang, kie oni plantis pli ol 10,000 muojn da piceoj kaj pinoj, kaj inter arboj ili kultivas pli ol 4,000 muojn da grenplantoj.

Respondeca kamarado de la partia komitato de komunumo Jingiang diris al ni, ke krom planti kaj haki arbojn laŭplane, ili starigis specialajn forstumajn grupojn, fondis 8 arbidajn plantejojn kaj trejnis pli ol 260 forstumajn teknikistojn. Ili plenforte disvolvas amasan movadon por ke “ĉiu komunu-

mano kolektu arbosemojn, ĉiu brigado kultivu arbidojn, kaj en ĉiu jaro oni plantu novajn arbojn”. En la lastaj tri jaroj, la tuta komunumo plantis pli ol 50,000 muojn da diversaj arboj, tiel ke promeniante la rigardon, oni vidas tiel en malproksimo kiel en la ĉirkaŭeco ĉie kontinuan verdan arbaron prosperan kaj ĉielskrape altan. La pli ol 195,000 muoj da piceoj de la komunumo formis verdajn striojn ĉirkaŭantajn la tutan teron de Jingiang.

Kiam ni forlasis Pingŝang kaj veturis per aŭto sur la ŝoseo de Jinhu, ni renkontis multajn kamionojn plenajn de agrikulturaj maŝinoj, kemisterko, ŝtofoj kaj diversaj vivnecesaĵoj kurantaj al la kamparo kaj preter ni pasis aŭtoj plene ŝarĝitaj per ligno kaj lignokarbo liverotaj al la urbo. En la forstoregiono ĉie regas prospereco kaj vigeleco. Oni trovas ke la mondo tute ŝanĝiĝis, komparante la nunon de Jingiang kun ĝia mizera pasinteco antaŭ la Liberiĝo, kiel priskribite jene:

*Malsupren portas arbon
De Jingiang mi per bovo.
Kolektas mi brullignon, faras lignokarbon,
Por vivi dum malsata katastrofo.*



Membroj de Gaŭpi-komunumo dehakas bambuojn.

La Homoj Certe Povas Venki la Naturon

GONG-AN-GUBERNIO de Hubej-provinco estas avangarda kotonprodukta regiono sur la suda bordo de la meza parto de Jangzi-rivero. La meznombra pomua produktokvanto de sensemigita kotono de la tuta gubernio estas pli ol 110 ĝinoj. En 1970, post atako de malofta pluvego oni ankoraŭ akiris riĉan rikolton de kotono.

En la daŭro de la torenta pluvego, la revolucia komitato de la gubernio okazigis tutgubernian kunvenon per disaŭdigaj aparatoj. Per la filozofiaj pensoj de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la estro de la revolucia komitato Vang Juming edukis la kadrojn kaj komunumanojn rigardi la katastrofon el vidpunkto de materiisma dialektiko. Li diris: “Estas malfeliĉe, ke la torenta pluvego subakvigis la kotonplantidojn. Sed ĝi prezentas ankaŭ kazon por provi la volon de niaj kadroj kaj amasoj. En konsidero pri tio, ĝi estas bona afero. Prezidanto Maŭ instruas al ni: ‘En iuj tempoj dum la revolucia lukto la malfavoraj cirkonstancoj superas la favorajn kaj sekve konsistigas la ĉefan flankon de la kontraŭdiro, dum la favoraj cirkonstancoj konsistigas la neĉefan flankon. Sed, dank’ al la penado de la revoluciuloj, povas esti venkitaj paŝo post paŝo la malfaciloj kaj kreiĝas nova favora situacio, tiam la malfavora situacio cedas lokon al la favora.’ Se nur la tuta popolo de nia gubernio klopodos unuane kun Maŭzedongpenso kiel orientilo, lernante la spiriton de la daĝaj-anoj peneme lukti en malfaciloj, ni certe povos venki la katastrofon spite al ĉiaj malfaciloj.”

Tuj post la fino de la kunveno, la gvidantoj kaj kadroj de la gubernia revolucia komitato iris al

iuj komunumoj por dreni superakvon kune kun komunumanoj.

La kotonaj kampoj ĉirkaŭataj de digoj de Jaŭhing-brigado, kiu estis trafita de serioza katastrofo, fariĝis akvejoj. Sed la komunumanoj luktis kontraŭ la katastrofo kun granda fervoro kaj alta batalspirito. En la drema pumpstacio, la maŝinisto Ju Hjuegij persiste laboradis en 7 sinsekvaj tagnoktoj. Liaj okuloj ruĝiĝis pro maldormado kaj la motoroj fariĝis varmegaj. Hiaŭ Vukjuan, la sekretario de la partia filio de la brigado, kiu maldormis en kelkaj sinsekvaj tagnoktoj, helpis Ju Hjuegij porti akvon por malvarmigi la motorojn. La kadroj kaj amasoj kune klopodadis unuane por fordreni la stagnantan akvon sur la kampoj per pumpmaŝinoj, siteloj kaj ĉerpiloj, tiel en tago kiel en nokto, kaj fine fordrenis la akvon interne de la ĉirkaŭdigoj.

Jangĉang kun 6 komunumoj kaj Bejĝa kun 5 komunumoj trafis seriozegan katastrofon neniam viditan en la pasintaj cent jaroj. Kaj pli serioza estis la kazo de Bejĝa, kiu troviĝas supre. La kampoj de Bejĝa intertuŝiĝis kun tiuj de Jangĉang. En la pasinteco, komunumanoj de Bejĝa ĉiam drenis superakvon en branĉon de Jangzi-rivero tra la kanalo, kiu ĉirkaŭfluis la kampojn de Jangĉang laŭ longa kurba vojo por ne malutili al ili. Se tiufoje oni farus kiel antaŭe kaj ne ĝustatempe fordrenus la akvon, ĉiuj kotonplantidoj de Bejĝa mortus. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ “Ni devas stimuli la zorgadon pri la intereso de la tuto”, la kadroj kaj membroj de Jangĉang disvolvis la komunisman spiriton, breĉigis la digon kaj lasis la superakvon de Bejĝa trairi siajn kampojn kaj flui en proksiman



Sunumo de nova kotono

akvokonservejon. La torentego kun kapo tri metrojn alta rekte sin ĵetis al Jangĉang. Ĝi fluis tra kotonaj kampoj kun areo de ĉirkaŭ dek mil muoj rekte al akvokonservejo. Vidinte ke la akvo en la konservejo baldaŭ superos la danĝeran nivelon, la homoj de Jangĉang tage kaj nokte klopodis plifirmigi la akvokonservejon. Altigo kaj fortikigo de ĝia ĉirkaŭdigo sekurigis la popolajn komunumojn en tiu loko.

Ankaŭ la kadroj, loĝantoj kaj lernantoj de urboj kaj urbetoj organizis sin en taĉmentojn por subteni la komunumojn kaj brigadojn en fordreno de akvo kaj batalo kontraŭ la katastrofo. Per penema lukto, la popolo de la tuta gubernio fine fordrenis la superakvon sur la pli ol 400,000 muoj da kotonaj kampoj en unu semajno.

Influite de la inundo kaj pluvado, la kotonplantoj ĝenerale kreskis malbone kaj la nombro de la

someraj kotonfruktoj estis malpli granda je pli ol triono ol tiu en la pasinteco.


Ĉu estas eble iel kompensi la tempon forrabiton de la katastrofo, iel rapidigi la kreskadon de la kotonplantoj kaj iel igi ilin doni pli multajn fruktojn? Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ "senrezerve mobilizu la amasojn kaj eksperimentu antaŭ entrepreno de ĉio", la revolucia komitato de la gubernio dissendis kadrojn al la kampoj kaj mobilizis la komunumojn kaj brigadojn de la tuta gubernio por fari amasajn sciencajn eksperimentojn. Teknikaj grupoj de triflanka kombiniĝo de veteranaj kotonkulturistoj spertoriĉaj, kadroj kaj teknikistoj kun la unuaj kiel la ĉefa forto stariĝis unuj post aliaj en ĉiuj komunumoj kaj brigadoj. Tiuj grupoj batalis tage kaj nokte en la kotonaj kampoj, esplorante la leĝojn de la kreskado de la plantoj por eltrovi rimedojn por kreskigi kaj fruktigi la plantojn. Sub la

alvoko de la revolucia komitato de la gubernio, ankaŭ la industriaj kaj komercaj branĉoj de la gubernio sendis homojn al komunumoj kaj brigadoj por informiĝi pri la bezonoj de la kotonkulturistoj, garantii ĝustatempan provizon de necesajoj kaj per sia kunlaboro venkigi la batalon por riĉa rikolto.

La kotonplantoj de Ginghua-brigado de Ĉeng-guan-komunumo, same kiel tiuj de la aliaj partoj de la tuta gubernio, malfruiĝis je unu monato en sia kreskado. La komunumanoj tamen ne deprimiĝis antaŭ la nanaj malfortaj kotonplantoj. Antaŭ ĉio la teknika grupo de la brigado serioze studis la instruon de Prezidanto Maŭ **“En la kampoj de la produkta batalo kaj scienca eksperimento, la homaro ĉiam konstante disvolviĝas kaj ankaŭ la naturo ĉiam konstante disvolviĝas; ili neniam restas sur la sama**

nivelo”, kaj kuraĝe faris sciencajn eksperimentojn. Sekretario de la partia filio Sun Ĉuanming diris al la kamaradoj de la teknika grupo: “Injekto de glikozo povas vivecigi homojn. Ĉu ni ne povus rapidigi la kreskadon kaj multe fruktigi la plantojn de koton, se ni injektus al ili ian drogon?” La teknika grupo decidis starigi eksperimentan kampon por fari eksperimentojn pri injekto de medikamento por stimuli la kreskadon de kotonplantoj. Informiĝinte pri ilia ideo, laboristoj kaj teknikistoj de kemia fabrika de la gubernio en la proksimaĵo donis varman helpon. Post multfoja eksperimentado, finfine ili produktis per propra metodo stimulan solvaĵon taŭgan por lokaj kotonplantoj. Per ŝprucigo de tia solvaĵo sur la kotonplantojn aŭ kotonajn florburĝonojn, oni povas multe akceli la kreskadon de la kotonplantoj kaj redukti la defalojn

Membroj de Kjunhing-komunumo pakas kotonon por ĝin liveri al la ŝtato.



de kotonburĝonoj. Dank' al vasta apliko de tiu metodo al la kotonaj kampoj en la tuta gubernio, oni unuapaŝe venkis la krizon kaj reakiris la tempon forrabiton de la natura katastrofo.


Post la "aŭtunkomenco"*¹, la vetero malvarmiĝis. La kotonplantoj en la kampoj frue jam floris kaj fruktis. Inter la tieaj kotonkulturistoj cirkulis proverbo: "Post la 'aŭtunkomenco' ĉio jam sen senco." Kaj "aŭtunkomencon" sekvas la sunperiodo "blanka roso"*². Proverbo diras: "Kotonfloro post 'blanka roso' estas sen valoro", tio signifas, ke la tiamaj floroj ne povas doni bonajn fruktojn. Sed post studo de la verko de Prezidanto Maŭ *Pri Kontraŭdiro*, Ĝu Hjueĝang, la estro de la kvara produkta grupo de Jaŭhing-brigado, montris sian dubon pri la kutima opinio. Li diris al la kamaradoj de la teknika grupo: "Prezidanto Maŭ instruas al ni:


'Ĉiu el la du kontraŭdiraj flankoj transformiĝas, laŭ certaj kondiĉoj, unu en la alian.' La vetero post 'blanka roso' fariĝas malvarma kaj la kotonaj floroj ne povas doni fruktojn. Tio estas kontraŭdiro. Sed se ni donas pli multe da nutraĵo al kotonplantoj en la fina periodo por ilin pli fortigi, ni povas krei novajn kondiĉojn por transformi la kontraŭdiron kaj ebligi al la kotonplantoj doni bonajn fruktojn." Oni decidis fari provon en praktiko kaj post "aŭtunkomenco" ĝenerale sterkis la kotonajn plantojn. Kaj dank' al tio, burĝonoj ekfloriĝintaj je 13 tagoj post "blanka roso" donis fruktojn, kiuj krevis de blanka kotonlanugo. Pro tiuj aldonitaj fruktoj post "aŭtunkomenco", la nombro de fruktoj de ĉiu kotonplanto pliiĝis de 11 en la pasintaj jaroj ĝis ĉ. 17.

La bonaj spertoj en pliprodukto kreitaj de diversaj komunumoj kaj brigadoj estis disvastigitaj tra la tuta gubernio post resumo de la gubernia revolucia komitato. Dank' al tio, oni akiris abundegon da grandaj aŭtunaj kotonfruktoj en la tuta kotonkultura regiono, kaj plantoj kreskis ĝenerale pli bone ol en la pasintaj jaroj.

Dum la rikoltado en aŭtuno, la suno brilis super la vastegaj kotonkampoj de Gong-an-gubernio, kaj knabinoj kun blankaj antaŭtukoj kolektis kotonon. Sur kampvojetoj amasiĝis tie kaj tie neĝblanka kotonon. Tra riveroj kaj ŝoseoj ŝipoj kaj aŭtoj plensarĝitaj per kotonon rapidis unu post alia al sensemigejoj kaj ŝtata aĉetstacio. Miraklo de riĉa rikolto aperis en Gong-an-gubernio, kiu trafis grandan katastrofon en 1970. La vastaj amasoj de kadroj kaj komunumanoj gratulis unuj al aliaj pro la riĉa rikolto. Por ke la amasoj ricevu lecionon el la batalo por akiri la riĉan rikolton, la revolucia komitato de la gubernio mobilizis la komunumojn kaj brigadojn de la tuta gubernio por diskuti pri la temo: "Per kio ni venkis la malfacilojn kaj akiris la riĉan rikolton en la jaro de katastrofo?" Retrorigardante la tutan procezon de la batalo, la kadroj kaj komunumanoj diris unuvoĉe: "Estis la granda Maŭzedongpenso, dank' al kiu ni turnis la jaron de katastrofo en tiun de riĉa rikolto!" En tiu jaro, estis ne nur riĉa rikolto de kotonon, sed ankaŭ riĉa rikolto en ideologio. El la praktiko de batalo la komunumanoj komprenis, ke ĉia malfacilo estas venkebla, se nur oni armas sin per Maŭzedongpenso kaj kuraĝas batali kaj kuraĝas venki.

*La tradicia kalendaro de Ĉinio dividas la jaron en 24 sunajn periodojn laŭ la ŝanĝo de la vetero por direkti la agrikulturan aktivadon. "Aŭtunkomenco" kaj "blanka roso" estas du el ili.





VU GIAN:

Novaj Bildoj ĉe la Flava Rivero

LA torentanta Flava Rivero kuras tra la vasta tero de la patrolando. Ĉe tiu rivero, sennombraj heroaj idoj de nia lando batalis ekde antikveco kaj skribis brilan historion de revoluciaj bataloj. En la alta tajdo de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, la Produkta-Konstrua Korpuso armita per Maŭzedongpenso tagnokte batalas sur ĝia vasta Riverkurbiĝa Ebenajo. Per laboremaj manoj ili ekspluatas kaj konstruas la limregionon, desegnante plej novan kaj plej belan bildon.

NEPRE TURNI DEZERTON EN FEKUNDAJN KAMPOJN

Okcidente de la kurbiĝo de la Flava Rivero estas senfina dezerto. De sennombraj jaroj, ventoj pelas sablajn ondojn kaj englutas la ebenajon. En marto 1969, aro da pioniroj estis sendita al la dezerto renkonte al la sablovento.

La vasta batalantaro de la Produkta-Konstrua Korpuso sekvis la piedsignojn de revoluciaj antaŭuloj por krei revoluciajn heroaĵojn. Ili konstruis

kabanojn kaj hisis ruĝajn flagojn. La dormanta dezerto subite bolis de vicleco kaj ĉie ekregis revolucia entuziasmo:

*Tegmentas min ĉielo; kiel lito servas tero.
Al mi aromas rizo miksiĝinta kun sableroj.
Akrigas mian glavon la furiozanta vento;
Sur limareo pretas sangoverŝi mi sen plendo.*

Multaj intelektaj gejunuloj komencis ĉi tie sian batalan vivon. Kiam Ĝu Hiaŭli, dekkelk-jara knabino, forlasis sian riĉan hejmlandon en la sudo de Jangzi-rivero, iuj admonis ŝin: “Vi estas tro juna. Foriru prefere post kelkaj jaroj.” La juna batalantino respondis firme: “Liu Hulan nur 15-jara oferis sian vivon pro la revolucio. Kial mi ne povas iri nun al limregiono por fari tie revolucion? Malgranda estas mia aĝo, sed ne devas esti malgranda mia revolucia volo, nek la paŝo por sekvi Prezidanton Maŭ. La vojon, kiun Prezidanto Maŭ montris al ni, mi iros definitive!”

En frostaj, sabloventaj tagoj, per siaj du manoj kaj ruĝa koro la batalantoj luktis en malfacilaj

kondiĉoj por forporti sablon kaj konstrui kampojn sur la sablomaro. Ĉiu korbo da sablo kaj ĉiu ŝovelilo da tero estas saturitaj de ilia revolucia fervoro kaj alta batalspirito. Malgraŭ la ostotranĉe malvarma vento kunportanta sablerojn, ĉiuj vektoportis sablon kun pezo de pli ol 100 ĝinoj kaj kuris tien kaj reen, demetinte sian vatitan veston. En mallongaj 20 tagoj ili ebenigis pli ol 2,100 sablajn montetojn kaj kulturebligis pli ol 1,200 muojn da tero per siaj laboremaj manoj en la heroa spirito de la Malsaĝa Avo, kiu translokigis montojn. Kaj krome ili "senŝeligis" 300 muojn da alkala tero. Ili unue forskrapis korbojn post korboj la alkalon tavolon kun dikeco de kelkaj centimetroj, due almetis anstataŭe bonan teron kaj sablon alportitajn de alia loko, poste surmetis dikan tavolon da sterko kaj plene miksis ĝin kun la nove almetitaj tero kaj sablo, tiel ke la malgrasa alkala tero estis transformita en fekundajn kampojn.

LA FLORO DE DAĜAJ POMPAS EN DEZERTO

En frua printempo de 1970, kiam senĉese alruliĝis malvarmaj ondoj super la Riverkurbiĝa Ebenajo kaj ĉie en la vastejo estis glacio, komandantoj kaj batalantoj de la Produkta-Konstrua Korpuso decideme rompis la rutinon kaj levis ardan kampanjon por batali kontraŭ la frostita tero kaj frue semi laŭ la alvoko de Prezidanto Maŭ "**lerni de Daĝaj en agrikulturo**". La batalantoj de sepa roto ĉe Dengkoŭ falĉis pli ol cent mil ĝinojn da sovaĝaj herboj kaj bruligis ilin sur la frostitaj kampoj. Post brulado dum du tagoj kaj unu nokto ekmoliĝis la tero sur dekelkaj muoj, kaj ili profunde kaj atente plugis ĝin, tiel ke la semado povis esti farita pli ol duonmonaton pli frue ol kutime.

Ĝuste kiam la plantidoj kreskis prospere, ekblovis ventego. La plantidoj sur la vasta areo ĉe piedo de la montaro Jinŝan estis grave damaĝitaj kaj iuj eĉ estis kovritaj de sablo. Fronte al la serioza katastrofo la komandantoj kaj batalantoj kun nefleksebla spirito sin ĵetis en la intensan batalon por savi kaj replenigi la vunditajn kaj mankantajn plantidojn. Sub la gvido de la politika direktanto Niu Mengkuj la tuta roto mane forskrapis sablon por restarigi la plantidojn sur 800 muoj da tritikaj kaj maizaj kampoj. Sangis iliaj fingroj. La batalantoj diris: "Sangu la fingroj, sed ni ne lasos reduktiĝon de grenprodukto!" Ili sterkis kaj akvumis plantidojn kaj replenigis la vakantajn lokojn. Krome, oni

kreskigis diversajn aŭtunikoltajn plantojn sur kamprandoj, apud fosoj kaj kanaloj. La katastrofo estis tiel venkita.

En Ergedanvan kaj ĝia ĉirkaŭaĵo de Hangginnaŭ-komunumo, ĉie estis blanka alkala tero, kie ne povis kreski antaŭe herboj. La batalantoj volis provi tie plantadon de rizo kaj disvolvi sciencan eksperimentadon. Aŭdinte tion, iuj simple diris skuante sian kapon: "Sole pro la grunda kondiĉo neniam kreskos plantoj!" Sed, neniu malfacilo povis bari la batalantojn armitajn per Maŭzedongpenso.

Ili ripetade studis la instruon de Prezidanto Maŭ "**Malriĉeco igas aspiri al ŝanĝo, entreprenado kaj revolucio**", kaj komprenis ke oni povos turni la sterilan teron en fekundajn kampojn, se oni nur revolucigos sian ideologion kaj plenforte klopodos por "ŝanĝo" kaj "entreprenado". Ili foje kaj refoje faris enketojn, elserĉis koncernajn leĝojn kaj kuraĝe eksperimentis. Ili disrompis la glacian tavolon por fosi kavojn kaj kanalon kaj ebenigis plantidkampojn en frosta kotakvo. Por alkonduki akvon kaj lavi la alkalajn kampojn, la batalantoj laboregis 13 horojn kaj kvarfoje lavadis la kampojn, starante en malvarma akvo profunda pli ol du futojn. Post obstina batalo ili fine sukcesis planti tie tri bonajn specojn de rizo kaj rikoltis meznombro pli ol 750 ĝinojn po muo.

Sub la kuraĝigo de la granda instruo de Prezidanto Maŭ "**Ĉinio devas fari relative grandan kontribuon al la homaro**", la komandantoj kaj batalantoj de la unua roto de iu trupo sur la dezerto Vulcanbuhe formovis en frosta vento 8,500-kubmetran sabloamasegon de sur kampoj por protekti plantojn kaj batalakiri altan produkton. Post tio, ili tuj alportis sterkon por grasumi la grundon kaj fine akiris riĉan rikolton en vasta areo. La pomua produktokvanto sur kampoj de 1,000 muoj kreskis de 220 ĝinoj en la antaŭa jaro al 450 ĝinoj. La produkto de maizo sur 400 muoj donis pomuan rikolton de 800 ĝinoj. La roto estas laŭdata kiel "floro de Daĝaj en dezerto".

ŜTALAJ MŬSKOLOJ KAJ FERAJ OSTOJ

De multaj jaroj la alkaliĝo de grundo estis malnova, grava kaj malfacila problemo de la Riverkurbiĝa Ebenajo vasta centojn da lioj laŭlonge kaj laŭlarĝe. Antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio, pro la ĝenado de la kontraŭrevolucia reviziisma linio de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, tieaj kampoj longe troviĝis en stato kun irigacio sed sen drenado. La

nivelo de subtera akvo leviĝis de jaro al jaro kaj la grundo alkaliĝis en grandaj areoj. Tio grave influis la agrikulturan produkton. En vintro de 1970, vastaj amasoj de batalantoj produktaj-konstruaj komencis popolan militon kune kun malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj por entrepreni akvoutiligajn konstruojn, forigon de alkalo por pliigo de kampoj. Ne timante venton, neĝon kaj froston, ili amase venis de diversaj direktoj al la konstruejoj. Grandaskala kanalsistemo de irigacio kaj dreno estis konstruata sur la bordoj de la Flava Rivero.

Sur iu granda kanalo 40 feraj knabinoj faris malfacilan batalon svingante pezajn picĉojn. Sub la atako de malvarmaj ondoj, la tero frostita estis

malmola kiel fero, kaj la laboro estis tre peniga. Iuj timis pro ili dirante: “Per kio vi knabinoj aŭdacas mordi tiun malmolan oston?” La estro de la plotono de feraj knabinoj Vang Ligjun respondis sonore: “Per Maŭzedongpenso, per niaj ŝtalaj muskoloj kaj feraj ostoj!” En tranĉa frosta vento ili svingis grandajn martelojn kaj picĉojn, sed unu frapo povis fari nur blankan makulon. Vundiĝis al ili la manoj, sed ilia volo estis pli fortika kaj pli firma ol ŝtalo kaj fero. Ili diris: “La Malsaĝa Avo havis firman decidon por translokigi du montojn, kaj ni certe povos finplenumi nian taskon. Se ni havas la obstinecon de la Malsaĝa Avo fosi senĉese la montojn, eĉ feran platon ni traboros!” Kaj ili finis sian malfacilan laboron nur en pli ol dudek tagoj.

Ĝojo de la produktaj batalantoj



Por kompletigi la kanalsistemon necesis konstrui centojn da kluzoj, kulvertoj (subvoja kondukilo por tralasi fluon) kaj pumpstacioj. Kiam oni konstruis pumpstacion de Tajjangmiaŭ en Hanggin-a Posta Flago, estis necese enbati 12 bazpalisojn longajn je 12 metroj tra flusabla tavolo. Iuj ekverŝis malvarman akvon: "Kion ili faros sen altpremaj pumpiloj?" Sed la malfaciloj ne povis timigi la produktajn-konstruajn batalantojn. Ne havante sperton ili konsultis spertoriĉajn maljunajn kamparanojn; sen altpremaj pumpiloj ili anstataŭe uzis eluzitan drilmaŝinon. Por glata trapaso de la tavolo de flua sablo, la batalanto Guo Minghing atente observis ĉe puto la moviĝon de la flua sablo dum sinsekvaj tagnoktoj.

Junuloj enigis gluecan argilon en la truon de drilstango laŭ la mem elpensita metodo kaj venke jungis la fluon sablon. La 12 bazpalisoj estis enigitaj tute laŭnorme.

La vastaj amasoj de produktajn-konstruajn batalantoj malfacile luktis unu vintron kaj konstruis sur la vastaj areoj ambaŭborde de la Flava Rivero seriojn da irigaciaj kanaloj kaj drenaj defluejoj, kluzojn, kulvertojn kaj pumpstaciojn kaj transformis vastajn malebenajn alkalajn terpecojn en senfinajn bonordajn kampojn. La antikva Riverkurbiĝa Ebenaĵo, kiu nun estas banata en la brilo de Maŭzedongpenso, montras sin vivplena en printempa vento.

Riĉa rikolto de maizo.



Hardado de la Ruĝa Koro

ĉe la Piedo de

Vuji-montaro

EN 1966, sub instigo de la usona imperiismo, la indoneziaj reakciuloj foje kaj refoje levis kontraŭĉiniajn aktivadojn kaj kruele persekutis ĉinajn elmigrintojn, en kio ili faris grandan nombron da damnindaj krimegoj. En la tagoj de blanka teroro, la ĉinaj elmigrintoj en Indonezio kun la potenca socialisma patrolando kiel subtenanto kondukis pinto-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ la faŝistaj barbaroj de Suharto kaj inter la batalantoj viciĝis heroa kolektivo de 41 gejunuloj.

Triumfe reveninte al la patrolando en 1966, tiu batala kolektivo de heroaj gejunuloj venis en agrokultivejon ĉe la piedo de Vuji-montaro en Fugian-provinco, kie iam batalis la Ruĝa Armeo de Laboristoj kaj Kamparanoj. Ili profunde komprenis el sia propra sperto, ke estis la instruoj de Prezidanto Maŭ, kiuj donis al ili forton por venki la indoneziajn reakciulojn kaj estas Maŭzedongpenso, kiu orientas ilin dum ilia sana kreskado en ŝtormoj. Tial ili vive studas kaj vive aplikas diligente Maŭzedongpenson en la tri grandaj revoluciaj movadoj de klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado kaj konscie remuldas sian subjektivan mondon kaj la objektivan mondon, pliruĝigante sian koron fidelan al Prezidanto Maŭ.

Ju Jaĝoŭ, junulo kiu sopiradis al Prezidanto Maŭ tage kaj nokte en karcero de indoneziaj reakciuloj kaj skribis sur muro per sia sango 5 ore brilajn ĉinajn ideografiaĵojn signifantajn "Vivu Prezidanto Maŭ", nun estas membro de la Revolucia Komitato de Fugian-provinco kaj glorie aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. Li soife studas Maŭzedongpenson kaj firme memoras la suferplenan historion de sia familio. Ĉiam tenante

en sia memoro la grandan instruon de Prezidanto Maŭ "esti kaj gvidanto kaj ordinara popolano", li atentigadas sin ne disiĝi de la amasoj, ne disiĝi de laboro kaj ne disiĝi de la realo. Kiom ajn okupata li estas en laboro, ĉiufoje kiam li revenas al sia brigado, li tuj iras en kampon por partopreni kolektivan produktan laboron; kaj kiom ajn laca li estas post la taga laboro, li persistas en kontrolo de sia aktivado en la tago per instruoj de Prezidanto Maŭ antaŭ enlitiĝo. Ofte en profunda nokto li ankoraŭ serioze studas verkon de Prezidanto Maŭ kaj notas sian komprenaĵon. Ĉiufoje, kiam supera instanco laŭdis lin, li rememorigis al si la grandan instruon de Prezidanto Maŭ ke "modesteco igas nin progresi kaj fiereco igas nin postresti"; li ne fieriĝas pro sukcesoj kaj klopodas trovi siajn mankojn kaj akceli sian revoluciigon en ideologio kiam li estas laŭdata. En 1969, foje kiam li revenis al la brigado post kunveno en la provinca ĉefurbo, li metis sian tornistran kaj tuj refaldis la pantalonajn tubojn kaj iris vektoportante du sitelojn por sterki kune kun la amasoj. Li vundis al si la piedon, sed malgraŭ tio li persiste partoprenis laboron en la sekvinta tago; ne povante vektoparti, li do kulturebligis virgan teron kune kun la amasoj.

Ekde la tago de sia reveno al la patrolando, la kvardek unu gejunuloj jam aktive partoprenas en la Granda Proletara Kultura Revolucio por sin hardi en la akra batalo inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj. Post alveno al la agrokultivejo, ili tuj forte kritikis, per la faktoj de la persekutado fare de la indoneziaj reakciuloj al ili, la kontraŭrevolucion reviziisman linion disvastigitan de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo



Kiam la 41 elmigrantaj ĉinaj gejunuloj revenis al Ĝangiang-haveno de la patrolando per la ŝipo Guanghua, ilia koro pleniĝis de ĝojego je intervidiĝo kun la karaj samlandanoj.

Liu Ŝaŭki pledantan por paco kun imperiismo, moderna reviziismo kaj ĉiulandaj reakciuloj kaj redukto de subteno al la revoluciaj bataloj de diverslandaj popoloj. Laŭ la grava instruo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “**nepre ne forgesu la klasbatalon**”, ili penetrive kaj persiste faris revolucionan kritikon por plue forigi la venenan influon postlasitan de la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki. Por efektivigi la grandan strategian principon de Prezidanto Maŭ “**sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo**”, ili forte kritikis, en la formoj de murgazetoj, dazibaŭoj, disaŭdigo kaj propaganda grupo, la kontraŭrevoluciajn reviziismajn nigrajn varojn kiaj “tri pliigoj kaj unu fikso” kaj “meti flankajn produktojn super agrikulturon” disportitajn de Liu Ŝaŭki, kaj tiel efike efektivigis la

principon de Prezidanto Maŭ “**disvolvu multflankan entreprenadon kun greno kiel ĉefĉenero**”. Dank’ al tio, ili multe altigis sian konscion pri klasa batalo kaj batalo inter la du linioj. Kune kun la vastaj revoluciaj amasoj, ili levis novan altan tajdon en kulturebligo de virga tero, bonigado de grundo kaj plivastigo de la areo de grenkampoj. Sin direktante per la brilaj filozofiaj pensoj de Prezidanto Maŭ en la produkta praktikado kaj prenante Daĝaj kiel sian modelon, ili batalis kontraŭ dornoj, konstruis ŝtuparajn kampojn ĉe la piedo de Vuĵi-montaro, kulturis sur ili grenplantojn, legomojn, frukt-arbojn kaj aliajn plurajn ekonomiajn plantojn, sin apogante sur la propraj fortoj kaj peneme luk-tante en malfaciloj tiel en frostaj vintroj kiel en varmegaj someroj, kaj per tio faris kontribuon en la konstruado de socialisma nova kamparo.

La monteto Longtoŭgang, kie lokiĝas la kvara taĉmento de la agrokultivejo, estas preskaŭ tute el leŭso. La 41 gejunuloj venis tien por fiksloĝiĝi kaj sub la gvido de la ĉiamvenka Maŭzedongpenso kaj dank' al sia ruĝa koro kaj laboremaj manoj ili kulturebligis pli ol 600 muojn da virga tero sur Longtoŭgang, luktante per arĝente brilaj pioĉoj kontraŭ ŝtonoj. Ili plantis fruktarbojn kaj tearbojn en grandaj areoj kaj tiel metis en novan veston la leŭsan monteton, kiu dormis milojn da jaroj.

Sub la direktado de Maŭzedongpenso, ili komencis batalon por akiri grenon de la leŭsa monteto. Por reformi ĝin, granda kvanto da sterko estis bezonata. Kiel solvi la problemon? Kun la ruĝa trezora libro de Prezidanto Maŭ en poŝo, He Deĵong, membro de la Komunisma Junulara Ligo, kaj aliaj prenis kun si sekmanĝaĵon kaj iris en montaron por serĉi fonton de sterko. Post tritaga laciga serĉado tra montoj, fine ili trovis en iu valo kun primitiva arbaro fekundan humon el putriĝintaj folioj. Poste, ili trovis ankaŭ grandan kvanton da ŝlimo en rivero. Sekve de tio, tuj leviĝis en la tuta taĉmento nova alta tajdo de kolekto de sterko kaj konstruo de kampoj. En tiu batalo, He Deĵong kun grupo da junuloj sub sia gvido luktadis en frosta akvo de vesperiĝo ĝis la 3-a horo matene, laŭte recitante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ: **“Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon.”** Kaj frumatene de la sekvinta tago li denove vigle laboris ĉe tiu loko. Tion vidinte, amasoj ĝojis kore kaj diris kortuŝite: “Deĵong ja estas brava junulo sentima al malfaciloj. Kun tia daŭriganto de la revolucia afero, ni estas trankvilaj.”

En kolektado de sterko kaj konstruado de kampoj, Huang Gieĵen, membro de la Komunisma Junulara Ligo, ĉiam prenis por si pezan laboron. Liaj ŝultroj ŝveliĝis pro portado, sed li ne plendis; kaj li ofte ellitiĝis frue kaj laboris ĝis malfrua horo. Kiam oni admonis, ke li ripozu, li respondis: “Ja por subteni la mondan revolucion ni pliproduktas grenon, tial mi volonte plenumas kun plezuro la laborojn, kiel ajn penigaj ili estas.” Post 20-tagnokta luktado, finfine ili kaj la amasoj de la tuta taĉmento sukcesis krei 27 muojn da rizkampoj sur Longtoŭgang. Poste ili fosis irigaciajn kanaletojn por alkonduki fontakvon. En la pasinta jaro, unuafoje ili akiris riĉan rikolton de rizo ĉe Longtoŭgang kaj la pomua produktokvanto de frua rizo atingis 525 ĝinojn. Samtempe kun tio, ili bonigis grundon de 220 muoj da kampoj kaj

tiel turnis sterilajn kampojn en fekundajn, sur kiuj ili kulturis batatojn, maizojn, arakidojn ktp. kaj akiris riĉan rikolton. Ili diris fiere: “La ruĝa suno brilas super Longtoŭgang, noviĝas homa penso kaj ŝanĝiĝas tero!”

La 41 gejunuloj ofte vizitis la tombejojn de martiroj de la Ruĝa Armeo de Laboristoj kaj Kamparanoj, la historiajn lokojn de la iama hospitalo kaj municia fabriko de la Ruĝa Armeo kaj vizitis veteranajn batalantojn de la Ruĝa Armeo kaj la Ruĝa Gvardio kaj maljunajn malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn kaj petas ilin rakonti historiojn de siaj familioj, vilaĝoj kaj revoluciaj bataloj. En la aŭtuno de 1969, ili venis al Hucun-komunumo por akcepti reedukon de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Maljuna malriĉkamparano Ĝoŭ Minglian rakontis al ili sian familian historion. Li diris, ke en 1930 Prezidanto Maŭ venis al Ninghua kun la Ruĝa Armeo de Laboristoj kaj Kamparanoj sub sia gvido, gvidis nin batali kontraŭ lokaj tiranoj kaj dividi ilian teron. Lia tuta familio partoprenis en la revolucio sub la gvido de Prezidanto Maŭ. Lia pli juna frato aliĝis al la Ruĝa Armeo kaj heroe martiriĝis en iu batalo. Lia patro estis mortigita de la kuomintanga reakciularo per batado. En la malnova socio, la malriĉuloj estis subpremataj kaj turmentataj vivante kiel ŝarĝbrutoj ja pro tio, ke ili ne tenas regpotencon en siaj manoj. Li diris, ke hodiaŭ vivante en feliĉo, ni devas firme memori la mizeron kaj sangajn suferojn de la klaso en la pasinteco, bone daŭrigi la aferon de la revoluciaj antaŭuloj kaj revoluciadi dum la tuta vivo strikte sekvante Prezidanton Maŭ.

Sub la nutrado de Maŭzedongpenso, la 41 gejunuloj revenintaj al la patrolando nun sane kreskas. Hodiaŭ, iuj el ili fariĝis membroj de la provinca aŭ gubernia revolucia komitato, iuj fariĝis kadroj baznivelaĵ de la agrokultivejo kaj iuj jam glorie aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. 23 el ili membriĝis al la Komunisma Junulara Ligo kaj 58 homfojejn nombris la elektitaj delegitoj, kiuj ĉeestis kongresojn de aktivuloj de la provinco, subprovinco, gubernio kaj la agrokultivejo en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso. Lastatempe, du membroj de tiu heroa batala kolektivo Ju Jaĝoŭ kaj Caj Kiangli estis elektitaj de la revoluciaj amasoj de la agrokultivejo por studi en socialisma novtipa universitato. Ili esprimis: “Ĉion ni disponigos al la Partio kaj sur malsamaj batalaj postenoj ni laboros nek per renomo, nek por profito, sed por daŭre revolucii kaj fari novajn kontribuojn al la popolo.”


Urbo de Silko



Aŭtomata kokon-bobena maŝino fabrikita de laboristoj



Tang Kiaüfeng, laboristino de kvin bonoj



La silkaj produktaĵoj de Hangĝou, kiu estas konata kiel "Urbo de Silko" en nia lando, ĝuas renomon tra la tuta mondo. Sub la direktado de Maŭzedongpenso, la vastaj amasoj de silkoteksistoj kun plena entuziasmo kaj alta batalvolo produktas per siaj diligentaj manoj pli kolorriĉajn silkoteksiaĵojn.

Sub la standardo de unuiĝo kaj venko de la Naŭa Kongreso de la Partio, la silkaj laboristoj kun la revolucia spirito kuraĝi pensi kaj kuraĝi agi faris serion da teknikaj renovigoj al la teksiloj kaj kreis elektran teksilon de progresinta nivelo. Tiu nova maŝino produktas ne nur rapide kaj unuece, sed ankaŭ multe plialtigas la kvaliton de la produktaĵoj. Krome, oni aplikas ankaŭ la novan teknologion de unuproceda tinkturado, dank' al kio oni ŝparis 11 paŝojn kaj grandskale altigis la produktokvanton.

Nun la specoj de silkoteksiaĵoj tie produktitaj plimultiĝis de kelkdek antaŭ la Liberiĝo ĝis pli ol 500 hodiaŭ. La novaj specoj de silkoteksiaĵoj facile vendiĝas en kaj ekster la lando kaj estas tre ŝatataj de la klientoj.

Angulo de la silkoteksejo





La vastaj laboristaj amasoj vive studas kaj vive aplikas Maŭzedongpenson kaj senĉese akiras novajn atingojn en praktikado.






Maldekstre:
La nova kaj malnova la-
boristinoj lernas unu de
la alia kaj klopodas levi
sian teknikan nivelon.

Dekstre:
Dank' al florado de
teknikaj renovigoj, mul-
te altiĝis la laborefiko kaj
la kvalito de la produk-
taĵoj.

Sube:
Laboristoj, kadroj kaj
teknikistoj kontrolas la
kvaliton de la produkta-
ĵoj.







Belaj silkoteksaĵoj baldaŭ liverotaj al merkato

Verkoj de Maŭ Zedong

(En Esperanto)

(Parto de la Verkoj el la Periodo 1941-1945)

Antaŭparolo kaj Postskribo al la <i>Kamparaj Enketoj</i>	16 pĝ.
Reformu Nian Studon	20
Parolado ĉe la Asembleo de Rezentantoj de la Ŝenhi- Gansu-Ninghia-a Limregiono	12
Ĝustigo de la Partia Laborstilo	36
Kontraŭ Partia Stereotipaĵo	36
Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an	60
Kelkaj Problemoj pri Metodoj de Gvidado	16
Organiziĝu!	20
Nia Studo kaj la Aktuala Situacio	32
Servu al la Popolo	16
Ni Devas Ellerni Ekonomian Laboron	20
Pri Koalicia Registaro	136

Eldonitaj de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio
Distribuas la Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo,
Pekino, Ĉinio

Aĉetu ilin ĉe lokaj perantoj aŭ rekte ĉe la Libroservo de
Ĉina Esperanto-Ligo, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio



Alta Produkto de Rizo en Nordo de Huajhe

GAN ĈAŬ

ESTAS rezulto de senĉesa studo de dialektika materiismo kaj energia rompadado de ideismo kaj metafiziko, ke nia Kultivejo de Kotonaj Bonspecioj de Sijang-gubernio de Giangsu-provinco sukcesis en provado de rizkulturo ĝis efektivigo de du rikoltoj de rizo kaj tritiko en unu jaro, kaj akiris altan produkton de greno.

ROMPO DE "KONDIĈISMO"

En Ĉinio cirkulas malnova diro: "Rizo ne kreskas norde de Huajhe." Post la Liberiĝo, sub la gvido de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, la popolo en nordo de la rivero Huajhe rompita la rutinon kaj komencis kulturi rizon. Sed la produktokvanto estis nealta. En 1963, kiam nia kultivejo provis kulturi rizon, ni renkontis oponon de konservativaj kaj rutinaj fortoj. Ili opiniis, ke la kondiĉoj norde de Huajhe estas malpli bonaj, ekzemple tie la senprujna periodo estas malpli longa ol tiu de sudo de Jangzi-rivero, la sableca grundo tralastas akvon kaj sterkon kaj ne estas tiel bona kiel la argila grundo, la terkulturistoj neniam kulturis rizon kaj ne estas tiel spertaj kiel tiuj en sudo de Jangzi-rivero ktp.

Ĉu oni devas konsideri la kondiĉojn? Jes. Sed kiel ilin konsideri? Ni studis la filozofiajn verkojn de Prezidanto Maŭ kaj analizis la kondiĉojn en tri flankoj:

Antaŭ ĉio, ni konsideris la kondiĉojn en ilia tuto, nome ne nur vidi la malfavoran flankon, sed ankaŭ la favoran. Prezidanto Maŭ instruas al ni: "En la mondo, aferoj estas komplikaj kaj deciditaj de multaj faktoroj. Ni devas rigardi

problemojn de diversaj flankoj kaj ne nur de unu."

La senprujna periodo norde de Huajhe estas ne tiom longa, tial la kreska periodo de rizplanto estas limigita kaj des pli ne estas sufiĉe da tempo por kulturi tritikon sur la sama kampo tuj post rikolto de rizo en unu jaro. Tio estas malfavora flanko de la afero. Sed troviĝas ankaŭ avantaĝa flanko, ekzemple la tempo de sunbrilo estas longa kaj serenaj tagoj multaj, kio utilas al fotosintezo. Krome granda estas la diferenco inter la temperaturoj de tago kaj nokto, kio favoras al akumulo de nutraĵo, kaj malmulte okazas katastrofoj de tajfuno, torentpluvo, malutila insekto kaj plantmalsano, sekve relative stabilaj rikoltoj estas certigitaj.

Due, oni devas konsideri la kondiĉojn aktive, nome ne nur konsideri la malfavorajn kondiĉojn, sed ankaŭ konsideri, ke ili estas venkeblaj kaj ŝanĝeblaj. Prezidanto Maŭ instruas al ni: "**Sub specifaj kondiĉoj, malbona afero povas konduki al bonaj rezultoj.**" Kvankam en la regiono norde de Huajhe estas iuj ŝajne malfavoraj kondiĉoj, tamen oni povas turni ilin en favorajn kondiĉojn, post sia klopodado. Ekzemple la sableca grundo facile tralastas akvon kaj sterkon, tamen, se oni ĝin bonigas per enmikso de sedimenta tero, ĝi ne nur povos konservi akvon kaj sterkon sed ankaŭ certgrade havas filtreblecon por akvo kaj aero, kio favoras al la kresko de radikoj de rizplantoj. Se oni ne scipovas teknikon, nove kulturante rizon, oni ja povas tion lerni dekomence kaj facile akceptos novajn teknikojn sen kateno de rutinaj reguloj. La kondiĉoj ne estas neŝanĝeblaj kaj la ŝlosilo troviĝas en la sinteno de la homoj.



Kampranda kunveno por interŝanĝi komprenaĵojn en studo de la filozofiaj pensoj de Prezidanto Maŭ.

Trie, oni devas konsideri la kondiĉojn lige kun la rilato inter homoj kaj objektoj, ne nur vidi objektojn, sed ankaŭ homojn. Tio ĉi estas plej grava. Prezidanto Maŭ instruas al ni: **“Tio, kio decidas, estas homoj sed ne objektoj.”** La kondiĉoj estas kreitaj de homoj. Se estas homoj, malfavoraj kondiĉoj povas esti transformitaj kaj favoraj kondiĉoj plene utiligitaj. Kredantoj de “kondiĉismo” konsideras nur objektojn, sed ne homojn, rigardante homojn kiel sklavojn de la naturo kaj tute neante la subjektivan iniciativon de homoj.

Post la supra analizo, ni ĉiuj starigis firman decidemon kaj memfidon por batalakiri altan produkton de rizo en la regiono norde de Huajhe. Post klopodado en kvin jaroj, nia kultivejo sukcesis en prova kulturado de rizo kaj la produkto-kvanto rapide kuratingis tiun de la regiono sude de Jangzi-rivero.

ROMPO DE LA TEORIO DE “FIKSECO”

La rompo de “kondiĉismo” kaj starigo de memfido tamen ne signifas akiron de alta produkto, kies eblecon oni devas transformi en realecon tra praktiko. Dum tiu procedo, iris tre akra

batalo inter la du specoj de mondkonceptoj kaj metodologioj. Ofte okazis al ni, ke post transplantado, la plantidoj kreskis ne tre ideale: aŭ ili kreskis ne egale kaj iuj el ili kreskis nebone aŭ tre malbone; aŭ okazis natura katastrofo, kiu malhelpis la kreskon de la rizplantoj. En tia kazo, ofte ŝanceliĝis la memfido de iuj, malaltiĝis ilia fervoro kaj ili diris: "Ni jam faris kion ni povis, tamen ni ankoraŭ ne povas ŝanĝi la staton. Ni ja estas en senhelpeco kontraŭ tio." Ktp, ktp.

Ĉu oni jam faris ĉion eblan? Ne. Ĉu la stato estas neŝanĝebla? Ne tia estas la afero. Ĉu oni ne povas trovi alian rimedon? Jes, oni povas. La "senhelpeco" signifas "fikseco".

La kondiĉoj de la agrikultura produkto estas tre variaj kaj ĉiam noviĝas la kreska stato de la plantoj, por kiuj ĉiam ekzistas ebleco de transformado kaj por tio la homoj povas multon fari aktive. En la pasintaj kelkaj jaroj, kvankam la rizplantoj de nia kultivejo kreskis ne egale bone en la komenca periodo, tamen ni povis senescepte akiri altan produkton, se ni nur persistis en zorga flegado en la meza kaj fina periodoj de ĝia kreskado. La rizplantoj de nia kultivejo estis transplantitaj aŭ printempe aŭ post la rikolto de tritiko. En malsamaj okazoj la tempoj de transplantado diferencis je kelkdek tagoj, kaj la diferenco de la nombroj de spikoj atingis iafoje la proporcion de du kontraŭ unu. Tamen, se oni alprenas diversajn aranĝojn laŭ bezono, oni povas fine atingi same pomuan produktokvanton de ĉ. mil ĝinoj. Ni ankaŭ ofte renkontis tian aŭ alian naturan katastrofon. Foje en la meza tagdeko de julio kampo de meza rizo subakviĝis dum unu semajno. Nur la folipintoj restis super la akvo kaj ilia suba parto tute flaviĝis. Sed dank' al zorga flegado, ni ankoraŭ akiris meznombran produktokvanton de pli ol 900 ĝinoj po muo. Praktiko montris, ke la nombro de spikoj de rizplantoj estas deciditaj en la tempo de apero de junaj tigoj, la grandeco de la spikoj en tiu tuj antaŭ ĝia elvolviĝo kaj la pezo de la grajnoj en la maturiĝa periodo. Unuvorte, estas tre longa periodo por ŝanĝi la staton de la kreskado. Oni ne povas paroli pri "fikseco" antaŭ rikolto. Do la teorio de "fikseco" tute ne konformas al la reala stato de la kreskado de rizplantoj.

Kompreneble, oni devas venki ankaŭ alian specon de teorio de "fikseco". Vidinte ke rizplantoj bone kreskas, iuj opiniis ke riĉa rikolto estas jam certa, kaj ne donis multan atenton pri

flegado. Ankaŭ tio estas erara. Kun tia sinteno oni ne povas certigi al si altan produkton, nek peni por akiri ankoraŭ pli altan produkton, sed eĉ povas okazi ke la ebleco de alta produkto turniĝus en ĝian malon.

Per rompo de la teorio de "fikseco", plena disvolvo de subjektiva aktiveco de la homoj, necedo al malfaciloj, daŭra streĉiĝo ankaŭ en favora situacio, kaj ĉiama zorgado por atingi favoran "transformiĝon", oni povas turni malfavoron en favoron, malekvilibron en relativan ekvilibron, malaltan produkton en altan produkton kaj altan produkton en ankoraŭ pli altan produkton. En la pasintaj kelkaj jaroj, ĝuste tiamaniere nia kultivejo senlace klopodis sen distriĝo en kulturado kaj flegado de la plantoj kaj altigis la pomuan produktokvanton de meza unurikolta rizo sur granda areo ĝis mil ĝinoj.

[ROMPO DE LA TEORIO DE "ATINGO DE LA KULMINO EN PLIPRODUKTO"]

Kiam la pomua produktokvanto de rizo de nia kultivejo atingis mil ĝinojn, iuj diris: "Ni atingis la kulminon en pliprodukto." Tio spegulas ideisman kaj metafizikan penson, laŭ kiu la disvolviĝo de la aferoj estas limigita kaj senŝanĝa. Homoj kun tia vidpunkto diris: "La altproduktaj specioj disvastigitaj ĉe ni, ekzemple 'Nongken n-ro 57', apartenas al la tipo kun multaj, malgrandaj spikoj. Ĝia avantaĝo estas la multeco de spikoj, kies nombro en unu muo povas atingi ĉ. 300,000. Se la nombro estas pli granda, tio malutilas al tralaso de aero kaj lumo, malbone influas al la kresko de la grajnoj kaj ofte kaŭzas kliniĝon kaj malpliprodukton de la plantoj." En tiu rilato, la argumento ŝajnas pravigebla. Tamen, se ni rigardas la aferon laŭ dialektika vidpunkto, ni trovos ke tiu argumento estas kripla. La produktokvanto de rizo estas decidita ne nur de la nombro de spikoj, sed ankaŭ de ilia grandeco (t. e. la nombro de la grajnoj) kaj la pezo de iliaj grajnoj kaj aliaj faktoroj. Estas vere, ke la altigo de la produktokvanto de rizo "Nongken n-ro 57" ĉefe dependas de plimultigo de la spikoj. Sed kiam la nombro de spikoj atingis certan limon, oni jam devas trovi aliajn rimedojn por plu pliigi la produkton. Ĉu oni ne povas atingi tion per pligrandigo de la spiko? En longa observo ni trovis, ke ordinare ĉiu spiko de tiu specio portas 60-70 grajnojn. Sed troviĝas ankaŭ spikoj kiuj

portas 80-90 aŭ eĉ pli ol cent grajnoj. Ŝajne, la grandaj spikoj estas maloftaj. Sed Prezidanto Maŭ instruas al ni: **“Kio estas aparta en unu kazo, fariĝas ĝenerala en alia.”** Se oni nur trovos la leĝon de formiĝo de grandaj spikoj, tiam oni povos ŝanĝi la apartecon en ĝeneralecon.

Post multaj eksperimentoj, fine ni trovis vojon por akiri grandajn spikojn. Surbaze de multnombro de spikoj ni klopodis por akiri grandajn spikojn, kaj ni ne nur sukcesis certigi 300,000 spikojn po muo, sed ankaŭ pliigis la nombron de grajnoj sur ĉiu spiko ĝis pli ol 80. Tiel la meznombra pomua produktokvanto atingis 1,200-1,300 ĝinojn kaj en iu parcelo ĝi atingis 1,412 ĝinojn.

Kiam ni atingis pomuan produktokvanton de pli ol mil ĝinoj de rizo en unu rikolto, ni zorgis ankaŭ pri sinsekva kulturo de rizo kaj tritiko en unu jaro. Iuj opiniis, ke estas malfacile atingi per tio altan produkton pro la nefavora klimato en la regiono norde de Huajhe, tute egale, ĉu tritiko sekvas rizon aŭ rizo sekvas tritikon. Ni faris analizon laŭ la vidpunkto de “divido de unu

en du”, kiun instruas al ni Prezidanto Maŭ, kaj vidis, ke kvankam la tempo ne tiom sufiĉas por semi tritikon post rikolto de rizo kiel tiu disponebla por frue semita tritiko, tamen oni povas tion kompensi per disvolvado de la revolucia entuziasmo de homo. Kaj aliflanke ankaŭ troviĝas favoraj kondiĉoj, ekzemple la rizkampoj estas ebenaj kaj facile irigacieblaj kaj dreneblaj, kio estas favora kondiĉo por altprodukto de tritiko. En 1970, ni faris zorgan flegadon de tritiko kaj sukcesis kulturi rizon kaj tritikon en sinsekvo kaj tiel malfermis novan vojon por pliprodukto de greno en la regiono norde de Huajhe.

Prezidanto Maŭ instruas al ni: **“La historio de la homaro estas historio de kontinua disvolviĝado de la regno de neceso al la regno de libero.”** Pri la objektivaj leĝoj de alta produkto de rizo en la regiono norde de Huajhe, ni akiris nur konon unuapaŝan kaj relativan, kaj ankoraŭ estas senfina latentata ebleco eltrovota. Ni firme decidis pli bone studi la brilajn filozofiajn pensojn de Prezidanto Maŭ, senĉese rompi ideismon kaj metafizikon kaj starigi materiisman dialektikon por fari novajn kontribuojn al la revolucio.

Riĉa rikolto de rizo





La magazeno Ĉaujŝang

Vizito al Nanning

HJU LIN

ANTAŬ nelonge ni vojaĝis de nordo al sudo de la patrio por viziti la urbon Nanning, Guanghi. Kiam ni venis al tiu nove plivastigita bela urbo, nia koro ekondis de emocio. Ni iris sur la plej altan lokon en la Popola Parko por havi panoraman vidon de la tuta urbo. La tute novaj grandaj fabriksdomoj de la industria kvartalo sude de la rivero Jonggiang etendiĝas dekelkajn kilometrojn foren ĝis la montoj laŭ la aleo Dongfanghong. Norde de la rivero estas kruciĝantaj stratoj kun ondoj da homoj kaj granda vicleco. Multaj domoj kuŝas unu apud alia ĉe la rivero.

ŜANĜIĜO DE NANNING

Antaŭ la Liberiĝo, Nanning estis la nesto de Guanghi-aj militaristoj de Kuomintango. Tiam en la urbo estis nur kvin mallongaj kadukaj stratoj, kaj miloj da malriĉaj familioj loĝis apud haladzaj lagetoj kaj kanaletoj. Sur senordaj stratetoj estis

amaso da opifumejoj kaj hazardludejoj. La trompaj dekretoj pri malpermeso de opifumado kaj hazardludado tute ne povis kaŝi la politikan putriĝon de kuomintangaj reakciuloj. “Neebenaj estis la vojoj, ne helaj la elektraĵ lampoj kaj ne pura la trinkakvo”, jen la mizera stato de Nanning antaŭ la Liberiĝo.

La 4-an de decembro de 1949, Nanning estis liberigita! La malnova urbo akiris novan vivon. De la 21 jaroj, precipe post la batala bapto de la Granda Proletara Kultura Revolucio, Nanning ŝanĝiĝis de tago al tago kaj aspektas nun pli vigla kaj prospera.

Kie estas la noveco de Nanning? Ni iris en la centron de la urbo. La rekta larĝa stratego Ĉaujŝang kondukas al la fervoja stacio, ambaŭflanke de ĝi staras unu apud alia grandaj vendejoj, gastejoj kaj tiel plu, kune kun la larĝaj stratoj Hinhua, Hinvu, Miezi, Giefang kaj Hiangjang formas vigran

urbocentron. Respondecaj kamaradoj de urba konstruado diris al ni, ke tiuj stratoj ĉiuj estas rekonstruitaj de konstruaj laboristoj de Nanning lastatempe.

Antaŭ kelkaj jaroj, sur la haladza lago ekster la norda pordego de la urbomuro, la popolo de Nanning konstruis la placon Ĉaŭjang, kiu povas enteni ĉirkaŭ 200 milojn da homoj.

Irante suden laŭ la stratego Ĉaŭjang, ni vidis grandan ponton. Ĝi estis projektita kaj konstruita de Nanning-aj laboristoj en 1964, por plenumi la Ĝeneralan Linion de Prezidanto Maŭ "Streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie". Ĉiutage, plensarĝitaj aŭtoj senĉese kuradas suden kaj norden sur la ponto inter la urbo kaj kamparo.

Supre de la rivero estas la malnova varfo Bejda. Tieaj maljunaj laboristoj diris, ke antaŭ la Liberiĝo tie estis kvazaŭ infero: laboristoj loĝis en dometoj malvastaj kiel "kolombejoj" kaj prenis manĝojn por porkoj, la varfo estis tute kaduka. Nun ĝi estas novigita. Sur la bordo majeste staras la do-

meĝo de transporto. Motorŝipoj navigas sur la rivero. Vespere, la lampoj de laboristaj loĝdomoj speguliĝas en la rivero kaj prezentas aparte belan pejzaĝon.

SUKCESOJ EN INDUSTRIO

Antaŭ la Liberiĝo Nanning estis urbeto kun industrio tute subevoluinta. Ĝi havis tiam nur kvar privatajn fabrikojn de alumeto, elektra energio, akvo kaj preso. Eĉ najloj, viŝtukoj kaj tualeta papero estis enportitaj de aliaj lokoj.

En la 21 jaroj post la Liberiĝo, sub la direktado de la granda principo de Prezidanto Maŭ "sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj", la laboristoj de Nanning jam turnis la mizeran, konsuman urbon kun tre malforta industrio en industrian urbon kun modernaj fabrikoj de ŝtalo, metalurgio, maŝinkonstruado, kemio, ŝpino kaj tekso, elektrono, manĝaĵo k.a. De la lastaj jaroj, novaj fabrikoj, minejoj kaj malgrandaj fabrikoj funkciigitaj de loĝantoj senĉese aperas grandnombre

Diversaj ĉiutagaj bezonaĵoj estas haveblaj ĉi tie.



en Nanning. Nun Nanning jam povas pogrande produkti mantraktorojn, rizplantojn, dizelajn kamionojn, biciklojn, stebmaŝinojn, kiuj tute mankis al ĝi en la pasinteco. Kaj kotonŝtofoj, silko kaj ledo havas sian merkaton en kaj ekster la lando.

Ni vizitis la gravan bazon de industrioj de Nanning. Antaŭe tie estis montetoj kovritaj de ŝtonoj. Antaŭ kelkaj jaroj, por disvolvi lokajn industriojn, la armeanoj kaj popolanoj de Nanning forportis la ŝtonojn, ebenigis montpintojn, konstruis ŝoseon kun larĝeco de pli ol 20 metroj kaj konstruis multe da fabriklomoj, tiel ke formiĝis tie la industria bazo de Nanning.

Tie ni vizitis la Nanning-an Televidilan Fabrikon. Respondeca kamarado de tiu fabriko diris al ni: "En la pasinta jaro, strikte sekvante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ 'klopodu bone fari la disaŭdigan laboron por servi al la popolo de la tuta Ĉinio kaj la popoloj de la tuta mondo', la

laboristoj de tiu ĉi fabriko proponis kampanjon de elektrona industrio al la tuta laboristaro de la urbo. Al la propono tuj respondis fervore pli ol 30 fabrikoj, minejoj kaj entreprenoj, kaj dekmiloj da laboristoj partoprenis la kampanjon." Nun la fabriko jam pogrande produktas televidilojn kaj la televida stacio jam komencis transsendadon de programoj por propagandi Maŭzedongpenson. Samtempe kun tio, Nanning-aj laboristoj cetere produktas pli ol 30 specojn de novaj produktoj kiaj solkristala forno, duonkondukilaj radioriceviloj, regata silicio, transistoroj, aliaj elektronaj elementoj kaj diversaj mezur-instrumentoj. La impeta progreso de elektrona industrio de Nanning estas nova karaktero de ĝia industria fronto.

Ni kun granda ĝojo pririgardis la fandadon per antracita pulvoro en Maŝinfabriko Giangong. Iu maljuna laboristo kondukis nin al granda fandforno. Ni aŭdis nur bruadon de blovilo kaj krakadon de antracita pulvoro. Antaŭ ni fluis likva

Malgrandaj traktoroj produktitaj de la Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj



fero kaj alte saltis flamoj. Kia impona bildo prezentiĝis antaŭ niaj okuloj! En la pasinta jaro, dank' al la direktado de la brila filozofia penso de Prezidanto Maŭ, la laboristoj de tiu ĉi fabriko kreis la novan teknikon de fandado per antracita pulvoro anstataŭ koakso, kio malfermis novan vojon nekonektan de la burĝara teknologio, kaj faris novan kontribuon por la revolucio kaj produkto.

PROSPERA KOMERCO


Vesperiĝis. De la granda kontraŭinunda digo en orienta antaŭurbo, ni revenis laŭ la bordo de la blua ondetanta rivero Jonggiang por pririgardi la noktan Nanning. Antaŭ la Liberiĝo ĉi tie estis nur kvin kadukaj stratoj, sur kiuj maldensaj lampoj timige trembrilis en la nokto kvazaŭ vaglumoj, kaj aŭdiĝis nur bruoj el opifumejoj kaj hazardludejoj. Sed, nun ĉi tie estas hele lumata, kaj en la Magazeno Ĉaŭjang, la Domo de Metalajoj kaj la granda bazaro

de Miezilu k.a. situantaj ambaŭflanke de la larĝa, vigla strato fluas tien kaj reen homamasoj.

Ĉaŭjang estas la plej granda magazeno en Nanning, en kiu estas vendataj pli ol 12,000 specoj de varoj, kolorriĉe kaj okulloge montrataj: diversaj vivnecesaĵoj, drapoj, silkaĵoj, kotonŝtofoj, kemifibraĵoj, plastaĵoj, emajlaĵoj, kulturaj bezonaĵoj kaj aliaj. La vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj ĝoje trovas tie siajn bezonaĵojn. La sekretario de la partia filio de la magazeno diris al ni: "En la pasinta jaro nia lando akiris la naŭan sinsekvan riĉrikolton kaj ankaŭ la produkto de vivnecesaĵoj multe kreskis. Tiuj estas nur parto." El tio ni vidis la bonegan situacion de la komerco en Nanning.

Samtempe kun la fluga disvolviĝo de industrio, ankaŭ agrikulturaj kaj flankaj produktaĵoj liveris riĉan provizon. La antaŭa kotoplana rubejo nun transformiĝis en grandan bazaron de produktaĵoj

Laborejo de la Nanning-a Silka Fabriko





Angulo de fruktvendejo

de agrikulturo kaj flankaj okupoj. La bazaro estas plena de hombruo kaj lumo. Tie troviĝas diversaj fruktoj kaj lokaj produktaĵoj. En vendejoj de viando kaj flankaj manĝaĵoj estas porka, bova kaj ŝafa viando, freŝaj fiŝoj, kolbasoj, rostitaj porkaĵoj, ovaĵoj k.a. Kvankam estis vintro, sed la bazaro liveras abundajn legomojn. Granda ŝenoprado, tomato, rafano, ĉina brasiko, kapobrasiko k.a. estis tre malkaraj. De mateno ĝis nokto venadas al la bazaro multaj aĉetantoj. Tio plene spegulas la belan bildon de nova abunda rikolto.

La Granda Proletara Kultura Revolucio vekis la gigantan revolucionan energion de la vastaj amasoj de komerca fronto. Sekvante la instruojn de Prezidanto Maŭ “**disvolvi la ekonomion kaj garantii provizadon**” kaj “**tutkore kaj tutanime servi al la popolo**”, ili senĉese plibonigas sian servon. Kiam ni enpaŝis en la restoracion Ĉaŭĵang situantan en la urbocentro, servantino varme prezentis al ni, ke la restoracio servas tagnokte kaj estas varme laŭdata de laboristaj amasoj de nokta skipo. En la kuranta jaro reprezentanto de la “sennokta restoracio” partoprenis la Kongreson de Aktivuloj de Viva

Studo kaj Viva Apliko de Maŭzedongpenso de Nanning.

Por detale koni la staton de merkato de Nanning antaŭ la Liberiĝo, ni vizitis emeritiĝintan laboriston Liaŭ Damin. Li diris kun profunda kortuŝeco: “Antaŭ la Liberiĝo, sub la regado de kuomintangaj reakciuloj, en Nanning estis nur kelkaj agoniantaj butikoj. Post la Liberiĝo mi propraokule vidas la gigantan ŝanĝiĝon de la merkato. Vigle prosperas la socialisma komerco. Kiel multajn pensojn vekas la komparo de la malnova socio kun la nova!” Rememorante la amaran vivon en la malnova socio kaj ĝuante la hodiaŭan feliĉan vivon, la maljuna laboristo, kiu estis rigardata kiel “plebano” en la malnova socio, emociiĝis ĝis larmoj kaj laŭte kriis: “Vivu Prezidanto Maŭ!”

Pompaj floroj de ideologio kaj politiko certe donas abundajn ekonomiajn fruktojn. Sub la nutrado de la granda Maŭzedongpenso, la komerco de Nanning vigle disvolviĝas kaj senĉese aperas novaj homoj kaj novaj aferoj, kio profunde spegulas la senkomparan superecon de la socialisma socio.

Malpeza Kavalerio Agrikultursubtena sur Rivero

SUR la rivero Bejlunhe en la suda limregiono de nia lando aktivas grupo da boatoj en servo al la agrikultura produkto de montregiono. Ĝi apartenas al la surrivera transporta stacio de Donghing-a Diversnacia Aŭtonoma Gubernio.

Granda parto el la 26 boatoj de la grupo havas ŝarĝkapablon de nur malpli ol unu tuno taŭgaj por veturi sur malprofundaĵo. Sed ĉiuj ĝuang-aj, jaŭ-aj kaj han-aj boatistoj de la grupo faris grandan kontribuon al varinterŝanĝo inter urboj kaj kamparo kaj en subteno al la agrikultura produkto de la montregiono. Dum la pasintaj dek jaroj, tiu grupo transportis proksimume 200,000 tunojn da materialoj por la montregiono kaj ĉiu boato veturis pli ol 300,000 liojn. Ĝi ĉiujare superplenumis transportan taskon asignitan de la ŝtato kaj fariĝis "malpeza kavalerio agrikultursubtena" en rivera transportado.

Bejlunhe estas rivero kun multaj malprofundaĵoj kaj danĝeraj lokoj kaj tial estas malfacile veturi sur ĝi. En la pasinteco, sub la influo de la kontraŭ-revolucia reviziisma linio de la renegato Liu Ŝaŭki "taksi alte modernan metodon kaj taksi malalte la tradician", iuj opiniis, ke aŭtoj jam povas atingi ĉiujn komunumojn de la regiono de la montaro Ŝivandaŝan, do ne necesas tiuj boatoj, kiujn veturigi estas tro malfacile. Post studo de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj senĉesa disvolvo de revolucia amasa kritiko, la boatistoj komprenis, ke nur se oni "iras per du kruroj", oni povas konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie. Se oni forlasas boatojn ĉe ekuzo de aŭtoj kaj forlasas la rivervojon ĉe malfermo al trafiko de la ŝoseo, tio estas "irado per unu kruro", kaj laŭ tiu metodo oni ne povas konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie. Ili firme deklaris, ke ili en formika persisto daŭre transportados por la socialisma konstruado kaj per tio kontribuos al la agrikultura produkto.

Dum la sezono de torentego, ili trenas boatojn per kablo trans malprofundaĵojn, kaj dum sezono de akvomalabundeco ili dragas la malprofundaĵojn kaj puŝas la boatojn trans ilin. Ili ĝuste tiel obstine laboras kaj garantias veturadon dum la tuta jaro, transportante kemian sterkon, insektmortigilon, semojn, agrikulturajn instrumentojn kaj konstruajn materialojn en Ŝivandaŝan kaj grenon kaj lokajn produktaĵojn el la montregiono por subteni la socialisman konstruadon de la patrolando.

En printempo de 1970, serioza sekeco atakis la montregionon. La grupo akceptis la taskon transporti akvoradajn pumpilojn al la montaro por subteni tie la batalon kontraŭ sekeco. Tre malfacile estis veturi sur malprofunda riverakvo kaŭze de sekeco. Sed la boatistoj diris: "La vojo estas formita sub la piedoj de homoj, ni firme decidus venki ĉiujn malfacilojn kaj plenumi la taskon." Ĉe ĉiu malprofundaĵo, ili portis la pumpilojn de sur la boatoj por poste puŝi la malplenajn boatojn trans la malprofundaĵojn. Tiel ili finfine portis la pumpilojn al la montregiono, kaj per tio subtenis la tieajn komunumanojn en ilia batalo kontraŭ printempa sekeco kaj ebligis ke la printempa plugado ne estis prokrastita.

Foje, kelkaj malproksimaj produktaj brigadoj urĝe bezonis kvanton da kemia sterko, sed pluvego torentadis en sinsekvaj tagoj kaj malgrandaj boatoj ne povis veturi. Tamen, rompante la rutinan regulon la boatistoj kuraĝe ekveturis spite al ondanta fluego. Kiam ili trapasis iun danĝeran malprofundaĵon, iu boato plensarĝita per kemia sterko estis repuŝita de la torento kaj rekte puŝiĝis al rifo. Estis tre danĝere. Ĉe tio la veterana boatisto Lin Ĵenŝeng saltis sinforgese en la torenton kaj per sia korpo baris la boaton kaj tiel garantiis ĝian sekurecon. Tamen li mem vundiĝis je talio. Post kvintaga



Boatoj de la Donghing-a Surrivera Transporta Stacio portantaj materialojn por subteni agrikulturon survoje al Ŝivandaŝan.

penega klopodado la boatistoj fine transportis la kargon al la produktaj brigadoj, plenumante la taskon neplenumeban por aŭtoj.

Al kiu servi estas la problemo, kiun la boatistoj firme tenas en la cerbo. Foje la boatoj jam estis ŝarĝitaj per ĉiutagaj bezonaĵoj kaj pretis ekveturi. Subite la supera instanco sciigis ilin, ke kvanto da insektmortigilo devas esti urĝe transportata al la montregiono. Laŭ la tarifo, transporta kosto de agrikulturaj produktaj rimedoj estas malpli granda ol tiu de ĉiutagaj bezonaĵoj je 50%. Iuj el la boatistoj opiniis, ke oni preferu unue transporti ĉiutagajn bezonaĵojn kaj poste insektmortigilon, ĉar transportado de la lasta havas multajn malfacilojn kaj krome, ĝia transporta kosto estas malalta. Aliaj tamen opiniis, ke oni devas unue transporti insektmortigilon por subteni agrikulturon en akirado de riĉa rikolto.

Kiel agi? Kamarado Huang Gjun-an, kompartiano kaj estro de la revolucia gvidgrupo de la boataro organizis la boatistojn por studi verkojn de Prezidanto Maŭ kaj kritiki la reakcian aserton de "komando per profito" antaŭenpuŝitan de la renegato Liu Ŝaŭki kaj ĉiuj ekkomprenis, ke ili transportas por la revolucio sed ne por ĉasi profiton. Maljuna boatisto Li Guoging rakontis sian suferplenan travivaĵon en la malnova socio por doni klasan edukon. Li diris: "En la malnova socio mi vivis malpli bone ol brutoj remante por bienuloj. Tiam mi devis vadi por dorsporti ilin ĉe surboatiĝo kaj surbordigi kaj ofte estis batata kaj insultata pro

nekontentiga servo. Kuomintangoj perforte rekviziciis boatojn kaj boatistojn sen rekompenco, kaj banditoj rabis sur la rivero. Sangsuĉaj kolektejoj de pasimpostoj sur la rivero estis pli multaj ol malprofundaĵoj, kaj sango, ŝvito kaj larmoj de la boatistoj torentis en la riveron! Dank' al Prezidanto Maŭ ni estis savitaj el maro de suferoj; nun ni liberiĝis kaj fariĝis mastroj de la lando. Se ne estus Prezidanto Maŭ, ni ne havus nian hodiaŭon. Ni nepre marŝu antaŭen laŭ la vojo montrita de Prezidanto Maŭ." Levinte la konscion kaj unueciginte la pensojn ĉiuj meminiciate malŝarĝis la boatojn kaj decidis unue transporti insektmortigilon al kamparo.

Kiam la boatoj venis al la destinita loko por malŝarĝo, la boatistoj pensis, ke tie estas 4 kilometrojn for de la brigado kaj tre maloportune por la komunumanoj ricevi ĉi tie la kargon, tial ili diris: "Obusojn oni devas porti ĝis la batalkampoj, kaj insektmortigilon ni transportos ĝis kamprando!" Jaŭ-a boatisto Pan Gin kaj Ĝŭang-a boatisto Huang Gjunfa la unuaj puŝis boaton en rivereton plenan de sovaĝaj herboj. Ili hakis arbobranĉojn kaj alportis ŝtonojn por bari la flueton kaj levi ĝian nivelon, kaj tiel puŝis la boatojn antaŭen parton post parto. Post 4-5-foja baro de la akvo ili fine transportis la insektmortigilon ĝis la loko plej proksima al la brigado.

De multaj jaroj, la grupo kun tia fervoro servas al la agrikultura produkto. La vastaj amasoj de la komunumanoj laŭdis: "La boatgrupo ja vere subtenas la agrikulturan produkton el sia tuta koro!"

Geologiaj Drilistinoj sur Stepo

SUR Vulcanĉabu-stepo en la norda regiono de nia lando, alte staras ŝaktoskafaldo. Supre en la aero ŝvebas sonora kanto en akompano de la bruado de la drilego, kiun manipulas 12 junulinoj obstine laborantaj. Ili estas drilistinoj de la drilista grupo 302 de la 105-a Geologia Taĉmento de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, avangarda kolektivo de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso de tiu regiono.

SPITE AL MALFACILOJ

La drilista grupo 302 fondiĝis en 1969.

En la jaro 1968, responde al la granda alvoko de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, ke la intelektaj gejunuloj kombiniĝu kun laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, nombro da junaj diplomitoj

el altaj kaj mezgradaj lernejoj, harditaj en la Granda Proletara Kultura Revolucio, venis al la 105-a Geologia Taĉmento de Interna Mongolio kun heroa volo konstrui la limregionon de la patrolando.

La impeta disvolviĝo de la socialisma konstruado en la limregiono urĝe postulas, ke la geologiaj esplorantoj liveru informojn pri pli multaj kaj pli bonaj mineralaj riĉfontoj. Tiam, la tasko de putborado de la 105-a Geologia Taĉmento estis tre peza, ĝi tamen ne disponis pri sufiĉe da drilistoj. Tion vidinte, la junulinoj demandis al si: "Kial ni junulinoj ne povas manipuli drilegon?" Ili sendis petskribojn unuj post aliaj al la gvidantoj, ke ĉi tiuj permesu al ili fari boradon kaj ricevi reedukon de la laborista klaso en la plej bezonata loko kaj plej malfacilaj cirkonstancoj.

ĈPLA-ano sendita por subteni maldekstrulojn korverŝe interbabilas kun drilistinoj.





Post laboro



Interŝanĝo de komprenaj akiritaj en studo de Maŭzedongpenso

Estas maloftaĵo sur la fronto de geologia esplorado, ke virinoj manipulas drilegon. Post multfoja interkonsiliĝo, la revolucia komitato de la taĉmento donis al ili konsenton kaj decidis formi la drilistan grupon 302 el 12 junulinoj sub la gvido de 7 veteranaj laboristoj.

Rigardante la portreton de Prezidanto Maŭ, kun forta emocio kaj ondanta koro la junulinoj faris skriban deklaron pri sia preteco kaj ŝtala volo revolucii sur la posteno ĉe drilego. Kaj ankaŭ la 7 laboristoj esprimis firme, ke ili nepre edukos bone la junulinojn per Maŭzedongpenso kaj kulturos ilin en daŭrigantojn de la afero de proletara revolucio.

“Ĉiu ajn novaĵo trapasas malfacilan kaj zigzagan vojon en sia kreskado.” Ke junulinoj manipulu drilegon, tion la vastaj revoluciaj amasoj varme subtenis; sed ankaŭ troviĝis iuj homoj, kiuj diris: “La putboradon ĉiam faras viroj, kaj virinoj ne scios kion fari kun ĝi. Kion oni faru se ĝis la jarfino ili ne povos plenumi sian planon!”

Aŭdinte tion, la junulinoj komencis akran batalon en sia penso. La revolucia komitato

de la taĉmento kaj veteranaj laboristoj ĝustatempe aranĝis por ili studrondon de Maŭzedongpenso. Ili studis la instruon de Prezidanto Maŭ: “Kiam leviĝos la virinoj de la tuta lando, tiam venos la venko de la ĉina revolucio.” Iuj junulinoj diris: En la demando, ĉu virinoj povas manipuli drilegon, montriĝas la batalo inter la du specoj de pensoj kaj la du linioj. Ĉar Prezidanto Maŭ subtenas nin, ni nepre ne vanigos lian esperon.

En aprilo de 1969, la drilista grupo 302 komencis sian laboron. En tiu jaro, ili luktis peneme kaj akiris brilajn sukcesojn tiel en revolucio kiel en produkto.

HARDADO DE LA RUĜA KORO SUR LA NEĜBLOVA STEPO

La plejparto de tiuj junulinoj devenis de familioj de laboristoj, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Sed ili neniam sin hardis en malfacilaj cirkonstancoj. Nun ili ricevis unu post alia tiajn provojn. En marto kaj aprilo, kiam en iliaj hejmlukoj jam ĉarmis floroj en prin-

tempa varmo, ankoraŭ hurlis frosta norda vento kaj flirtis neĝflokaj sur la stepo. Laborante eksterdome, ili devis preni kun si tendojn kaj ĉiutage vivis inter koto, oleo kaj akvo. La noktajn deĵorantojn atakis kaj frosto kaj dormemo. Kiam ili komencis labori ĉe la drilego, la veteranaj laboristoj ŝvitadis pro okupateco, dum ili ne sciis kion fari kun maltrankvilo. Kvin tagoj pasis; tiam aliaj laborgrupoj jam enboris cent kelkdek metrojn, dum ili enboris nur 60 metrojn.

Kion fari? Nokte, la junulinoj kunsidis ĉirkaŭ petrola lampo kaj atente studis la brilajn "tri popularajn artikolojn" de Prezidanto Maŭ. La brilaj figuroj de Ĝang Side, Bethune kaj Malsaĝa Avo aperis en ilia imago kaj havigis al ili grandan forton. Ili diris: Por helpi la ĉinan popolon en la Kontraŭjapana Rezistmilito, kamarado Bethune oferis sian vivon. Kio menciinda estas en tio, ke ni iom suferas hodiaŭ kiam ni boras puton por la revolucio. Se Malsaĝa Avo povis translokigi du montegojn, kial ni ne povas ellerni manipulado de la drilego? Kamarado Ĝang Side servis al la popolo ekskluzive kaj senrezerve, do ankaŭ ni devas dediĉi ĉiujn niajn fortojn por la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

Sub la helpo de veteranaj laboristoj, ili persiste lernis kaj sin ekzercis dum laborado kaj levis sian manipulan teknikon. Iuj falis foje kaj refoje dum ekzercado de uzado de tubturnilego, sed ili neniom senkuraĝiĝis kaj daŭrigis la ekzercadon. Iuj estas malaltstaturaj kaj malfortaj. Por ili la turnado de drilstango estis tre peniga laboro, sed ili obstine sin ekzercis, ĝis ili fariĝis plej rapidaj manoj en tiu laboro de sia grupo. La 12 junulinoj provadis kapti la leĝojn de manipulado, vive studante kaj vive aplikante la brilajn filozofiajn pensojn de Prezidanto Maŭ kaj rapide ekposedis la fundamentan teknikon de borado.

Sub la nutrado de Maŭzedongpenso, la junulinoj de la drilista grupo 302 pli kaj pli forte hardiĝis en la tri grandaj revoluciaj movadoj kaj senĉese grimpis supren al ĉiam pli altaj montpintoj en ideologia revoluciigo. Iun posttagmezon, subite ekblovis ventego, torente falis pluvo, kaj furiozaj montfluoŝovaĝe ruliĝis antaŭen al la ŝaktoskafaldo. Por savi la ŝtatajn posedaĵojn, la deĵorantaj majstro Ju Giang kaj junulinoj Hju Lajji kaj Dong Venjing kune kuris el la maŝinejo por bari la fluegon per tabuloj kaj tero. Sed la tabuloj estis forportitaj de la rapida fluo tuj post almeto kaj la enverŝita tero neniom helpis. La danĝero ĉiam pli grandiĝis. En tiu kriza momento, eksonis


en iliaj oreloj la instruo de Prezidanto Maŭ: "Tiu ĉi armeo posedas spiriton sentime marŝi antaŭen, kaj ĝi nepre faligos ĉiujn malamikojn, sed neniam estos subigita de malamikoj." Ĝi donis senliman forton al la junulinoj. Ili saltis en la akvon kune kun la majstro kaj formis ŝultro ĉe ŝultro baron al la fluo. Ili diris: "Se ni restos, tiam ankaŭ la maŝino. Ni neniam lasos damaĝi la ŝtatan havaĵon!"

Spite al la pluvego, alkuris la junulino Caŭ Jumej, kiu estis en ripozo. Ankaŭ la grupestro Ĝaŭ Jukian alrapidis kun la aliaj gekamaradoj. Post intensa luktado, ili sukcesis sekurigi la ekipaĵon kaj baldaŭ la drilego denove komencis labori.

PENEME BORADI POR LA REVOLUCIO

Laborante sur la stepo, la junulinoj de la drilista grupo 302 ĉiam tenas en sia koro la patrolandon kaj en sia vido la tutan mondon. Ili interligas sian ordinaran laboron kun la afero de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de la patrolando, plene dediĉis sin al borado por la revolucio kaj akiris brilajn sukcesojn. Ilia grupo superplenumis sian taskon je 30 procentoj en 1969 kaj je 50 procentoj en 1970. Kaj ili kreis rekordon en la tuta 105-a Geologia Taĉmento en du sinsekvaj jaroj. En borado de roko kun mal-moleco de 7-8 gradoj por serĉi magnetiton, ili superis la plej altan nivelon de meznombra monata bor-efiko en la historio de la Geologia Buroo de la Interna Mongolio.

La junulinoj diris: Por bori multe, rapide bone kaj ekonomie, oni devas persisti en elstarigo de la proletara politiko, komandi teknikon per politiko kaj oponi kontraŭ unuflankeca strebado al rapideco de enborado. En julio de la pasinta jaro, parto de drilego falis en la puton, kiam tiu ĉi estis preskaŭ finborita. Se oni ne elprenus ĝin, la puto fariĝus neuzebla, kio ne nur malŝparus homfortojn kaj materialon al la ŝtato, sed ankaŭ prokrastus ekkonon de la subtera riĉfonto. Tial ĉiuj membroj de la grupo unuiĝis kiel unu homo kaj pene batalis tage kaj nokte. La politika direktanto Ĉen Keguano kaj grupestro Ĝaŭ Jukian ne forlasis la laborejon dum 4 tagoj kaj 4 noktoj. Kiam ili malsatiĝis, ili manĝis malvarman mantoŭ-on (pastobulo vaporumita post fermentado); kiam ili soifis, ili trinkis malvarman akvon; kaj kiam dormemo ilin atakis, ili dormetis ĉe registra tablo. Post daŭra kaj intensa batalado, fine ili sukcesis elpreni la falaĵon. Tiam ili



Sub la helpo de veterana laboristo, la drilistinoj lernas teknikon de manipulado de drilego.

daŭrigis la boradon ĝis ili atingis la projektitan profundecon kaj akiris kompletan geologian materialon.


Por kiel eble plej alte levi la efikecon de sia laboro, la junulinoj sub la gvido de la veteranaj laboristoj ĉiamaniere klopodas redukti la tempon neproduktan por akiri pli da tempo por putborado. Por translokigi la ekipaĵon, ili bezonis en la komenco almenaŭ tri tagojn. Poste ili utiligis postlaborajn horojn por transporti antaŭtempe la neuzatajn materialojn kaj instrumentojn antaŭ la ĉesigo de borado kaj tiamaniere por transporti la restantajn objektojn ili bezonis nur unu tagon. En unu jaro ili povas akiri tiamaniere tempon de ĉirkaŭ unu monato. Ankaŭ en aliaj tempoj ili ĉiel ŝparas tempon favore al borado.

La junulinoj de la drilista grupo 302 tutkore kaj tutanime servas al la popolo. Meze de novembro, 1970, post finboro de la lasta puto en la jaro la grupo pretis ĉesigi sian laboron por komenci la vintran trejnadon. Ĝuste tiam, la malriĉpaŝtistoj kaj malsuperaj mezpaŝtistoj petis la Geologian Taĉmenton, ke ĝi helpu ilin en prospektorado de karbo. Informiĝinte pri tio, la junulinoj meminitate proponis sian servon por plenumi tiun gloran taskon. En la 2-a de decembro, ili ko-


mencis boradi spite al frostado de 20-30 gradoj sub nulo. Estis grandaj malfaciloj por bori puton en vintro. Sed la junulinoj sentis sin plenaj de energio kaj laboris kun duobla entuziasmo. Por la revolucio ili boris venkante la malfacilegojn unun post alia. La drilego jam atingis 220 metrojn sub la tero trapasinte 3 tavolojn de karbo. Ĉar frostego alportis pli kaj pli grandajn malfacilojn, la gvidantoj decidis, post interkonsiliĝo, ĉesigi la boradon. Liu Sumiaŭ kaj aliaj junulinoj ne konsentis pri tio. Ili diris: "Malriĉpaŝtistoj kaj malsuperaj mezpaŝtistoj petis, ke ni helpu ilin en serĉado de karbomino. Se ni ĉesigus la boradon antaŭ ol fariĝis tute klara al ni la geologia stato sub la tero, kiel oni povas paroli pri ekskluziva kaj senrezerva servo al la popolo?" Ili tuj diris sian opinion al la gvidantoj de la grupo. La grupestro kunvokis la gekamaradojn de la grupo por diskuti la aferon. Ĉiuj esprimis unuanime, ke ili devas daŭrigi la laboron, kiel ajn granda estas la malfacilo. Ili do refunkciigis la dizelon kaj bruis denove la bormaŝino sur la stepo.


Ĉiam observante la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la junulinoj de la drilista grupo 302 firme decidis bori puton dum la tuta vivo sub la lazura firmamento sur la stepo.

Ĝojigaj Novajoj el la Industria Fronto




Laboristoj de la Ŝanhaja Fabriko de Pezaj Maŝinoj prilaboras V-forme dentitan ŝafton kun granda diametro kaj granda pezo.







Angulo de la Daking-a Petrola Rafinejo




Maldekstre:
Nova mineja fosmaŝino
fabrikita de la Ŝanhaja
Fabriko de Konstruaj
Maŝinoj

Dekstre:
Laboristoj de la Ŝanhaja
Fabriko de Vitraj Ins-
trumentoj uzas mezfrek-
vencan elektrofornon
por fari kvarevitran tu-
bon.

Kidaŝan-ferminejo nove
konstruita de laboristoj
de Anŝan





Laboristoj de la Baŭtoŭ-a Fera kaj Ŝtala Kompanio okupigantaj pri nova konstruo

Konstruantoj de la

Hami-a Subĉiela

Karbominejo

EN la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, kiu havas vastan teritorion kaj riĉajn mine-ralojn, konstruiĝis la unua moderna granda subĉiela karbominejo de la Nordokcidento de nia lando — la Subĉiela Karbominejo de la Hami-a Mina Buroo. La minejo estis prospektorita, projektita kaj konstruita de laboristoj de nia lando por konstruado de minejoj, sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj dank' al disvolvo de la revolucia spirito “sinapogi sur propraj fortoj” kaj “peneme lukti en malfaciloj”.

Sur la vasta Gobio frekventata de sabla vento, la laboristoj superis dum la konstruado multajn malfacilojn kaj akiris venkojn unun post alia.

La konstrua projekto 990 estis ŝlosila parto en la tuta konstruado de la subĉiela karbominejo. En la laboro oni uzis du ŝovelmaŝinojn 404 kaj 407, kiuj ĉiutage povas movi po 4,500 kubmetrojn da teraĵo kaj ŝtonoj, kies laborkvanto egalas al tiu de 2,000 homoj en unu tago. En la tre grava momento de la laboro la ŝovelmaŝino 407 devis esti malmuntita kaj riparita pro longa frotado. Sed la maŝinriparejo de la minejo ne kapablis ripari tian grandan maŝinon kaj laŭ la antaŭa regulo ĝi devis esti malmuntita kaj portita al loko kelkmil kilometrojn fora por esti riparita. Tio ne nur bezonas pli ol 200,000 juanojn, sed ankaŭ prokrastos la konstruadon de la minejo je ĉ. 100 tagoj. La minejaj laboristoj kiuj kuraĝas pensi kaj kuraĝas agi, petis permeson por mem ĝin ripari. Sub

la kondiĉoj de manko de necesaj ekipaĵoj la laboristoj uzis, anstataŭ grandaj kaj modernaj ekipaĵoj, malgrandajn kaj simplajn en plenumo de sia tasko. Dum la riparo ili neatendite rimarkis, ke rompiĝis la trogo de turnotablo kun diametro de 3 metroj; sed la plej granda ilmaŝino de la riparejo povis prilabori pecon kun diametro de nur 1.8 metroj. Vizaĝe al la nova malfacilo, la laboristoj diskutis, desegnis kaj fine elpensis novan metodon kaj ili tuj komencis provon kaj post kelkdek tagoj la bezonata trogo fine estis fabrikita!

En la subĉiela minejo, rete kruciĝas trakcjliligantaj la novajn staciojn ĉe kavaperturoj kaj novajn kaj malnovajn fesejojn. Trajnoj kuradas sur la trakoj senbare. Tio estas frukto de amasa movado de la vastaj amasoj de laboristoj kaj revoluciaj teknikistoj sub la gvido de la mineja revolucia komitato.

En la pasinteco, pro influo de la reviziisma linio de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki ke “specialistoj administru minejojn”, multaj rutinaj reguloj kaj multaj obstruktoj estis starigitaj en la transporta sistemo, tiel ke inter la nova fosejo kaj ŝutejo de teraĵo kiuj distancas inter si nur pli ol 100 metrojn estis niveldiferenco de dek kelkaj metroj kaj estis neeble meti trakojn. Tiam la plenmano da enpartiaj potentenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la minejo tenis la regpotencon de tekniko en siaj



Laboristoj de diversaj naciecoj de la minejo estas en studo.

manoj, rigardis la projekton de “specialistoj” kiel sanktaĵon, tute neglektante la kontraŭajn proponojn de laboristoj pri tiu projekto.

Post sia fondiĝo, observante la instruon de Prezidanto Maŭ “**la amaso estas vere heroo**”, la revolucia komitato de la minejo firme apogis sin sur la amaso en reformo de la projekto kaj organizis grupon por tiu afero kun maljunaj laboristoj kiel la ĉefa parto kaj kun partopreno de revoluciaj kadroj kaj revoluciaj teknikistoj. Post sia fondiĝo, la grupo tuj ricevis varman subtenon de la vastaj laboristaj amasoj. Kun firma decido ili diris: “Prezidanto Maŭ konfidis al ni la potencon de tekniko, ni nepre gajnos gloron por li kaj faros novan projekton de trakoj.”

Post multfoja ekzamenado ĉe la loko, la reforma grupo ellaboris en praktikado novan projekton kaj poste plibonigis ĝin per varma diskutado kaj revizio de laboristaj amasoj. Laŭ tiu nova projekto oni povis ne nur rapidigi la konstruadon

sed ankaŭ ŝpari pli ol 270,000 juanojn por la ŝtato.

Talusglito estas ofta incidento en konstruado de subĉielaj karbominejoj. En la pasinteco, pro tio ke la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj reakciaj teknikaj “aŭtoritatuloj” senŝange kopiis literaturon en la projektado de la minejo, estiĝis serioza grandarea talusglito. La glitfalinta parto longis pli ol 200 metrojn, larĝis pli ol 80 metrojn kaj altis pli ol 40 metrojn. Por ĝin ripari oni devis movi pli ol 700,000 kubmetrojn da teraĵo, kio povis tre malbone influi la progreson de la konstruado. Vidinte tion la revoluciaj laboristoj tre maltrankviliĝis. Kiam la mineja revolucia komitato elmetis la taskon ripari la taluson kaj rapidigi la konstruadon de la minejo, la vastaj laboristaj amasoj entuziasme respondis kaj tuj ekagis.

La loko de la talusglito estis tre danĝera. Rigardante supren ĉe la piedo de la taluso, oni

povis vidi, ke sur la krutega taluso kun alteco de pli ol 40 metroj staras gigantaj rokoj, kiuj povas fali en iu ajn minuto, kaj tio alportis multajn malfacilojn al ŝovelado de la maŝinoj. Laŭ kutima metodo oni devis tavole forigi la teraĵon desupre malsupren, sed tio bezonis multe da mono kaj longan tempon. En la kunveno okazigita de la mineja revolucia komitato por diskuti pri forigo de la teraĵo, laboristoj elmetis revolucionan projekton, nome plene utiligi la ekzistantajn ekipaĵojn kaj forigi rokojn demalsupre supren. Tiu metodo povas rapide doni rezultaton kaj ne bezonas konstrui novajn trakojn.


La laboristoj sinforgese laboris kun arda entuziasmo. Iun nokton, dum streĉa fosado, raŭpo de la ŝovelmaŝino 404 estis implikita de koto de akvoza tertavolo. Tiam la ŝoforo Fang Songvang rigardis supren kaj trovis, ke 30 metrojn super la loko elkliniĝas roko. Li tuj konsciis, ke okazos danĝero — la roko minacas la ŝovelmaŝinon. Li saltis el la ŝovelmaŝino kaj plenvoĉe kriis al la aliaj: “Kamaradoj, tuj fosu teron kune kun mi kaj forigu la danĝeron por ke la ŝovelmaŝino povu iri el la loko!”


Ĉiuj streĉe sed trankvile fosis teraĵon kaj metis ĝin sub la maŝinon, kaj post pli ol 10 minutoj la ŝovelmaŝino ekmoviĝis. Ŝoforo Fang Songvang stiris la maŝinon en plena vaporo kaj veturigis la maŝinon el la danĝera loko. Tuj poste, “pum”, la roko falis kun surdiga bruego kaj polvo.

La konstruaj laboristoj de minejo senlime fidelaj al Prezidanto Maŭ havas ŝtalan volon. Ili diris decideme: “Ni nepre iros vojon kiun antaŭuloj ne kuraĝis iri; ni subtenos la ĉielon, se ĝi falos; ni plenigos la teron, se ĝi kaviĝos. Por elhaki revolucionan vojon ni volantas verŝi nian sangon.”

La konstruantoj de la Hami-a Subĉiela Karbominejo per sia praktiko plenumis la grandan strategian principon de Prezidanto Maŭ “**Sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo**”. Nun la karbominejo jam komencis regulan produkton kaj ĉiuj revoluciaj laborantoj de la minejo firme tenas la revolucion kaj forte stimulas la produkton, senĉese renovigas rekordojn de karboprodukto kaj faras kontribuon al la disvolvo de la nacia ekonomio de nia lando.

Angulo de la minejo





ĜANG GINJAŬ:

Mi Laboros Kiel Montvilaĝa Instruisto dum la Tuta Vivo

EN 1952 mi ekŝiĝis el la armeo kaj la gubernia instanco postenigis min kiel kadron en kemia fabriko. Sed tiam mi informiĝis, ke en nemalmultaj montvilaĝoj en Pingding-gubernio mankas instruistoj, kvankam la gefiloj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparancj volas lerni. Mi pensis, ke la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj volas iri la socialisman vojon, sed ili ne povas bone teni la regpotencon, se ili ne estas klerigitaj. En montregiono laborantoj estas pli bezonataj, do mi devas iri labori en loko kun pli malfacilaj kondiĉoj. Sekve mi mem petis permeson iri al la montregiono por labori kiel instruisto.

Alveninte al Ŝenju-vilaĝo, mi rapide funkciigis lernejon sub la entuziasmaj helpo kaj subteno de la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Laŭ la instruado de Prezidanto Maŭ “koncerne al eduka laboro, oni devas havi ne nur koncentrajn regulajn elementajn kaj mezgradajn lernejojn, sed ankaŭ disecajn neregulajn vilaĝajn lernejojn kaj grupojn de ĵurnalolegado kaj klerigo”, mi rompis la rutinajn regulojn de la kontraŭrevolucia reviziisma eduka linio kaj stariĝis laŭ la bezono de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diversajn formojn de lernado kiaj matena, tagmeza kaj vespera kursoj, sezona lernado, instruado en hejmo de lernanto, kaj krome mi alprenis konformajn aranĝojn por garanti lernadon de iliaj gefilej. Ekzemple, en sezono de intensa agrikultura laboro, la lernantoj povas peti forpermeson kaj mi aparte donas al ili la lecionojn, kiujn ili ne lernis dum la foresto; mi permesas lernantojn viziti la lernejon kun siaj plijunaj gefratoj, kiujn ili devas prizorgi krom faro de aliaj hejmlaboroj; iuj pliaĝaj geknaboj kun granda lerna

kapablo povas komenci de la 3- aŭ 4-jara klaso; kaj al la geknaboj, kiuj vere ne povas veni al la lernejo, mi donas lecionojn en iliaj hejmoj. Dank’ al tia aranĝo, ne nur la infanoj kun eklerna aĝo sed ankaŭ la infanoj, kiuj ne atingis aŭ superis la lernaĝon, fariĝis lernejanoj. Kaj poste mi starigis kursojn por analfabetoj en tri vilaĝoj, en kiuj do kreiĝis oportuno de lernado tiel por la plenaĝuloj kiel por la infanoj.

Post sia fondiĝo, la Elementa Lernejo de Hongjukoŭ jam elkulturis sume 182 diplomitojn. Antaŭ la jaro 1958, 106 lernantoj finis sian lernadon en la kursoj por analfabetoj. En la tri vilaĝoj sin trovas entute pli ol 510 homoj. Nun ĉiuj el ili kun aĝo de 7-8 jaroj ĝis pli ol 50 jaroj jam scipovas legi kaj nemalmultaj jam povas legi verkojn de Prezidanto Maŭ. Multe ŝanĝiĝis la postrestinta kultura fizioncmio de la montregiono.

Tuj post la fondiĝo de nia Elementa Lernejo de Hongjukoŭ, ni jam komencis funkciigi ĝin en diligentema kaj ŝparema maniero. En 1958, ni ankoraŭ pli konscie plenumis la proletaran edukon linion de Prezidanto Maŭ en nia lernejo kaj stariĝis propramane agrokultivejon, forstejon kaj fruktogardenon kaj kreis favorajn kondiĉojn por ke la lernantoj, kun lernado kiel sia ĉefa tasko, devas samtempe lerni ankaŭ aliajn aferojn.

Prezidanto Maŭ instruas nin: “Ĉiuj laboroj de lernejo celas reformi la ideologion de la lernantoj.” En la procezo de efektivigo de la eduka linio de Prezidanto Maŭ, mi persistas en elstarigo de la proletara politiko kaj interligas la reformadon de la objektiva mondo kun tiu de la subjektiva mondo de la instruistoj kaj lernantoj. Mi konstante donas atenton al kapto kaj solvo de aktualaj pensaj problemoj, por ke Maŭzedongpenso pro-

funde enradikiĝu en la koro de la infanoj kaj ke ili fariĝu daŭrigantoj de la proletara revolucia afero.

Mi donas politikajn lecionojn en kombino de aktuala klasbatalo. Mi iris kun la infanoj al la tranĉeo, kie batalantoj de la Okavoja Armeo ekstermis japanajn agresantojn, por rakonti al ili revoluciajn historiojn. Mi okazigis por ili kunvenojn kune kun malriĉkamarancj kaj malsuperaj mezkamaranoj por rememori la suferojn en la malnova socio kaj interŝanĝi sperton en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso kaj gvidas ilin partopreni kunvenojn por amasa kritikado kaj batalo kontraŭ klasaj malamikoj. Kaj tiamaniere la lernantoj ricevas vivecan edukon pri klasa batalo kaj batalo inter la du linioj.

Lernado pri agrikulturo en lernejo devas ne nur kombiniĝi kun eduko pri agronomio, sed ankaŭ rekte servi al la agrikultura produkto. En nia loko, oni kutimas kulturi maizplantojn maldense, sarki malprofunde kaj la produktokvanto estis malalta. Post kiam Prezidanto Maŭ elmetis la grandan alvokon “lernu de Daĝaj en agrikulturo”, ni kulturis eksperimentan kampon kun areo de unu muo kaj la pomua produktokvanto de maizo atingis 1,000 ĝincjn. La komunumo okazigis kunvenon ĉe tiu kampo kaj disvastigis nian sperton de racie densa kaj profunda semado kaj profunda sarkado kaj tiel rompis la konservativismon de iuj homoj.

Foje ni greftis jujubarbojn. Ĉar mi ne bone interligis la instruadon en klasĉambro kun tiu ĉe la laborejo, viviĝis nur du el la 800 greftitaj arboj. Kun tiu problemo mi lernis la grandan instruon

de Prezidanto Maŭ “**praktiko, konado, denove praktiko, denove konado**” kaj akiris pli profundan komprenon pri la eduka principo de Prezidanto Maŭ. Poste, kiam ni greftis persimonon per *Diostyros lotus*, mi donis lecionon sur montdeklivo anstataŭ en klasĉambro por ke la lernantoj lernu greftadon dum praktiko. Ni greftis sume 150 arbojn, el kiuj 148 viviĝis. Nun lernantoj de la altaj klasoj de nia lernejo ĝenerale jam bone konas la kulturen precezon de lokaj kulturplantoj kaj jam posedas la teknikojn de kulturado de frukt-arboj kiaj plantado, grefto, pritondo kaj prevento de finsektoj. Malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj ilin laŭdis: “Ili estas kaj kleraj kaj laborkapablaj; ili scipovas skribi kaj kalkuli kaj povas fari diversajn laborojn sen timo al malpureco.”

Kun la lernantoj sub mia gvido, mi sukcesis planti pinojn, cipresojn, robiniojn, persimonojn k.a. entute 25 specojn de arboj sur ŝtonozaj montoj. Ni plantis pli ol 50,000 arbojn, per kiuj ni verdigis ĉiujn valojn kaj montdeklivojn en la ĉirkaŭaĵo de la lernejo. Kun diplomitaj lernantoj de nia lernejo kiel ĉefa forto la tri vilaĝoj organizis specialajn forstokulturajn taĉmentojn por verdigi la kalvajn montojn. Inter multaj aliaj arboj, ili plantis ĉ. 20,000 spic-arbedojn *Zanthoxylum simulans* kaj jam ricevis rikolton.

De la lastaj 19 jaroj nia lernejo marŝas laŭ la revolucia vojo montrita de Prezidanto Maŭ “**eduko nepre devas servi al la proletara politiko kaj nepre devas kombiniĝi kun produkta laboro**”, kaj nia decido fariĝas ĉiam pli firma en tio.



*Vizito al familio
de lernantoj*



Lernantoj laboras en sia malgranda fruktoĝardeno.



Vang Hiukin (la dua de maldekstre), ruĝa gvardiano de la Elementa Lernejo de Hongjukoŭ kaj ĉeestinto de la Kunveno de Aktivuloj en Viva Studo kaj Viva Apliko de Maŭzedongpenso de la gubernio, inter siaj kunlernantoj.

Krei Novan Medicinon

por la Popolo

EN juneco mi iom lernis pri uzo de kuracherboj, per kiuj mi povas rekunigi rompitaĵojn kaj kuraci iujn virinajn malsanojn. En printempo de 1969 nia brigado starigis kooperan kuracan stacion kaj la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj elektis min kiel “nudpiedan kuraciston”. Tio montris al mi la prizorgon de la Partio kaj fidon de la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj. Mi decidis bone studi verkojn de Prezidanto Maŭ kaj tutkore servi al la popolo.

Antaŭe mi kuracis malriĉkamaranojn kaj malsuperajn mezkamaranojn nur en mia hejmloko kaj neniam iris aliloken. En printempo de 1970, la Fabriko de Alttensiaj Porcelanaj Izoliloj en Hi-an petis min iri tien por kuraci laboristojn kiuj rompis al si ostojn dum laborado. Tiam mi malvarmumis kaj fartis malbone, kaj krome mi havis “kulistimon” por iri en grandan urbon kuraci malsanulojn, tial mi ne volis akcepti la inviton. Gvidantaj kamaradoj de la komunuma revolucia komitato kune kun mi lernis la grandan instruon de Prezidanto Maŭ “**rompi la superstiĉon kaj liberigi la penson**” kaj kuraĝigis min iri tien por kuraci la klasajn fratojn. Sub la inspirado de Maŭzedongpenso mi iris al Hi-an en malsano por rekunigi al fratoj-laboristoj la rompitaĵojn. Alveninte al la hospitalo, mi trovis ke iliaj vundoj estis gravaj, tial mi tuj komencis kuraci ilin, sen manĝo kaj ripozo. Sed iu kuracisto de la hospi-

talo, kiu tre adoris okcidentan medicinon kaj ne fidis la ĉinan tradicion medicinon, rigardis min kun suspekto. Ŝi diris moke: “Ĉu efikas tiuj kuracherbaĵoj similaj al ĉevala fekaĵo?” Tiam mi estis tre ofendita, ke mi volis reveni. Tamen mi tuj pensis, ke mi ne devas reiri, ĉar tio ne estas afero pri sinteno de iu ajn persono al mi, sed sinteno al la medicina heredaĵo de nia Patrio. Do mi restis kaj zorgeme ĝuste remetis la ostojn kaj pansis la vundojn per kuracherbaĵoj. Post du-tri tagoj, iu vundito, kiu konstipiĝis pro ostorompo kaj fekis dank’ al klistero, jam povis facile feki. Alia paciento kiu ne povis endormiĝi pro doloro kaŭzita de vertebra delokiĝo, jam liberiĝis de doloro. Malaperis la ŝvelaĵo de la malsanulo, kies ŝvelinta gambo antaŭe dikiĝis kiel vazo. Post kuracado de pli ol 20 tagoj, la laboristoj de la fabriko kaj aliaj malsanuloj estis resanigitaj. La fera fakto ĝisfunde kritikis la sensencan diron de la granda renegato Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj ke “la ĉina medicino estas ne scienca”, kaj samtempe tio estas tre efika eduko ankaŭ al tiuj kamaradoj, kiuj erare sintenis al la kuracherboj kaj al la kuracistoj kiuj aplikas ilin.

En februaro de 1970, kamarado Ĝang Ŝunĝi, soldato de iu trupo de Floto de la Orienta Maro, estis vundita dum plenumo de tasko. Lia maldekstra brako estis rompita de maŝino je tri partoj

kaj la skapolo suferis multpecetan rompon. Post ricevo de kuraco en iu hospitalo, la brako estis rekunigita kaj reviviĝis. Sed post nelonge, la pulso-batoj de radiusa arterio de la vundita brako fariĝis nepalpeblaj, la brako malvarmiĝis, la haŭto fariĝis purpura kaj raspa kaj nigriĝis la ungoj. Post kuna diagnozo de kelkaj hospitaloj oni opiniis ke necesas amputi la brakon. Sed la partia komitato de la trupo petis fari ĉion eblan por konservi ĝin al li. Poste oni petis mian helpon, sed ankaŭ mi ne havis certecon. Ĉar mi neniam renkontis tian kazon. Rimarkinte ke mi hezitas, la gvidantaj kamaradoj de la hospitalo helpis min per kuna studo de la granda instruo de Prezidanto Maŭ “**la homaro ĉiam devas konstante resumi sperton kaj fari novajn eltrovojn, novajn inventojn, novajn kreojn kaj novajn progresojn**”. Post la studo mi pensis, kiel oni povus progresi, se ili ne kuraĝus kuraci nerenkontitan malsanon? Tio ne estas problemo, ĉu la malsano estos kuracebla, sed problemo ĉu mi estas fidela al la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Mi decidis fari ĉion por nepre resanigi la brakon por kamarado Ĝang Ŝunĝi. Mi kaj kuracistoj de ĈPLA zorge analizis la kazon por trovi la kaŭzon. Post multfoja observado kaj ripetada esploro, ni konkludis, ke la malvarmiĝo kaj ŝveliĝo de la brako, kolorŝanĝiĝo kaj nekrozo de la haŭto kaj nigriĝo de ungoj estas kaŭzigitaj ĉefe de estiĝo de hematomo restinta post la operacio, kiu malhelpis la sangocirkuladon. Tial ni decidis pansi la brakon per kuracherbaĵoj. Mi kaj kamaradoj de la hospitalo tagnokte gardis lin, observante fazojn de la malsano por apliki taŭgan kuracilon laŭ bezono. Post du tagoj, la pulso-batoj de radiusa arterio fariĝis iom post iom palpeblaj; post kvar tagoj la temperaturo de la vundita brako proksimiĝis al la normala kaj ŝanĝiĝis la koloro de la haŭto; post sep tagoj la nekroza haŭto komencis defali kaj aperis nova delikata haŭto kaj novaj ungoj. Reviviĝis la brako de tiu heroa batalanto. Kiam la ĝojiga informo ekflugis, ĉiuj kuracistoj kaj flegistinoj en la hospitalo venis kaj varme hurais pro la granda venko de la proletara higiena linio de Prezidanto Maŭ.

En pasinteco, kuracante malriĉkamaranojn kaj malsuperajn mezkamaranojn en mia hejmloko, mi diagnozis laŭ mia sperto per observado kaj palpado, ĉar mi ne havas fiziologiajn kaj anatomiajn sciojn. Sen scienca ekzameno kaj teoria helpo, kvankam iafoje mi sentis, ke mi ĝuste rekunigis rompigitajn ostojn, sed la rezultoj ne estis ofte

kontentigaj. Poste, praktikante mian kuracarton en gubernia urbo kaj provinca ĉefurbo, per la helpo de X-radioj mi povis klare vidi la staton de ostoj, kaj aldone mi akiris de kuracistoj de okcidenta medicino kelkan scion pri anatomio. Tiel, dank’ al kombino de la nova scio kun mia sperto akumulita en pasinteco, mia kuracarto de ostokunigo fariĝis iom pli alta. En julio de 1970, kamarado Vang Taŭ, ĈPLA-ano kun kvin bonoj, venis al la gubernia hospitalo de Ĝaŝuj por ricevi kuracon. Ĉar al tiu brava batalanto rompiĝis la tibio kaj fibulo de la maldekstra kruro super la maleolo, dum li ŝirmis siajn kunbatalantojn de danĝero en majo. Kiam li forlasis hospitalon post kuraco de pli ol 50 tagoj, liaj rompigitaj ostoj kuniĝis sed en formo de angulo, tiel ke lia piedo turniĝis eksteren, kaj la haŭto estis purpura. Li povis nek stari nek iri. Por tia bravulo oni devas nepre resanigi la kripligitan membron, por ke li povu reiri al la batala posteno de defendo de la Patrio. Sed liaj ostoj estis rompigitaj jam du monatojn kaj la rompo okazis en la loko unu colon super la maleolo, tial estis relative malfacile disigi la kuniĝintajn ostojn per homa forto, kaj krome ĉe tio la paciento devus suferi akran doloron. Tamen sen disigo oni ne povis fari remeton. Vizaĝe al tiu stato, mi ripetade studis la grandan instruon de Prezidanto Maŭ “**ni devas rekoni malfacilojn, analizi ilin kaj batali kontraŭ ili**”, analizis per vidpunkto de “divido de unu en du” la favorajn kaj malfavorajn faktorojn. Sub la gvido de la partia komitato de la hospitalo, ni kuracistoj de ĉina kaj okcidenta medicinoj interkonsiliĝis kaj laboris en kompakta kunago. Kuracistoj de la gubernia hospitalo faris anestezon, X-radian esploron kaj fotografon kaj mi faris remeton. En duonhoro ni finis la kuracon tre sukcese. Post pansado de kuracherbaĵo en du tagoj malaperis doloro al la paciento, la temperaturo de la vundita kruro releviĝis, la purpura haŭto ruĝiĝis kaj proksimiĝis al normala kruro. Ni ŝuldis la ĉifojan rapidan kaj ĝustan rekunigon tute al kombino de la ĉina medicino kun la okcidenta.

Kombini la ĉinajn medicinon kaj farmacion kun la okcidentaj por krei unuecajn medicinon kaj farmacion de nia lando estas granda kaj glora tasko al ni asignita de Prezidanto Maŭ. Kiel herbokuracisto mi firme subtenas kaj plenumos tion. Mi nepre estos stimulantato de kombino de la ĉina medicino kun la okcidenta kaj batalos la tutan vivon por krei novajn medicinon kaj farmacion de nia lando.

Kolekti opiniojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj por plibonigi sian servadon.



En la Vendejo Hinghuo

LA tag-nokta vendejo Hinghuo en Ŝanhajo estas avangarda kolektivo sur komerca fronto de nia lando.

La 27-a de januaro ĉi-jare estis Printempa Festo, la tradicia solena festo de Ĉinio. Matene de tiu tago, en la vendejo estis tre multe da klientoj, kaj ilin afable akceptis la laborantoj de la vendejo. Tiam subite en-puŝiĝis iu mar-armeano kun ruĝa papero en la mano. En-irinte li malvolvis la paperon kaj ĝin pendigis sur muron de la vendejo. Ĝi ja estis dank-letero al la vendejo. Tuj poste li ankaŭ esprimis sian dankemon rekte al gvidanto de la vendejo, laŭdis la servemon de ĝiaj laborantoj al la popolo, kaj diris, ke li decidis lerni de ili tian spiriton. Tion vidinte, la klientoj tuj komprenis, ke kamaradoj de la vendejo faris ankoraŭfoje ion bonan al aliaj.

Tio okazis antaŭ du tagoj. Estis jam profunda nokto. Kamarado Vang de la vendejo ekvidis, ke iu maljunulo maltrankvile vagadis ekster la vendejo. Li eliris kaj de-

mandis intime: "Io malfacila okazis al vi, ĉu ne, oĉjo?"

Sentante lian helpemon, la maljunulo rakontis sian embarason al li.

La maljunulo ja ĵus venis al Ŝanhajo de kamparo, por viziti sian filon en mar-armeo. Sed li perdis la adreson kaj memoris nur tion, ke la filo estas en iu ŝip-fabriko. Kion fari por trovi la ŝip-fabrikon? Jen estas lia malfacilo.

"Estu trankvila, oĉjo!" diris kamarado Vang kun-sente. "Ni trovos la adreson por vi. Estas malvarme ekstere. Nu, bon-vole eniru kaj ripozu en nia vendejo!"

Tion dirante li helpis la maljunulon kunporti pakaĵon en la vendejon, sidigis lin en komfortejoj kaj donis al li glason da varma akvo. Post tio, li komencis serĉi la ŝip-fabrikon per telefonado.

Sed estas tiom da ŝip-fabrikoj en Ŝanhajo kaj tiom da fakoj en la ŝip-fabrikoj. Cetere ne ĉiuj iliaj telefonaj numeroj estas trove-

blaj. Kion fari? Li en-pensiĝis fikse rigardante la telefonon. Subite venis al li bona ideo, ke estas numero "04" en telefon-centralo. Ĝi servas al demandantoj pri telefonaj numeroj. Kial ne peti helpon de deĵorantaj kamaradoj de tiu numero? Li telefonis al "04". Lin aŭskultinte la deĵoranto ekkomprenis, ke la tag-nokta vendejo Hinghuo refoje faris ion bonan al aliaj, kaj plie tio temas pri helpo al familiano de armeanoj. Li sen-hezite donis sian helpon kaj diris, ke li certe trovos la filon de la oĉjo.

La deĵoranto de "04" komencis telefonadon al ŝip-fabrikoj de Ŝanhajo unu post alia. Unu horon poste, dank' al helpo de koncernaj ŝip-fabrikoj li fin-fine trovis la filon de la maljunulo.

Nun, la filo de la maljunulo sendas dank-leteron al la vendejo en frua mateno de la Printempa Festo. Eksplodis tuj en la vendejo ĝojkrioj "Lernu de la Popola Liberiga Armeo!" "Saluton al la Popola Liberiga Armeo!" kaj "Lernu de la tagnokta vendejo Hinghuo!"

Kolportistoj en Profundaj Montoj

EN la gubernio Kuanĉeng de Hebej-provinco estas Lianggiataj-a Disvenda Kooperativo, kies laborantoj vive studas kaj vive aplikas Maŭzedongpenson, persiste vektportas de pli ol dek jaroj varojn al ĉiuj montvilaĝoj en profundo de Janŝan por sendi ilin ĝis la pordoj de klientoj, kaj pro tio trovas varmajn laŭdojn ĉe la montanoj.

Kiam Ĝeng Lianju estis sendita al Lianggiataj por starigi la kooperativon en 1953, li ĝoje vektportis du korbojn da ĉiutagaj uzaĵoj de la gubernia urbo 60 liojn fore al la loko kun alta fervoro por kontribui en ŝanĝado de la fizionomio de la montvilaĝoj. Kiam la lokaj vilaĝanoj vidis ke venas kolportisto, ili ĉirkaŭis lin por aĉeti bezonaĵojn. Ĝeng Lianju tuj demetis sian vektportitaĵon kaj komencis vendi al la amaso varojn laŭ ilia elekto. Frumatene en la dua tago, Ĝeng Lianju ree vektportis varojn por rondiri de vilaĝo al vilaĝo. Liaj kolegoj diris al li: “Kara Ĝeng, ni venas ĉi tie por starigi novan kooperativon, ni devus almenaŭ iom aranĝi nian vendejon kaj poste komenci nian negoncon.” Ĝeng Lianju respondis montrante sian vektportitaĵon: “La bezonoj de la amaso prezentas nian taskon kaj porti varojn al la klientoj estas nia laboro. Kial necesas alia aranĝado?” Vespere li serioze studis kune kun la aliaj kamaradoj la instruon de Prezidanto Maŭ: “Ni devas profunde atenti pri la ĉiutaga vivo de la amasoj, de la problemoj de tero kaj laboro ĝis tiuj de brulaĵo, rizo, oleo kaj salo.” Post tio li diris al ili: “Ni devas sekvi la instruon de Prezidanto Maŭ kaj ĉiam pensi pri la montvilaĝanoj kaj doni al ili oportunecon.” La instruo de Prezidanto Maŭ levis la konscion de la kamaradoj en servado al la popolo. Kaj la vortoj kaj agoj de Ĝeng Lianju profunde ilin kortuŝis. De tiam, same kiel Ĝeng Lianju, la aliaj sep laborantoj de la kooperativo vektportas varojn en la montojn de frua mateno ĝis noktigo.

Foje en vintro, subite ekhurlis norda vento kaj senĉese neĝis en grandaj flokoj. La montvojoj estis tute ŝtopitaj de la neĝo kaj tio tre maltrankviligis la vendistojn. Ili konsciis, ke ĝuste en la tempo kiam la neĝego fermas la montvojojn, ili des pli devas zorgi pri la vivo de la amasoj. Do ili vektportis siajn varojn pli ol 100 ĝinojn pezajn por iri en la montojn spite al neĝado. Kiam ili venis al piedo de iu monto, ilia ĉemizo estis tramalsekigita de ŝvito, tamen ilia ekstera vesto glaciigis. Estis malfacile por ili marŝadi. Sed kiam ili ekpensis pri la komunumanoj, kiuj estis fermitaj en siaj domoj de la granda neĝo kaj ne povis akiri siajn bezonaĵojn, al ili tuj venis kuraĝeco kaj energio. Kiam ili ne povis vektporti sian portaĵon tutan sur malfacile irebla montvojo, ili transportis ĝin po-parte en multaj fojoj. Tiel ili portis ĉiutagajn bezonaĵojn al montvilaĝoj. Kiam ili iris en la domojn de komunumanoj kaj proponis sian servon, la lastaj estis ĝislarme kortuŝitaj, trovinte, ke ili ĉiuj aspektas kiel neĝhomoj.

En servado al la popolo, la laborantoj de la kooperativo senĉese levis la nivelon de sia laboro. Ili meminciate rompis la limojn de sia profesia sfero kaj faris enketadon profunde inter la amasoj por ĉiurimede helpi komunumanojn kaj brigadojn disvolvi la kolektivajn ekonomiojn.

En Lianggiataj kaj ĝia ĉirkaŭaĵo troviĝas riĉaj fontoj de sovaĝaj vegetaĵoj. Tamen, oni antaŭe ne entreprenis ekspluatadon de tiuj naturaj riĉaĵoj. Por helpi en ekspluatado de la montregiono, la laborantoj de la kooperativo kolektis en profundaj montoj kuracherbojn kaj lignon taŭgan por fari tenilojn de diversaj instrumentoj kaj instigis la komunumanojn kolekti tiujn utilajn objektojn. Samtempe, ili klopodis serĉi merkaton por tiuj varoj en aliaj lokoj. Tiel ili ne nur pliiĝis enspezajn al la komunumanoj kaj brigadoj, sed ankaŭ ebligis ke la riĉfontoj de la montregiono estas utiligataj.



SINSEKVAJ VENKOJ AKIRITAJ DE LPLA

La heroaj trupoj de la Laosa Popola Liberiga Armeo daŭre sieĝas kaj ekstermas la malamikojn en suda batalo de Laoso kaj akiris sinsekvajn brilajn venkojn.

Post dutaga sieĝado al la dua bataliono de la tria regimento de la unua infanteria divizio de la saĝona pupa armeo okupanta lokon ok kilometrojn sudoriente de Tam Luong, LPLA-anoj faris ofensivon en la frua mateno de la 27-a de februaro kaj plene ekstermis la malamikojn. Pli ol 300 pupaj armeanoj estis mortigitaj aŭ vunditaj kaj pli ol 40 kaptitaj kune kun la tuta armilaro kaj milita materialo. Tio estis la sepa bataliono de la malamiko plene ekstermita en ties militaj operacioj por agresi la sudan parton de Laoso.

En la 25-a de februaro, LPLA-anoj ekstermis plene la trian batalionon de la tria paraŝuta brigado de la saĝona pupa armeo kaj detruis la artilerian bazon de la brigado. Tuj post tio LPLA-anoj atakis la komandejon de la nomita malamika brigado kaj detruis la subteran

fuorton, kiun la malamikoj defendis izolite. Estis kaptitaj ĉeloke la malamika brigadestro kaj multaj aliaj oficiroj kune kun ĉiuj armiloj, telekomunikaj ekipaĵoj kaj aliaj materialoj.

En februaro, la patriotaj armeo kaj popolo de Laoso ekstermis sume pli ol 7,800 malamikojn, inter kiuj du trionoj estis usonaj agresantoj kaj pupaj soldatoj de suda Vjetnamio, kiuj invadis la sudan parton de Laoso. El la ekstermitaj malamikaj trupoj 12 batalionoj estis komplete ekstermitaj aŭ pezege damaĝitaj. Krome, estis faligitaj 234 usonaj pirataj aviadiloj, kaj detruitaj kaj kaptitaj 119 malamikaj militaŭtoj. Kaj cetere estis militakirita granda nombro da armiloj kaj militaj materialoj.

LASV FORTE BATIS LA MALAMIKOJN EN KHE SANH


La 21-an de februaro, la Liberiga Armeo de Suda Vjetnamio en la batalo de Khe Sanh en norda Quang Tri surprizatakis du seriojn de malamikaj aŭtoj en Tan Lam, detruis kaj difektis sep militajn aŭtojn, kaj ekstermis pli ol 20 usonajn kaj pupajn soldatojn.

En la 23-a de februaro, LASV kanonis la malamikan parkon de O-Giang en Tan Lam-areo, kun la rezulto de difekto de kvin militaj aŭtoj kaj ekstermo de 15 malamikoj.

De la 22-a ĝis la 24-a de februaro, LASV dronigis 4 malamikajn transportajn ŝipojn en Xuan Khanh kaj



Batalantoj de kontraŭaera trupo de la Patriotaj Armitaj Fortoj de Laoso ekstermas usonajn piratajn aviadilojn.



La Liberiga Armeo de Suda Vjetnamio bombardas malamikojn sur la ŝoseo n-ro 9.

Cua Vjet, do ĝi alfundigis sume 17 malamikajn militajn ŝipojn sur la akvovojo inter Cua Vjet kaj Dong Ha de la 4-a ĝis la 24-a de februaro.

HEROE BATALIS KAJ VENKIS FUĴI-AJ KAMPARANOJ DE JAPANIO


La kamparanoj de Kitafuji, Jamanaŝi-gubernio, refoje batalis kontraŭ la pafekzercado per longdistancaj kanonoj intencita de la usonaj trupoj en Japanio, de la 23-a ĝis la 25-a de februaro, kaj akiris venkon.

La ekzercon intencis fari la tria mar-inferia divizio de Usono, kiu longe okupis la insulon Okinavo kaj partoprenis iam la agresan militon kontraŭ Hinduĉinio.

Kamparanoj de la vilaĝo Oŝino kaj la vilaĝo Ŝibukusa de la urbo Fujijoŝida tranoktis sur neĝkampo en frostoj. Kiam la usonaj trupoj estis komencontaj la ekzercadon, ili kuregis en la ekzercejon riskante sian vivon por protesti kontraŭ tio. La usonaj soldatoj ne povis ekzerci sin je pafado laŭ sia plano antaŭ la kuraĝa batalado de la kamparanoj kaj post tri tagoj ili fortiris sin en embaraso.

La japana popolo oponas kontraŭ la ĝisĉielaj krimoj de invado al Laoso kaj vastigo de la hindoĉinia milito fare de la usona imperiismo.





Batali Kune kun Koreaj Amikoj

GAŬ JUNTIAN*

Antaŭ 20 jaroj, kiel batalanto de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj mi batalis ŝultron ĉe ŝultro kun la korea popolo kaj Korea Popola Armeo kaj starigis profundan batalan amikecon kun ili sur la batal-kampo en Koreio. Rememorante mian batalan vivon en tiu periodo, mi ĉiam sentas senkomparan emocijon kaj treege sopiras al la koreaj kunbatalantoj, kiuj dividis kun ni siatempe sorton kaj zorgon.

Sur la korea batal-kampo, kune kun miaj kunbatalantoj, mi partoprenis ĉiujn kvin grandajn kampanjojn kaj spertis pli ol dek relative grandajn batalojn, iom kontribuante en la komuna kontraŭimperiisma afero de la ĉina kaj korea popoloj. Pro tio la korea popolo tamen donis al mi tre grandan honoron.

En la kampanjo de Sangamling, mi estis politika direktanto de iu kompanio. Ĝi estis ordonita servi kiel lanĉpinta taĉmento kaj rapide penetri sur la Blankĉevalan Monton, kunagante kun la frataj trupoj, kun la celo malfermi vojon por frakasi la aŭtunan ofensivon de la malamiko. Situinte okcidente de Sangamling, la Blankĉevala Monto estis grava pasejo por la malamiko en ĝia antaŭenpuŝiĝo al nordo. Unu malamika regimento intencis ĝin morte defendi, konstruinte densajn retojn de fortikaĵoj. Kvankam ni havis nur du plotonojn, tamen ni bone sciis la gravecon de konkero de tiu monto por disrompi la ofensivan planon de la malamiko kaj ĉiam memoris la instruon de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ: **“Tiu ĉi armeo posedas spiriton sentime marŝi antaŭen; ĝi nepre faligos ĉiujn malamikojn, sed neniam estos subigita de malamikoj. En kiel ajn malfacilaj kaj penigaj okazoj, se nur restas ankoraŭ unu homo, li batalos plu.”**

Tuj ĉe komenciĝo de la batalo, ni kuraĝe enpenetris rekte antaŭen kaj konkeris la montsupron defendatan de la malamiko. Post tio ni sinsekve repuŝis plurfojan reatakadon de la malamiko. Foruzinte ĉiujn niajn kartoĉojn, ni do provizis

nin per kartoĉoj trovitaj el la kadavroj de mortigitaj malamikoj. Poste ni persistis en morta lukto kontraŭ la malamikoj per bajoneto, kolbo, ŝtonoj, terbuloj kaj ŝovelilo. La sanga batalo daŭris unu tagon kaj du noktojn kaj ni frakasis 85 sturmojn de la malamiko, ekstermis 320 kaj kaptis 12 malamikojn. Kunage kun frataj trupoj ni komplete konkeris la Blankĉevalan Monton. Post la batalo mi estis honorita kiel stariginto de unuagrada merito kaj ricevis la titolon de duagrada batalheroo. Nelonge poste mi havis la honoron ricevi kune kun aliaj reprezentantoj de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj la aŭdiencon de la granda gvidanto de la korea popolo Ĉefministro Kim Il Sen kaj estis honorita per medaloj de nacia standardo kaj milita merito de Koreio.

Ni neniam forgesos la profundan amikecon, kiun la korea popolo montris al ni dum la militado en Koreio. En la tempoj de plej intensa batalo, riskante sian vivon, la korea popolo portis municion kaj blankardon kaj flegis vunditojn por ni, spite al la pafado de la malamiko. Kiam pontoj aŭ vojoj estis difektitaj de malamikaj bomboj, la korea popolo tuj rekonstruis aŭ riparis ilin. Aparte neforgesebla por mi estis la sceno, kiun mi mem vidis propraokule: Iu korea virina modelo de subteno al la fronto, kies kruro estis jam rompita de bomboj, ankoraŭ rampis al nia pozicio por porti al ni bolintan akvon kaj instigis nin brave ekstermi la malamikojn. La profunda amikeco kaj granda subteno de la korea popolo naskis ĉe ni grandan forton por bati la agresantojn. Ĝuste dank’ al la intima unuiĝo kaj kuna batalado ŝultron ĉe ŝultro inter la popoloj kaj armeoj de niaj du landoj, ni rompis la kapon al la ekstreme kruela usona imperismo, tiel ke ĝi elmontris sian proprecon de papera tigo kaj finfine ne povis ne klini sian kapon kaj subskribi la armisticon.

Sed, la usona imperiismo ne volontis akcepti sian fiaskon en Koreio kaj ankoraŭ perforte okupas

la sudan parton de Koreio, prenante ĝin kiel sian kolonion kaj militan bazon. Ĝi faras ĉion eblan por subfosi kaj malhelpi reunuiĝon de Koreio kaj senĉese faras militajn provokojn kontraŭ la korea popolo surtere, deaere kaj demare. Ankaŭ la reviviĝanta japana militarismo provas reveni laŭ la malnova vojo sub la instigo de la usona imperiismo kaj revas pri reefektivigo de sia "kunprospera sfero de granda orienta Azio". Ĝi publike enstrekiis nian sanktan teritorion Tajvan-provincon kaj Koreion en sian influferon. La usonaj kaj japanaj reakciuloj estas en intensa komplotado kaj intrigas lanĉi novan agresan militon. Tio ne povas ne vekti nian seriozan singardemon.

Ĉinio kaj Koreio estas frataj najbaroj, kiuj interdependas kiel lipoj kaj dentoj. La revolucia amikeco kaj batala unuiĝo inter ni formiĝis el sango kaj povas elteni provadon de ĉiaj ajn tempestoj, ĝuste kiel montris la granda gvidanto de la korea

popolo Ĉefministro Kim Il Sen: "La korea kaj ĉina popoloj ekkomprenis tra la praktika vivo, ke estas strikte interligitaj la bataloj de niaj du popoloj kontraŭ agreso de imperiismo kaj por defendo de la nacia sekureco kaj fruktoj de venko de la revolucio." En la milito kontraŭ la invado en Koreion fare de la usona imperiismo, la popoloj kaj armeoj de Ĉinio kaj Koreio unuanime batalis ŝultron ĉe ŝultro kontraŭ la sama malamiko kaj venkis la arogantajn usonajn agresantojn. Estonte, en bataloj kontraŭ la komunaj malamikoj la usona imperiismo kaj japana militarismo, la ĉina popolo kaj la Ĉina Popola Liberiga Armeo, armitaj per Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso, firme sekvos la instruon de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, ĉiam unuiĝos, batalos kaj venkos kune kun la frataj koreaj popolo kaj armeo!

**Nun politika vickomisaro de iu trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo.*



SKRIBIS VJETNAMA LEGANTO D. H. H.

Depost 1967, kiam mi ricevis de vi kvar volumojn de *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* en la ĉina lingvo, ĝis nun mi regule lernadas kaj studadas ilin. Mi bone uzas ilin kiel gvidprincipojn por tagaj revoluciaj laboroj. Dank' al la penso de Prezidanto Maŭ mi jam venkis multajn malfacilojn en mia laboratorio sub kugloj kaj bomboj de la usonaj agresantoj. Antaŭ multe da malfaciloj pri loko, tempo kaj materialoj mi ankaŭ bone direktis mian laboratorion plene respondantan al la tuta bezono de la fronta hospitalo.

Mi neniam forgesos la parolon

de Prezidanto Maŭ: "Ni opinias, ke la malfaciloj estas venkendaj kaj venkeblaj."

Ju pli mi legas verkojn de Prezidanto Maŭ, des pli mi elkore amas kaj respektas Prezidanton Maŭ. Por ĉiam mi deziras al li bonan sanon kaj longan vivon.

Kun mia aĝo de 55 jaroj mi komplete rejuniĝas antaŭ la altvaloraj dokumentoj skribitaj de Prezidanto Maŭ. Per ili mi plie havas direktilon en nia nancisava batalo kontraŭ la usona imperiismo kaj sur nia longa marŝo ĝis fina triumfo.

SKRIBIS ĈEĤOSLOVAKA LEGANTO F. K.

En la unua numero de EPC al-tiris min artikoloj pri frataj rilatoj al aliaj, eĉ malgrandaj nacioj. Tiuj agoj certe devenas de la vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong: "Servi al la popolo de la tuta Ĉinio kaj la popoloj de la tuta mondo." Oraj vortoj!

Amika akcepto de la albanaj sportistoj, frata sanga rilato al korea popolo kaj senpaga kuraca helpo al la popolo maŭritania estas nerefuteblaj pruvoj, ke via vojo al komunismo estas prava kaj vera.

SKRIBIS BRITA LEGANTO D. F. C.

Mi kaj miaj amikoj ĉiam admiras la diverstemajn luksajn koloritajn bildojn en la kalendaroj de Ĉ.E.L. Ni ĉiuj akordas, ke la feliĉo, sano kaj laboremo, kiujn tiuj bildoj al-loge spegulas, estas nekontraŭebla atesto de la progreso kaj atingoj de via vigla nacio sub la afabla kaj sperta gvido de via saĝa kaj eminenta Prezidanto Maŭ Zedong.

Miaj gestudentoj ĉiam admiras la kalendarajn bildojn kaj senpacience atendas tiun tagon kiam ili povos viziti la mirindan landon pri kiu ili tiel multe legis.

SKRIBIS ITALA LEGANTO G. L. P.

La plej varmajn bondezirojn kaj laŭdojn al "El Popola Ĉinio" pro ĝiaj tre bonaj kaj klaraj artikoloj pri la vasta teritorio de moderna Ĉinio. Ĉinio ne plu estas la antikva Ĉinio, sed sub la direkto de la granda gvidanto kamarado Maŭ Zedong rapide tute ŝanĝiĝis kaj atingos la plej ampleksan industrion de la mondo preterpasante la kapitalistan industrion. La ĉina laboristaro marŝas antaŭen rekte al progreso.



IRIGACIA KONSTRUO POR UTILIGI KLOAKAN AKVON

La unua parto de la granda irigacia konstruo de Ŝanhajo — kanalo de Ĝaŭgiabang por konduki kloakan akvon trans Huangpu-riveron — estas jam finita.

La kanalo komenciĝas de la strato Ĝaŭgiabang, sudokcidente de la komerca kvartalo de Ŝanhajo, iras transen sub la rivero ĝis la Orienta Maro tra la gubernio Ĉuanŝa en la orienta antaŭurbo, kaj havas totalan longon de pli ol 30 kilometroj. De nun ĉiutage 300,000 tunoj da kloaka akvo industria kaj hejma fluos al Ĉuanŝa por irigacii pli ol 100,000 muojn da kampoj de la 14 komunumoj. La malpura akvo entenas azotan kaj fosforan sterkon kaj havas la efikon redukti la malutilon de plantaj malsanoj kaj fiinsektoj kaj plibonigi la grundon. La kompletigo de tiu konstruo ĉesigos la enfluadon de malpura akvo el la komerca kvartalo en Huangpu-riveron. Tio en certa grado bonigos la kvaliton de la akvo de la rivero kaj ankaŭ levos la kvaliton de la produktaĵoj de manĝa, pres-tinktura k.a. industrioj.

PROKSIMUME CENT HIDROELEKTREJOJ KONSTRUITAJ EN TIBETO

Sub la helpo de ĈPLA, la revoluciaj popoloj de diversaj naciecoj en la Tibeta Aŭtonoma Regiono de nia lando konstruis multe, rapide, bone kaj ekonomie, proksimume centon da mezaj kaj malgrandaj elektrejoj utiligante la riĉan akvofonton de la loko kaj sin apogante sur siaj propraj fortoj. Tiuj elektrejoj dise lokiĝas en pli ol duono de la gubernioj de la regiono kaj en iuj komunumoj kaj brigadoj. Alia nombro da hidroelektrejoj estas en konstruado aŭ estos baldaŭ konstruata. La produkta kvanto de elektro en 1970 estis duoblo de tiu en 1965. Tiuj elektrejoj komencis ŝanĝi la fizionomion de la “firsto de la

mondo” kaj ne nur ebligas al liberigintaj kamparanoj kaj paŝtistoj en multaj lokoj, kiuj de generacioj uzis oleajn lampojn kaj kenajn torĉojn, lumigi siajn domojn per elektraj lampoj kaj aŭdi radioelsendojn, sed ankaŭ provizas energion al agrikultura kaj brutbredsprodukto kaj al lokaj industrioj.

SINSEKVAJ RIĈRIKOLTOJ DE KOLZOSEMO EN ŜANHAJO

Kun riĉa rikolto de greno kaj kotono en la sinsekvaj jaroj la ĉirkaŭurbo de Ŝanhajo akiris samtempe riĉan rikolton de kolzosemo tiel ke efektiviĝis memprovizo de manĝoleo por la dekmiliona popolo de la tuta urbo jam en ses jaroj.

De 1963 la tiea produktokvanto de kolzosemo daŭre kreskis. Ekde la Granda Proletara Kultura Revolucio, la amasa movado de lerno de Daĝaj vaste kaj profunde disvolviĝas en la kamparo. La vastaj komunumanaj amasoj kaj kadroj peneme klopodas rikolti pli da kolzosemo sur la limigita agro por provizi la urbon. En la komunumoj kaj brigadoj kun bonaj naturaj kondiĉoj, oni senĉese batalas kontraŭ fiero kaj memkontento kaj disvolvas latentan forton por produkti ankoraŭ pli multe. En tiuj kun kompare malfavoraj naturaj kondiĉoj oni brave luktas por vaste entrepreni bazan konstruadon de la kampoj kaj senĉese turnas la malaltan produkton en altan. En la lastaj tri jaroj la pomua meznombra produkto de kolzosemo en la ĉirkaŭurbo de Ŝanhajo superis 250 ĝinojn.

NOVTIPA MAŜINO POR PRODUKTI OKSIGENON

Post malfacila klopodo, la laboristoj, kadroj kaj teknikistoj de la Handan-a Fabriko de Oksigenproduktaj Maŝinoj, Hebej-provinco, sukcesis konstrui per siaj propraj fortoj novtipan oksigenproduktan maŝinon, kiu povas samtempe produkti oksigenon kaj ankaŭ nitrogenon kun alta pureco.

Tiu nova maŝino havas la superecon antaŭ la importitaj per tio, ke kun alta povo kaj simpla strukturo ĝi estas duone pli malgranda en korpo, facile manipulebla kaj ebliganta reduktion de la nombro de laboristoj je triono.

Tiu nova maŝino kontribuas en disvolvo de metalurgia, kemia, elektrona kaj nacidefenda industrioj.

Sur la kovrilo:

Profunda amikeco inter ĉina kaj vjetnama kunbatalantoj

Sur la dorskovrilo:

Membroj de la agrikultura kooperativo My-Lo de la vilaĝo An-Thuy de la provinco Quang Binh, Vjetnamio, defendas sian produktadon per armiloj.

EL POPOLA ĈINIO 人民中國報

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 5 (154) 1971

Ĉefa Enhavo

La Ĉina Partia kaj Registara Delegacio Estrata de Ĉefministro
Ĝoŭ Enlaj Vizitis Vjetnamion

Nun la Ĉefa Tendenco de la Mondo Estas Revolucio
Malgranda Lando Povas Venki Grandan Landon
Embusko

Ĉinio Sukcese Lanĉis Artan Tersateliton por Sciencaj
Eksperimentoj

Prosperaj Grenkampoj kaj Forstoj Ambaŭborde de Tinggiang

La Homoj Certe Povas Venki la Naturon

Novaj Bildoj ĉe la Flava Rivero

Hardado de la Ruĝa Koro ĉe la Piedo de Vuji-montaro

Alta Produkto de Rizo en Nordo de Huajhe

Vizito al Nanning

Malpeza Kavalerio Agrikultursubtena sur Rivero

Geologiaj Drilistinoj sur Stepo

Konstruantoj de la Hami-a Subĉiela Karbominejo

Mi Laboros Kiel Montvilaĝa Instruisto dum la Tuta Vivo

Krei Novan Medicinon por la Popolo

Kolportistoj en Profundaj Montoj

Proletaraj Herooj

sur Ekrano

Sub la direktado de la proletara literatura kaj arta linio de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la revolucia modela pekina opero *Sagaca Kapto de la Tigra Monto* estas sukcese filmita en koloroj. Ĝi estas varme akceptata de vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj en urboj kaj vilaĝoj de nia lando.

Kun la nobla aspiro akiri gloron por la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj por la granda socialisma partolando, la gekamaradoj de la film-grupo de *Sagaca Kapto de la Tigra Monto* de la Pekina Filmstudio kaj la speciala grupo por prezenti la nomitan operon de la Ŝanhaja Pekinopera Trupo elstarigis la proletaran politikon kaj vive studis kaj vive aplikis la filozofiajn pensojn de Prezidanto Maŭ dum la filmado. Ili profunde disvolvis revolucionan kritikadon por elimini la venenajn influojn de la kontraŭrevolucia reviziisma literatura kaj arta linio antaŭenpuŝita de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en la literaturaj kaj artaj rondoj Ĝou Jang, Hia Jan, Tian Han kaj Jang Hanŝeng kaj per tio multe levis la memkonscion pri efektivigo de la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ kaj rapidigis sian ideologian revoluciigon. Dum la filmado, ili plene disvolvis sian iniciatemon kaj kreemon, liberigis la pensojn el la kateno de rutinaj reguloj, unanime kunlaboris, reciproke lernis kaj kuraĝigis kaj finfine plenumis sukcese sian taskon de filmado de la revolucia opero disradiana brilon de Maŭzedongpenso.



Revoluciaj batalantoj literaturaj kaj artaj el Pekino kaj Ŝanhajo diskutas kiel filmi la operon.



Reĝisoro, fotistoj, belartistoj, sonregistristoj kaj lumigistoj de la filmgrupo de la revolucia opero diskutas pri scendividado.

Maldekstre:
Farado de dekoraciaj arboj neĝkovritaj

Filmado de la sceno
“Demando pri Pasinta Sufero en Montaro”







La reĝisoro interkonsiliĝas detale kun la aktoroj por kiel eble plej reliefe prezenti la revolucion patoson de proletaraj herooj.



Filmado de la sceno "Sagaca Elsendo de Informo"

团结起来，争取更大的胜利。



Revoluciaj literaturaj kaj artaj batalantoj dum paŭzo de laboro

